

A romantic scene of a couple sitting on a pier or ledge, looking out at a body of water during sunset. The background is filled with the warm, golden light of the setting sun, creating a bokeh effect with out-of-focus lights and structures. The couple is silhouetted against the bright light, with the woman's long hair flowing down. The overall mood is peaceful and intimate.

Julian Modest

*Ne forgesu
mian voĉon*

2 noveloj

Titolo Ne forgesu mian voĉon – 2 noveloj.
Aŭtoro Julian Modest
Provlegis Johan Derks
Eldonjaro 2020
Eldonejo Eldonejo Libera
ISBN 978-0-244-26373-7

AŬTUNA FERIO

novelo, originale verkita en Esperanto

1.

Martin ŝatis la aŭtunon. La tagoj estas malvarmetaj, senteblas la lasta spiro de la foriranta somero, kiu kiel nudpieda bubo ekiras kaj malaperas en bluecan nebulon. La somero, kies okuloj similas al varmaj maronoj, tristas pri la maro, pri la verdaj herbejoj, pri la fruktaj arboj... Foriras la somero.

Iom malrapide kaj silente venas la aŭtuno. Ĝi proksimiĝas kiel junulino, kiu paŝas senbrue kaj nur la susuro de la flavaj arbaj folioj aludas, ke ĝi venas. La aŭtuno paŝas tra herbejoj, tra arbaroj, tra montoj kaj post ĝi aperas flortapiŝoj. La vinbero fariĝas pli sukplena, la pomoj – pli ruĝaj.

Je la komenco de la monato septembro Martin decidis ekveturi ien, malproksimen de la brua urbo, en kiu li loĝis. Antaŭ du monatoj li komencis verki novan romanon. Ordinare li rapide kaj inspire verkis, sed nun la verkado lacigis lin kaj li decidis iri ien, kie en silento kaj trankvilo li daŭrigos verki. Martin ŝatis la maron kaj estis certa, ke tie, ĉe la mara bordo, li verkos trankvile kaj inspirite.

2.

Martin preferis veturi per vagonaro. Kutime, veturante, li forgesis la zorgojn, la devojn kaj nun, en la kupeo, lia rigardo flugis eksteren al la senlimaj kampoj, etaj stacidomoj, solecaj arboj, mallarĝaj vojoj, sur kiuj ne videblis homoj, nek aŭtoj.

En la kupeo estis kvar personoj: du junuloj, fratoj, maljuna viro kaj Martin. La junuloj, vilaĝanoj, rakontis, ke somere ili laboris en Malto, kie ili estis kuiristoj en granda restoracio. Unu el la junuloj estis pli parolema. Verŝajne dudekjara, li havis nigran densan hararon, nigrajn brilajn okulojn kaj vangostan vizaĝon. Lia rideto montris, ke li estas kara kaj bonkora. Lia frato, du jarojn pli aĝa ol li, same estis nigrahara, nigraokula, sed pli silentema. Li malmulte parolis kaj nur de tempo al tempo li aldonis kelkajn frazojn al la

rakonto de sia frato. La junuloj diris, ke la laboro en Malto estis malfacila, sed ili kontentis, ĉar tie ili perlaboris multe da mono. La pli juna frato fiere menciis, ke per la gajnita mono li daŭrigos studi en teknika universitato. La vagonaro frapetis ritme, monotone, veturante tra vasta valo. Estis la deka horo antaŭtagmeze, sed ekstere ne videblis homoj. “Ĉu iu loĝas en tiu ĉi regiono, demandis sin Martin.” Nur ie-tie sur la kampo videblis nekolektita maizo, kio montris, ke tamen proksime loĝas homoj. La suno mole brilis, la naturo trankvilis. Allogaj estis la senlima flava kampo, la bluaj montetoj en malproksimo, kiuj similis al kuŝantaj lacaj bubaloj.

La fratoj kaj la maljunulo daŭre konversaciis. Nun parolis la pli aĝa frato kaj li rakontis, ke antaŭ la ekveturo al Malto ambaŭ havis etan restoracion.

-En ĝi ni laboris de matene ĝis malfrue vespere. Fojfoje helpis nin niaj gepatroj kaj nia fratino, sed ni ne perlaboris multe. Ni konstatis, ke pere de la restoracio ni ne povis vivteni nin kaj ni ekveturis labori eksterlande.

Dum la lastaj jaroj multaj gejunuloj laboris eksterlande. Ĉi tie, en la lando, la salajroj estis malaltaj kaj oni malfacile vivis. Ja, oni devis zorgi pri familioj, pri infanoj. Iuj provis vivteni sin pere de eta negoco, aliaj starigis privatajn entreprenojn, sed la produktado ne estis profitdona.

La vagonaro ne haltis ĉe etaj stacidomoj. Ĝi rapide preterveturis ilin kaj nur por momento videblis urbetoj kun malnovaj domoj aŭ kun pli altaj konstruaĵoj, kiuj eble estis lernejoj, infanĝardenoj aŭ kulturdomoj.

En la kupeo ekestis silento. La fratoj kaj la maljunulo ne plu konversaciis. Martin rigardis tra la fenestro. La vagonaro nun veturis iom pli malrapide. Verŝajne post kelkaj minutoj ĝi haltos ĉe iu stacidomo. La fratoj ekstaris kaj prenis siajn valizojn.

-Ĝis revido kaj bonan veturadon – bondeziris la pli juna frato. – Ni alvenis. Tio estas nia vilaĝo.

-Ĝis revido kaj ĉion bonan – diris Martin.

La bremsoj de la vagonaro komencis grinci. La vagonaro haltis, kvazaŭ ĝi peze elspirus post la longa rapidego. Sur la kajo la fratojn renkontis la gepatroj kaj bela knabino, verŝajne ilia fratino. Kiam ŝi vidis ilin, ŝi saltis, ĉirkaŭbrakis kaj komencis kisi ilin. Certe ŝi longe atendis, ke ili revenu el Malto kaj nun ŝi ĝojis, ke ŝi denove vidas ilin.

“Bone estas, kiam iu atendas vin, kiam iu renkontas kaj amas vin”, meditis Martin.

3.

Post seshora veturado Martin venis en la grandan havenan urbon. Li iris el la vagonaro. Antaŭ kelkaj jaroj Martin estis en tiu ĉi urbo. Ĝi havis maran havenon, belajn malnovajn konstruaĵojn, imponan katedralon. Proksime al la urbo estis kelkaj famaj maraj restadejoj kun hoteloj kaj ripozdomoj. Unu el tiuj ĉi restadejoj estis Ora Bordo kaj Martin decidis iri tien. “Mi luos ĉambron en iu hotelo. Nun, en la komenco de septembro, la hoteloj estas malplenaj, supozis li. Mi pasigos tie kelkajn tagojn. Estos agrabla ripozo. Mi daŭrigos la verkadon de la romano. Se mi ne havos emon verki, mi promenados. Plezure estas promenadi ĉe la maro kaj ĝui la varmetajn aŭtunajn tagojn.”

Proksime al la stacidomo estis la aŭtobushaltejo al Ora Bordo. Post dek minutoj venis aŭtobuso kaj Martin eniris ĝin. En la aŭtobuso estis nur kelkaj personoj. Martin sidis ĉe la fenestro. Rapide la aŭtobuso traveturis la randan kvartalon de la urbo kaj ekis al arbara monteto. Inter la arboj videblis la maro, senlima, blinde blua. Martin ekstremis. Ĉiam, kiam li vidis la maron, ĝojo obsedis lin. La maro kvazaŭ donis al li fortojn, ĝi vekis en li sopirojn kaj revojn. Por Martin estis nenio pli bela, pli enigma kaj pli alloga ol la maro. La maro sorĉis lin, la ondoj kvazaŭ amike flustrus al li senfinajn fabelojn.

La aŭtobuso haltis en Ora Bordo. Martin descendis kaj ekis sur aleon, kiu gvidis al la mara bordo. Sur la aleo estis ŝildo kun mapo kiu montris kie ĝuste troviĝas la hoteloj. Iam Martin estis ĉi tie, sed li jam ne memoris en kiu hotelo li estis kaj kie ĝi troviĝis. Nun li detale trarigardis la mapon kaj tralegis la nomojn de la hoteloj. Unu el ili estis “Diana”, kiu troviĝis proksime al la mara bordo. Martin ekiris al ĝi. Post ducent metroj li vidis la hotelon, blankan, kvinetaĝan kun balkonoj al la maro.

Martin eniris la hotelon. Ĉe la akceptejo estis junulino, verŝajne dudekkvinjara, brunhara kun helaj okuloj.

-Bonan venon ŝi salutis lin afable.

-Bonan tagon – diris Martin. – Mi ŝatus lui ĉambron.

-Bonvolu – diris la junulino.

-Mi ŝatus ĉambron al la maro – petis Martin.

-Estas tre bela ĉambro sur la kvina etaĝo. Ĝi certe plaĉos al vi. De la ĉambra balkono videblas la maro.

-Koran dankon.

La junulino donis al Martin la ŝlosilon de la ĉambro. Li iris al la lifto, kiu ekveturis al la kvina etaĝo. La ĉambro plaĉis al Martin. Ĝi ne estis granda, sed komforta: lito, vestoŝranko kaj plej grave – skribotablo, tre necesa por la verkado.

Martin iris sur la balkonon. Antaŭ li vastiĝis la maro, mirakla kaj senlima. Denove Martin emociiĝis. Li rigardis la maron kaj ŝajne li estis en fabela mondo.

Malproksime estis la grandega urbo kun la malpura aero kaj rapidaj aŭtoj, la bruo, la grincado de la bremsoj, kun la zorgoplenaj homoj, la krioj... Ĉi tie regis silento, profunda, benita silento. De la maro alflugis la agrabla lirlo de la ondoj.

Dekstre de la hotelo “Diana” estis la hotelo “Astoria”, sesetaĝa, moderna. Maldekstre, la hotelo “Panoramo” – nur duetaĝa. Malantaŭ la hotelo “Astoria” estis arbaro kaj ŝajne el ĝi blovis friska vento. Martin rigardis sian brakhorloĝon. Estis la kvara horo posttagmeze. En la komenco de septembro la suno ankoraŭ malavare lumigis la tutan maran restadejon.

Martin lavis sin, ŝanĝis vestojn kaj iris promeni. Antaŭ la hotelo estis baseno. Ĉirkaŭ ĝi staris kuŝseĝoj. Dudek metrojn de la baseno, sub altaj pinarboj, ĵetantaj densan ombron, troviĝis bufedo, ĉe kiu estis tabloj kaj seĝoj. Martin proksimiĝis al la bufedo kaj mendis glason da biero. La afabla bufedistino rapide servis lin. Ĉe la bufedo estis kelkaj viroj kaj virinoj, ŝajne gepensiuloj, kiuj kiel Martin eble venis por pasigi kelkajn tagojn ĉe la maro. La malvarma biero freŝigis Martinon. Li sidis ĉe tablo kaj alrigardis la homojn, kiuj estis ĉe la najbara tablo. Tie sidis viro kaj virinoj. Verŝajne ili estis el iu provinca urbo. Modeste vestitaj, ili surhavis jakojn kaj malnovajn ŝuojn. Eble dum kelkaj monatoj ili ŝparis monon por veni ĉi tien kaj pasigi kelkajn tagojn. Unu el la viroj, ĉirkaŭ sepdekjara, iom dika, blankharara kun bluaj okuloj parolis telefone kaj klarigis al iu kiel bone estas ĉi tie, en la hotelo.

-La manĝaĵo en la restoracio tre bongustas – diris li. – La servo estas bonega kaj la personaro de la hotelo – afabla.

Martin aŭskultis la konversacion de la geviroj. Unu el la virinoj, kiu estis malalta kun farbita ruĝa hararo, rakontis pri sia filo, kiu loĝas kaj laboras eksterlande.

-Mia filo estas aŭtoriparisto – diris la virino. – Lia laboro ne estas facila, sed lia salajro estas tre alta.

Martin ekstaris kaj ekiris al la mara bordo. De la hotelo komenciĝis asfaltita strato, kiu pasis preter la hotelo “Astoria”. Sur iuj el la balkonoj de “Astoria” videblis homoj, verŝajne fremdlandanoj. Sur la parkejo de “Astoria” staris kelkaj aŭtoj. Martin proksimiĝis al la mara bordo. La plaĝo kun oreca sablo estis vasta kaj sur ĝi ankoraŭ staris sunombreloj kaj kuŝseĝoj, sed homoj ne estis. Nur ie-tie videblis kelkaj personoj, kiuj kuŝis sur la kuŝseĝoj kaj ĝuis la lastajn sunradiojn de la subiranta suno. Antaŭ la plaĝo estis longa aleo sur kiu promenadis junuloj kaj maljunuloj, ĉefe fremdlandanoj. Infanoj ne videblis. La lernoĵaro jam komenciĝis kaj la familioj kiuj havas infanojn, forveturis de la Ora Bordo.

Martin ekiris sur la aleon, dezirante trarigardi bone la Oran Bordon. Ĉe la aleo viciĝis etaj vendejoj, en kiuj oni vendis nutraĵojn, kosmetikaĵojn, vestojn, memoraĵojn. Maldekstre bluis la maro kaj dekstre staris hoteloj, diversaspektaj. Preskaŭ en ĉiu hotela korto estis baseno. La plaĝo aspektis alloga: kun duŝejoj, ejoj por ŝanĝi vestojn, bufedoj, en kiuj oni vendis sandviĉojn kaj senalkoholaĵojn. La aleo gvidis al eta haveno, kie estis diversaj jaktoj, iuj el ili tre belaj kaj certe multekostaj. Ne tre proksime de la haveno videblis kelkaj elegantaj vilaoj, du-trietaĝaj.

Jam estis la sepa horo vespere kaj Martin revenis en la hotelon por vespermanĝi. La hotela restoracio, kiu troviĝis sur la unua etaĝo, estis vasta kun multaj tabloj, kovritaj per blankaj tablotukoj. En la restoracia salono estis aŭtomatoj por kafo, minerala akvo kaj sukoj. La trinkaĵoj estis senpagaj.

Multaj homoj estis en la restoracio. Martin eksidis ĉe tablo, proksime al la fenestro. Li rimarkis, ke ĉe la najbara tablo sidas tre bela junulino. Delonge li ne vidis tian belan virinon. Eble tridekjara, svelta, ne tre alta kun longaj femuroj, ŝi havis glatan vizaĝon, iom sunbrunigitan, nigran hararon, profundajn migdalformajn okulojn kaj tenerajn brovojn kiel etaj arkoj.

Martin prenis kaj trarigardis la menuliston, kiu estis sur la tablo. Por vespermanĝo li elektis boligitajn terpomojn kaj rostitan fiŝon. Li remetis la menuliston kaj al li rapide proksimiĝas unu el la kelnerinoj, kiu afable demandis lin:

-Bonan venon, sinjoro. Kion vi bonvolos?

-Bonan vesperon – salutis ŝin Martin kaj mendis vespermanĝon.

La kelnerino malproksimiĝis. Post dek minutoj ŝi denove venis kaj servis al li la manĝaĵon. La kelnerino estis juna, eble dudekjara, blonda kun bluaj okuloj. La kelnerina uniformo tre konvenis al ŝi. Ŝi surhavis blankan bluzon kaj nigran jupon, sub kiu diskrete videblis ŝiaj belaj femuroj.

Martin finis la vespermanĝon, sed li ne rapidis voki la kelnerinon por pagi, tamen ŝi venis al lia tablo por kolekti la malplenajn telerojn. Post iom da tempo la kelnerino revenis, Martin pagis, dankis al ŝi kaj li eliris el la restoracio.

Estis la oka horo vespere. Martin eniris la hotelan ĉambron kaj sidis ĉe la skribotablo por verki. Plaĉis al li, ke en la ĉambro estis silento kaj trankvilo. Li malfermis la manuskripton de la romano. Martin kunportis porteblan komputilon, sed li kutimis skribi mane. Li komencis legi la lastan ĉapitron, kiun li verkis antaŭ la alveno ĉi tie. Li korektis kelkajn frazojn kaj vortojn. En la silenta ĉambro li bone koncentriĝis kaj precize esprimis siajn pensojn. Certe ĉi tie li sukcese daŭrigos la verkadon de la romano kaj tio ĝojigis lin. La verkado estis por li la plej granda plezuro. Martin ne komprenis kial por aliaj homoj plezuroj estas la kartludado, la fiŝkaptado aŭ la spektado de futbalmatĉoj.

Martin korektadis la tekston ĝis la deka horo vespere kaj tiam preparis sin por dormado. Kutime li ekdormis je la deka horo kaj ĉiun matenon li vekigis frue, je la kvina horo. Matene li banis sin kaj poste sidis ĉe la skribotablo por verki. Li verkis dum horo kaj duono, poste li matenmanĝis, iomete li promenadis kaj denove verkis.

Nun Martin surmetis la piĝamon kaj ekkuŝis en la liton. Li devis al kutimiĝi al la nova ĉirkaŭaĵo kaj li ne povis tuj ekdormi. Kuŝante, Martin meditis pri la belulino, kiun li vidis en la restoracio. Kio estas ŝia nomo, de kie ŝi estas? Iom post iom li dronis en profunda sonĝo.

4.

La unuaj sunradioj vekis Martin kaj li malfermis la okulojn, ekstaris de la lito kaj iris sur la balkonon. La maro brilis lazure kiel grandega silka tolo, krispigita de la feblaj matenaj ondoj. Kelkajn minutojn Martin staris sur la balkono, rigardante la maron. Oriente la mara kaj la ĉiela bluecoj

kunfandiĝis. Ekstere videblis neniuj. Malsupre, antaŭ la hotelo, la akvo en la baseno bluis kiel grandega okulo. La bufedo ankoraŭ ne funkciis. La tabloj kaj la seĝoj staris solecaj sub la altaj pinarboj, kiuj kvazaŭ tuŝus la ĉielon. Sur la strato al la mara bordo ne estis homoj nek aŭtoj. Martin ĝuis la matenan vidindaĵon kaj li profunde enspiris la freŝan maran aeron.

Martin revenis en la ĉambron kaj iris en la banejon. La agrabla akvo freŝigis lian korpon. Vigla kaj bonhumora li eksidis ĉe la skribotablo kaj komencis verki, havante la senton, ke ia mirakla forto malfermis la pordon de lia inspiro. La frazoj, la vortoj aperis unu post alia sur la blanka papero. Dum unu horo li verkis. Ankoraŭ unu ĉapitro de la romano estis preta. Martin ekstaris, li iom promenis en la ĉambro kaj pripensis la enhavon de la sekva ĉapitro. Li jam sciis kiel li daŭrigos la verkadon, sed kiam li verkis ĉiam aperis novaj ideoj, novaj bildoj kaj tial la verkado forte logis lin.

La horloĝo montris la okan horon. Estis tempo por matenmanĝo. Martin iris en la restoracion. En ĝi denove estis multaj homoj. Ili matenmanĝis kaj trinkis kafon. Martin rimarkis, ke la bela junulino, kiun li vidis hieraŭ vespere sidas sola ĉe tablo. Li decidis sidi ĉe ŝi.

-Bonan matenon – salutis li ŝin. – Ĉu vi permesus, ke mi sidu ĉe vi? – demandis li afable.

-Kompreneble. Bonvolu – diris la junulino.

La blonda kelnerino venis.

-Bonan matenon, sinjoro. Kion vi bonvolus por matenmanĝo? – demandis ŝi Martinon.

-Bonan matenon. Mi ŝatus omleton kaj mentan teon.

-Bone – kaj la kelnerino malproksimiĝis per facilmovalmaniero.

Dum Martin atendis la matenmanĝon, li alparolis la junulinon ĉe la tablo:

-Mi deziras al vi bonan apetiton – diris li.

-Dankon – ekridetis la junulino.

-Pardonu min – komencis Martin iom hezite. – Mi venis hieraŭ kaj mi estos ĉi tie kelkajn tagojn. Verŝajne vi same ferias ĉi tie?

-Jes. Mi same estos ĉi tie kelkajn tagojn.

-Mia nomo estas Martin Dobrinski.

-Mia nomo estas Nina – respondis la junulino – Al mi estas agrable konatiĝi kun vi.

-Dankon.

La kelnerino venis kaj servis al Martin la omleton kaj la teon.

-Bonan apetiton – diris la junulino al Martin.

-Dankon.

Martin komencis manĝi. Nina ekstaris de la tablo.

-Mi jam matenmanĝis – diris ŝi. – Ĝis revido. Mi deziras al vi bonan ripozon ĉi tie.

-Dankon. Ĝis revido – diris Martin.

Martin finis la matenmanĝon kaj vokis la kelnerinon por pagi.

-Mi dankas al vi pro la afabla servo – diris li al la kelnerino.

-Mi deziras al vi agrablan tagon – respondis la kelnerino.

Martin ekstaris de la tablo kaj eliris el la restoracio.

5.

La tago estis suna, sed blovis vento. La ĉielo bluis sennuba. Belega tago por promonado, meditis Martin. La aleo ĉe la mara bordo plaĉis al li kaj li iris tien. Hodiaŭ estis grandaj ondoj, kiuj muĝis kiel lupoj. La ondoj inundis la orecan sablon kaj poste kvazaŭ timigitaj ili rapide malproksimiĝis.

Martin paŝis kaj rigardis la hotelojn, en kiuj jam ne estis homoj. Nun la restadejo komencis simili al eta senhoma urbo. Pluraj hoteloj estis fermitaj. En la komenco de oktobro eĉ unu

persono ne estos ĉi tie. Martin provis imagi la dezertan restadejon, kiu dronos en profunda silento. Nur la laroj promenos trankvile sur la plaĝo. Aŭdiĝos ilia grako kaj la bruego de la ondoj.

Martin venis al la jakta haveno. Ĉi tie same estis neniu. La luksaj jaktoj staris unu apud la alia ĉe la kajo, similaj al grandaj infanaj ludiloj, bone ordigitaj. Ne videblis gardisto kaj Martin miris. Li komencis scivole rigardi la jaktojn, kiuj havis neordinarajn nomojn: “Revo”, “Prospero”. “Lazuro”. De la jakta haveno Martin iris al la vilaoj, kiuj troviĝis je kilometro de la haveno. Estis nur kvar vilaoj, kiuj same aspektis senhomaj. Eble iliaj posedantoj venis ĉi tie nur somere kaj en la komenco de la aŭtuno ili ŝlosis la vilaojn kaj forveturis. Inter la vilaoj estis eta strato kaj Martin ekiris sur ĝin. Antaŭ li aperis viro, kiu eble eliris el iu el la vilaoj. La viro paŝis malrapide. Kiam li proksimiĝis, Martin alrigardis lin kaj haltis surprizite. Tio estis lia iama kunstudento Stojko. Malgraŭ ke nun li estis iom pli dika, Martin rekonis lin kaj rapide diris:

-Stojko saluton. Ĉu vi restadas ĉi tie?

La viro tamen rapide preterpasis. Nur por sekundo li turnis sin kaj iom malĝentile diris:

-Mi ne estas Stojko. Vi eraras – kaj li malaperis al la mara bordo.

Martin konsterniĝis. Tio certe estis Stojko, lia iama kunstudento kaj amiko. Vere, nun Stojko aspektis iom pli dika kaj jam preskaŭ kalva, sed Martin bone rekonis lin. Tamen kial Stojko ŝajnis, ke li ne konas Martinon kaj kial li rapidis malproksimiĝi?

Dum dudek jaroj Martin kaj Stojko ne vidis unu la alian, sed Martin opiniis, ke li mem ne tre ŝanĝiĝis kaj Stojko bone rekonis Martinon. Tio, kio okazis, estis ege stranga. Ĉu Stojko loĝas ĉi tie, en iu vilao aŭ kial li estas en Ora Bordo? Martin staris sur la strato kaj li ne povis klarigi al si mem kial Stojko forkuris de li.

Antaŭ dudek jaroj Martin kaj Stojko estis bonaj amikoj. Ili kune komencis studi en la universitato en la ĉefurbo. Stojko loĝis en la urbo Brez kaj kiam li ekstudis, li ekloĝis en la studenta hejmo. Dum la unuaj tagoj en la universitato Stojko estis sinĝenema, embarasita, silentema. Li kaj Martin sidis unu ĉe la alia en la aŭditorioj. Post la lecionoj ili iris en kafejon, kie ili longe konversaciis. Stojko rakontis al Martin pri sia naska urbo. Lia patro estis oficiro en la armeo kaj lia patrino instruistino. Tiam, en la universitato, preskaŭ ĉiuj gestudentoj, kiuj studis filologion, verkis versaĵojn. Stojko ofte legis al Martin siajn versaĵojn kaj li petis Martin diri sian opinion pri ili. La versaĵoj de Stojko estis bonaj. Li havis talenton. Martin kuraĝigis kaj instigis lin daŭrigi la verkadon.

Fojfoje Stojko gastis en la domo de Martin kaj ambaŭ lernis por la ekzamenoj. La ekzamenoj dum la unua studjaro estis malfacilaj, sed Stojko kaj Martin sukcese ekzameniĝis. Post la fino de la unua studjaro, en la komenco de la somero, Stojko iris en sian naskan urbon. Aŭtune tamen, kiam komenciĝis la dua studjaro, Stojko ne venis en la universitaton. Unue Martin opiniis, ke li pli malfrue venos, sed ĝis la fino de la studjaro Stojko ne aperis kaj ne daŭrigis la studadon. Martin ne sciis kio okazis al li. Kelkfoje Martin provis telefoni al Stojko, sed ne sukcese. La telefono de Stojko ne funkciis. Verŝajne li jam havis alian telefonnumeron. Ĝis la fino de la studado Martin ne eksciis kio okazis al Stojko. Ĉu li ĉesis studi aŭ komencis labori, aŭ eble li forveturis eksterlanden? Neniam Martin renkontis Stojkon.

La jaroj pasis kaj Martin preskaŭ forgesis lin, sed nun tute neatendite Martin vidis Stojkon en la Ora Bordo. Tamen Stojko ŝajnis, ke li ne konas Martinon kaj li forkuris. Verŝajne ankaŭ tio okazas al malnovaj amikoj – iom amare konstatis Martin kaj ekiris al la hotelo.

6.

La subita renkontiĝo kun Martin embarasis Stojkon. Li ne supozis, ke ĉi tie li vidus sian kunstudenton kaj iaman amikon. Stojko rapide trapasis la straton, kie estis la vilaoj, iris dekstren kaj en proksima eta parko li haltis malantaŭ arbo. Ĉi tie Stojko atendis la foriron de Martin. “Eble li estas en iu hotelo, supozis Stojko. Ĉu mi sukcesis konvinki lin, ke mi ne estas Stojko?” Kaŝita malantaŭ la arbo, Stojko vidis, ke Martin iras al la jakta haveno. Poste Martin daŭrigis sur la aleon al la hoteloj.

“En kiu hotelo li estas”, demandis sin Stojko. “Ja, nun en la restadejo preskaŭ ne estas homoj.” Kiam Martin jam estis malproksime, Stojko revenis en la vilaon, kie li loĝis. La vilao ne estis granda, duetaĝa, en korto kun ŝtona barilo, kie estis kelkaj fruktaj arboj kaj alta abio.

Kiam Stojko eniris la ĉambron, Mira, lia edzino surpriziĝis:

-Kial vi revenas? Vi diris, ke vi promenados.

-Mi deziris promenadi, sed mi revenis – respondis Stojko iom malafable.

-Kial?

-Sur la strato mi neatendite renkontis mian iaman amikon, kiu rekonis min.

-Ĉu? – alrigardis lin Mira. – Ĉu li alparolis vin?

-Li komencis, sed mi diris al li, ke li eraras.

-Eble li estas en iu hotelo – supozis Mira.

Mira estis kvardekjara kun longa blonda hararo, sukcenkoloraj okuloj kaj gracia korpo.

-Kiu li estas? – demandis ŝi.

-Ni studis filologion. Li loĝis kaj verŝajne ankoraŭ loĝas en la ĉefurbo. Tiam ni estis bonaj amikoj kaj mi ofte gastis en lia domo, kiu estis en randa ĉefurba kvartalo. Ni kune studis por la ekzamenoj en la universitato.

-Do, vi tre bone konis unu la alian – konkludis Mira. – Kio li estas?

-Li finis la universitaton kaj estis redaktoro, poste – ĵurnalisto.

-La ĵurnalistoj estas scivolemaj. Eble li provos denove renkonti vin? – supozis Mira.

-Nun li estas verkisto, aŭtoro de novelaroj kaj romanoj.

-Kio estas lia nomo? – demandis Mira.

-Martin Dobrinski. Dobrinski estas pseŭdonimo. Lia vera nomo estas Martin Minev.

-Mi memoras, ke iam mi legis iujn rakontojn de li – diris Mira.

-Liaj rakontoj aperis en iuj ĵurnaloj kaj revuoj, kaj en interreto.

-Jes. Vi havis neatenditan renkontiĝon – diris Mira.

Mira ekiris al la kuirejo kaj diris:

-Mi devas prepari la tagmanĝon. Se vi ne dezirus denove iri promenadi, vi spektu televidon aŭ ion legu.

Stojko iris al la dua etaĝo de la vilao, en la ĉambron, kie estis la televidilo. Li ne funkciigis la televidilon, sed sidis sur la lito. La neatendita renkonto kun Martin vekis en Stojko plurajn rememorojn.

Kiam Stojko estis gimnaziano, li provis verki poemojn. Tiam li kaj Mira lernis en la sama lernejo en la urbo Brez. Mira estis la plej bela knabino en la lernejo. Ĉiam, kiam Stojko vidis ŝin en la koridoroj de la lernejo, li admiris ŝin. Ŝajnis al li, ke Mira sorĉas lin. Stojko ege deziris, ke Mira rimarku lin. Kaj li cerbumis kiel li igu Miran ekinteresiĝi pri li. Foje li ekhavis genian ideon. Li decidis verki poemon pri la beleco de Mira. Li donos la poemon al ŝi kaj kiam ŝi tralegos ĝin, ŝi nepre konjektos, ke la poemo estas dediĉita al ŝi. Eble Mira respondos kaj ili fariĝos geamikoj.

Stojko verkis la poemon. Ja, Mira ege plaĉis al li kaj rapide li verkis la poemon. Stojko priskribis la neordinarajn belajn okulojn de Mira, ŝian rigardon, kiu ebriigis lin kiel mirakla vino, ŝian sveltan korpon, similan al fragila arbido.

Nun tiu ĉi poemo estis naiva, sed tiam Stojko opiniis, ke li verkis mirindan poemon.

Kelkajn tagojn li cerbumis kiel doni la poemon al Mira. Se li donus ĝin en la koridoro de la lernejo, eble Mira prenis kaj ĵetus ĝin. “Mi devas diri al ŝi, ke tio, kion mi donas al ŝi estas tre grava kaj al neniuj ŝi diru pri ĝi. Ĝi estu sekreto.”

Post kelktaga hezito Stojko decidis nepre doni al Mira la poemon. Estis interleciona paŭzo kaj la lernantoj viciĝis antaŭ la bufedo por lunĉo. Stojko sukcesis ekstari malantaŭ Mira en la vico. Dum ili atendis, li mallaŭte diris al ŝi:

-Mi donos ion al vi, sed ĝi estas sekreto. Al neniuj vi montru ĝin.

Mira alrigardis lin mirege. Ĝis nun neniam ŝi parolis kun Stojko kaj ŝi ne povis kompreni kial tiu ĉi knabo donis al ŝi ion sekretan.

-Tralegu ĝin – diris mallaŭte Stojko, - tamen, kiam vi estas sola.

-Bone – murmuris Mira kaj ŝi metis la kajeran folion en la poŝon.

Kelkajn tagojn Stojko maltrankvile atendis respondon de Mira kaj li sentis sin kvazaŭ ebria. Nokte li songis ŝin. Ĉu ŝi respondos aŭ ne? Aŭ eble ŝi tute ne tralegis la poemon? Eble ŝi ĵetis ĝin.

Post tri tagoj Mira respondis. Ŝi skribis etan noteton: “Vi estas vera poeto. Via poemo emociigis min.”

Post tiu ĉi mallonga letero Stojko kaj Mira komencis renkontiĝi en la urba parko. Tie ili pasigis plurajn horojn, sidante sur benko, kiun ili nomis “nian benkon”. Stojko neniam forgesos la unuan kison, kiam li unuan fojon kisis Miran. Tio estis la plej dolĉa kaj la plej feliĉa kiso.

Stojko ŝatis literaturon kaj post la fino de la gimnazio, li komencis studi filologion en la ĉefurba universitato. Kun granda entuziasmo li ekstudis kaj sukcese li finis la unuan studjaron. Somere li revenis en sian naskan urbon Brez por

pasigi tie la someran ferion. La patro de Stojko estis oficiro kaj li tute ne deziris, ke Stojko studu filologion.

-Vi ne devas studi filologion – ofte diris la patro. – Vi estu viro kun serioza profesio. Vi devas ricevi altan salajron por vivteni vian estontan familion. Kiam vi finstudos filologion, vi fariĝos instruisto. Tio estas kompatinda profesio. Vi penos instrui lernantojn, kiuj tute ne emos lerni.

Dum la somera ferio, lia patro ironie demandis lin:

-Ĉu vi daŭrigos studi filologion?

Stojko respondis, ke li sukcese ekzameniĝis pri ĉiuj studobjektoj kaj ke li daŭrigos studi en la universitato.

-Bone – kapjesis la patro, - sed jam plurfoje mi diris al vi, ke la filologia profesio ne estas por vi. Mi parolis kun miaj kolegoj, oficiroj, kaj por vi ili proponis tre bonan eblecon. Vi komencos studi en la altlernejo por spionoj. Vi facile lernas fremdajn lingvojn. En tiu ĉi altlernejo vi ellernos kelkajn fremdajn lingvojn. Kiam vi finos ĝin, vi laboros eksterlande kaj plej grave – via salajro estos tre alta. Ĉion, kion vi deziras, vi havos.

La patro de Stojko, kiu nomiĝis Rajko, estis severa homo kaj oni ne kuraĝis kontraŭstari al li. Li havis tre malfacilan infanecon. Liaj gepatroj loĝis en vilaĝo. La patrino mortis, kiam Rajko estis dekjara. Lia patro estis tre malriĉa. Rajko ne povis lerni en la gimnazio en urbo. Li finis teknikan lernejon kaj poste li lernis en lernejo por oficiroj. Post la fino de la oficira lernejo Rajko estis en kazerno en diversaj urboj. Kiam li estis en la urbo Brez, li konatiĝis kun Lida, la patrino de Stojko kaj ili geedziĝis. Tiam Lida estis juna instruistino en la urba bazlernejo. Rajko havis soldatajn kutimojn kaj hejme oni devis subiĝi al liaj ordonoj. Tial li postulis, ke Stojko nepre eklernu en la altlernejo por spionoj.

Stojko bone komprenis, ke la patro deziras, ke Stojko havu bonan estontecon, ke li laboru eksterlande, estu riĉa, tamen Stojko ne deziris studi en la altlernejo por spionoj. Li diris tion al la patro, sed la patro tute ne aŭdis la vortojn de

Stojko. La patro estis kontenta kaj fiera, ke li sukcesis enskribi Stojkon en la altlernejo por spionoj.

La patrino same provis konvinki la patron, ke ne estas bone, se Stojko fariĝos spiono, sed la patro nur priridis la patrinon, dirante, ke virinoj estas stultaj kaj ne komprenas kion signifas esti spiono.

La somero pasis kaj aŭtune Stojko komencis studi en la altlernejo por spionoj. La altlernejo troviĝis en malproksima urbo. Tie Stojko devis studi kvar jarojn kaj alproprigi multajn konojn kaj spertojn, necesajn por spionoj. Li lernis fremdajn lingvojn, juron, nacian kaj internacian, aziajn batalartojn. La instruado estis tre serioza, la instruistoj – severaj. Inter ili estis famaj spionoj, kies celo estis transdoni siajn konojn kaj spertojn al la estontaj spionoj.

Dum la studado Stojko devis ĉesigi ĉiujn siajn kontaktojn kun amikoj kaj konatoj. Neniu devis scii, ke li studas en la altlernejo por spionoj. Kiam oni demandis lin kie li studas, li devis respondi, ke studas en komerca altlernejo.

Post la fino de la altlernejo, la junaj spionoj estis senditaj en al diversaj landoj. Stojko eklaboris en ambasadorejo de eŭropa lando. Tie li estis dum unu jaro. Tiam li edziĝis al Mira kaj ambaŭ ekveturis al la Araba Duoninsulo, kie ili estis du jarojn. Poste Stojko kaj Mira devis ekloĝi en lando sur alia kontinento, kie liaj taskoj estis pli komplikaj kaj pli danĝeraj.

Stojko kaj Mira ekhavis novajn nomojn kaj ili prezentis sin kiel komercistan familion. Tie ili devis fari kontaktojn kun diversaj firmaoj, akiri informojn pri la militindustrio kaj pri novaj sciencaj inventaĵoj. La informojn ili sendis diversmaniere. Ofte ili veturis tra la lando, tamen oni denunciis ilin. Stojko kaj Mira devis rapide forlasi la landon, la kontinenton kaj reveni. Kiam ili revenis oni denove donis al ili novajn nomojn.

Nun Stojko estis Vladimir Sokolov kaj Mira – Vera Sokolova. La Spiona Centralo sendis ilin en tiun ĉi vilaon en la

Ora Bordo. Ĉi tie ili devis loĝi dum iom da tempo kaj neniu devis scii kie ili estas.

Nun, post tiom da jaroj, Stojko bedaŭris, ke li komencis studi en la altlernejo por spionoj. Ja, li konstante riskis ne nur sian vivon, sed same la vivon de Mira. Ilia vivo ĉiam estis danĝera kaj streĉa. Ili devis ludi diversajn rolojn, ili prezentis sin kiel diversajn personojn kaj tio fizike kaj psike elĉerpis ilin. Stojko konstante streĉis orelojn kaj ĉirkaŭrigardis. Ĉiam ŝajnis al li, ke iu observas lin, iu embuskas lin. Eĉ ĉi tie, en la vilao, malantaŭ la ŝtona barilo, Stojko ne estis trankvila. Nokte li malfacile ekdormis kaj dum la dormado li sonĝis koŝmarojn. Ofte-oftege li vekigis, saltis de la lito kaj streĉis orelojn, sed en la ĉambro regis mallumo kaj profunda silento.

Kiam la patro obstine konvinkis Stojkon, ke li devas esti spiono, la argumento de la patro estis, ke Stojko havos altan salajron. Nun Stojko vere havis altan salajron, multe da mono, sed li eĉ ne povis trankvile eniri iun kafejon kaj trinki kafon. Li ne plu havis amikojn, konatojn kaj parencojn. Delonge la parencoj forgesis lin. Nun Stojko estis neniu, eĉ li mem ne sciis kiu li estas. Dum tiuj ĉi dudek jaroj li havis diversajn nomojn, loĝis en diversaj landoj. Li prezentis sin kiel homon kun diversaj naciecoj kaj kun diversaj profesioj.

Nun Stojko jam tute ne similis al la iama junulo, kiu iam nomiĝis Stojko Veleŭ, kiu unu jaron studis filologion, verkis poemojn kaj revis esti poeto.

7.

Martin meditis pri Stojko. Li estis certa, ke li ne eraris. Tio estis Stojko, ripetis Martin, sed kial li diris, ke mi eraras? Kial Stojko kaŝas sin? Kio okazis al li? Ja, dudek jarojn ni ne vidis unu la alian.

Martin esperis, ke dum la restado en la Ora Bordo li denove vidos Stojkon kaj tiam li demandos kial Stojko kaŝas sin kaj kial li ŝajnigas, ke li ne konas Martinon kaj neniam

vidis lin. Io malbona okazis al Stojko, supozis Martin. Martin ne deziris kredi, ke Stojko psike malsaniĝis kaj tial lia konduto ŝajnis tre stranga kaj nekomprenebla.

Martin iris sur la ĉemara aleo kaj li decidis eniri iun kafejon por trinki kafon. La tago estis suna, agrabla. Pli bone estis promenadi ol sidi en la hotela ĉambro kaj verki. En la kafejo li pripensos kiel daŭrigi la verkadon de la romano. Martin havis iujn ideojn, planon, sed al li ŝajnis, ke la romano ne estas sufiĉe streĉa. Jam de la komenco ĝi devis tuj kapti la atenton de la legantoj. Li deziris, ke la agado en la romano estu pli hasta, ke la legantoj ne havu paciencon ekscii kio okazos je la fino.

La kafejo estis preskaŭ malplena. Ĉe iu tablo sidis gejunuloj. La junulino estis blonda, havis blankan vizaĝon kun lentugoj. La junulo - alta kaj magra. Verŝajne ili estis britoj. Ĉe alia tablo sidis gemaljunuloj, kiuj parolis pole. Al Martin proksimiĝis la kelnerino, verŝajne deknaujara, brunhara kun okuloj kiel brilaj ĉerizoj.

-Kion vi bonvolos? – demandis ŝi.

-Kafon – diris Martin.

Post iom da tempo la belokula kelnerino alportis la kafon. Martin komencis malrapide trinki ĝin. Li daŭre meditis pri la enhavo de sia romano. Hieraŭ li finverkis la dekan ĉapitron. La ĉefheroo estis alloga, sed Martin devis pli klare priskribi la konflikton inter li kaj la ĉefheroino.

La kafejo havis grandan fenestron al la maro. Sur la aleo, antaŭ la kafejo, promenadis homoj. Same hodiaŭ la plaĝo estis dezerta. Neniu videblis tie. Subite Martin vidis Ninan, la belan junulinon. Ŝi pasis preter la kafejo, sed ŝi ne eniris ĝin. Nina plaĉis al Martin. Delonge li ne vidis tian belan junulinon. Ŝajnis al Martin, ke Nina estas singenema kaj ne tre komunikema.

Antaŭ kvin jaroj Martin eksedziĝis kaj de tiam li ne havis amikinojn. Li vivis sola, sed li deziris havi amikinojn, kiun li amu, al kiu li konfesu siajn pensojn kaj sentojn.

Martin edziĝis tuj post la fino de la universitato. Irina, lia edzino, estis lia kunstudentino. Dum la jaro antaŭ la fino de la studado ili enamiĝis kaj ilia amo estis forta kaj pasia. Dum la somero post la fino de la tria studjaro la studentoj havis studpraktikon en vilaĝo Senovo, proksime al la suda landlimo. Ili, la estontaj filologoj, devis surbendigi malnovajn popolkantojn, kiujn oni kantis en tiu landa regiono. La studentoj devis renkontiĝi kun maljunaj virinoj kaj peti ilin kanti la popolkantojn. Poste la studentoj devis kunmeti la kantojn, redakti ilin kaj eldoni volumon.

Dum la studpraktiko Irina kaj Martin bone ekkonis unu la alian. Ili kune surbendigis la kantojn. Tage la studentoj estis en la domoj de la maljunaj virinoj, kiuj kantis. La maljunulinoj sciis tiujn ĉi kantojn de siaj patrinoj kaj avinoj.

Vespere la studentoj kolektiĝis en domo, kiun disponigis al ili la vilaĝestro. La domo estis granda, duetaĝa kun multaj ĉambroj. Ĝiaj posedantoj mortis antaŭ kelkaj jaroj kaj nun en la domo loĝis neniuj. Sur la unua etaĝo estis vasta ĉambro, kiu similis al salono. En ĝi staris granda ligna tablo. Ĉiuj studentoj, dek entute, sidis ĉirkaŭ la tablo kaj vespermanĝis. De la vilaĝa restoracio ili aĉetis manĝaĵon, bieron, botelon da vodko. De la legomvendejo – tomatojn, kukumojn, kapsikojn. La junulinoj faris bongustajn salatojn. Dum la vespermanĝo la gejunuloj konversaciis, rakontis gajajn historiojn, multe ridis kaj amuziĝis. Post la vespermanĝo komenciĝis la dancoj. Ili estingis la lampon kaj la granda ĉambro fariĝis romantika kaj iom mistera. Post la noktomezo la gejunuloj iris sur la duan etaĝon, kie troviĝis la dormoĉambroj. Dum la unuaj tagoj la junuloj dormis aparte de la junulinoj, sed poste ili kundormis. Malfrue matene ili vekigis kaj ankoraŭ dormemaj ili iris en la vilaĝo de domo al domo kaj daŭrigis surbendigi la kantojn.

La studpraktika monato rapide pasis kaj la studentoj revenis en la ĉefurbon. En oktobro komenciĝis la studado.

Martin kaj Irina ĉiam esti kune. Ili kune lernis kaj ekzameniĝis. Kiam ambaŭ finis la studadon, ili geedziĝis.

La gepatroj de Irina loĝis province, en la urbo Svila, kaj la geedziĝo okazis tie. Estis modesta geedziĝifesto. Irina kaj Martin ankoraŭ ne laboris, ili ne havis monon. Post la geedziĝo la juna familio ekloĝis en la gepatra domo de Martin. La domo estis malgranda por du familioj, tamen tiam estis la plej feliĉaj jaroj por Martin. Li eklaboris kiel redaktoro en eldonejo por lernolibroj. Irina estis instruistino. Post du jaroj, post la geedziĝo, naskiĝis ilia filino – Desislava. La ĝojo estis granda, sed ili devis lui loĝejon. Jam Martin, Irina kaj Desislava ne plu povis loĝi en la gepatra domo de Martin, kiu iĝis maloportuna al la du familioj.

Irina kaj Martin luis etan loĝejon en nova loĝkvartalo. Tamen iliaj salajroj estis malaltaj kaj la mono ne sufiĉis. Irina komencis ofte ripeti, ke Martin nenion entreprenas por perlabori pli da mono. Martin provis trovi pli bone salajritan oficon, sed malsukcese. Dume li komencis pli aktive verki. De tempo al tempo liaj rakontoj aperis en diversaj revuoj kaj ĵurnaloj.

Ĝis malfrue nokte Martin sidis ĉe la tablo en la mallarĝa kuirejo de la domo kaj verkis. Irina tute ne interesiĝis pri lia verkado. Por ŝi la verkado estis sensenca kaj senutila okupo. Ja, la rakontoj de Martin, kiuj aperis en revuoj kaj ĵurnaloj, ne estis bone pagitaj. Tial Irina rilatis ironie al lia verkado.

-Kial vi perdas tempon verki? – diris ŝi. -Vi devas fari ion, kio alportos monon. La aliaj edzoj bone salajras kaj ili vivtenas siajn familiojn, sed ni vivas mizere.

Tiuj ĉi riproĉoj de Irina turmentis Martinon. Ambaŭ komencis ofte disputi kaj kvereli. Irina ne komprenis Martinon kaj ŝi eĉ ne deziris kompreni lin. Por Irina plej grave en la vivo estis la mono. Nenio alia havis valoron. Iom post iom ambaŭ malproksimiĝis unu de la alia kaj venis la fino. Ili eksedziĝis. Ili ne povis plu vivi kune. Por Martin la familia vivo fariĝis

koŝmara. Irina kaj Desislava forveturis loĝi en Svila ĉe la gepatroj de Irina.

8.

Nina banis sin kaj antaŭ la spegulo en la hotela ĉambro ŝi sekigis sian longan nigran hararon. Poste ŝi komencis malrapide vestiĝi. Unue ŝi surmetis neĝblankan mamzonon. Ŝiaj mamoj estis ne tre grandaj, similaj al maturaj persikoj. Poste Nina surmetis blankan subrobon, blankan bluzon kaj verdan jupon. Kiam ŝi vestiĝis, ŝi rigardis sin en la spegulo kaj ruĝkolorigis siajn lipojn.

Delonge Nina ne havis ferion. Finfine oni permesis al ŝi ferii kaj ŝi venis en tiun ĉi hotelon por ripozi dum kelkaj tagoj. Ja, la laboro de Nina estis tre respondeca, riska kaj danĝera. Ĉiam oni sendis ŝin ien malproksimen, kie ŝi devis plenumi malfacilajn taskojn. Oni sciis, ke ŝi estas la plej taŭga por la specialaj sekretaj operacioj. Nina bone sin regis, ŝi ne estis hezitema kaj ŝi spertis eliri el la plej malfacila kaj senespera situacio. Ŝi estis ne nur saĝa kaj klarvida, sed tre ĉarma, kio ege helpis ŝin. Neniam Nina plendis aŭ diris, ke la taskoj, kiujn ŝi plenumas, estas malfacilaj. Ŝi ĉiam pretis akcepti novajn ordonojn kaj ŝi plenumis ilin perfekte. Kiam ŝi agis, ŝi estis lerta kaj inventema. Nina mem elektis tiun ĉi vivmanieron, tiun ĉi riskan agadon kaj eĉ por momento ŝi ne bedaŭris.

Antaŭ dek jaroj Nina ne supozis, ke ŝi taŭgas por tiu ĉi speciala agado. Tamen iuj personoj rimarkis ŝin kaj ili konstatis, ke ŝi povus bonege plenumi la taskojn, kiujn oni komisiis al ŝi. Tiam Nina studis en la Sporta Akademio.

Nina naskiĝis kaj vivis en modesta familio en montara urbo. Ŝia patrino estis vendistino en nutraĵvendejo kaj ŝia patro – forstisto. Kiam Nina estis infano, la patro komencis instrui ŝin pafi per ĉaspafilo. Nina ofte akompanis la patron, kiam li iris ĉasi. Tre bone ŝi pafis kaj malofte ŝi maltrafis la

celobjektojn. Ŝia patro, same bona pafisto, ege miris, kiam Nina senerare pafis. Ŝia paftalento ĝojigis lin.

Foje somere en la naska urbo de Nina estis granda foiro kun ludiloj, cirko, pafejo, pavilionoj kun diversaj dolĉaĵoj... Nina kaj du ŝiaj amikinoj havis biletojn por la cirka spektaklo, sed antaŭ la komenciĝo de la spektaklo ili promenadis en la foirejo. Nina haltis antaŭ la pafejo, dezirante pafi. La posedanto de la pafejo donis al ŝi pafilon. Nina pafis kaj trafis. Ŝi gajnis pluŝan urseton, kiu poste estis ŝia talismano. Nina pafis duan fojon kaj denove trafis. La posedanto de la pafejo, kvindekjara viro kun hararo nigra kiel peĉo kaj densaj brovoj, tre miris, ke Nina dufoje trafis precize. Ja, Nina estis knabino.

-Se vi trafos trian fojon, mi donos al vi ne unu, sed du donacojn – diris li al Nina.

-Bone – konsentis ŝi.

Nina prenis la pafilon, trankvile levis ĝin kaj pafis. Ŝi trafis trian fojon. La viro donis al ŝi du donacojn: pluŝan hundeton kaj pluŝan erinacon, kiujn Nina donacis al siaj amikinoj.

La viro demandis Ninan:

-Kiom aĝa vi estas?

-Dektrijara mi estas – respondis ŝi.

-Mia amiko Trifon Kirov estas trejnisto pri sporta pafado, diris la viro. – Mi donos al vi lian telefonnumeron. Se vi deziras trejni sportan pafadon, telefonu al li.

La viro skribis sur papereton la telefonnumeron de Trifon Kirov kaj donis ĝin al Nina.

Post semajno Nina telefonis al Kirov kaj ŝi komencis trejni sportan pafadon. Rapide Nina fariĝis la plej bona pafistino en la junulina urba teamo. Ŝi partoprenis en pluraj sportaj konkuroj kaj ricevis multajn premiojn. Baldaŭ Nina iĝis ano de la landa teamo pri sporta pafado.

Post la fino de la gimnazio, ŝi ekstudis en la Sporta Akademio en la ĉefurbo. Tiam oni proponis al ŝi esti ano de la

speciala taĉmento. Nina ĉesis sportumi. Ŝi komencis ricevi gravajn taskojn kaj frekventi specialan lernejon.

Neniam Nina forgesos la unuan specialan operacion. Estis en oktobro, suna trankvila tago. Neniu supiozis, ke okazos io neatendita. Subite la taĉmento por urĝa reago ricevis sciigon. Armita teroristo eniris grandan ĉefurban vendejon, kie li minacas mortpafi senkulpajn homojn kaj eksplodigi la vendejon. La anoj de la speciala taĉmento ĉirkaŭiris la vendejon kaj ili komencis intertrakti kun la teroristo. Li postulis, ke oni liberigu el la prizono lian amikon, certigu al ambaŭ kirasitan aŭton, per kiu ili povu veturi al la flughaveno kaj de tie ili ekflugu per aviadilo al la Araba Duoninsulo.

La intertraktado kun la teroristo daŭris preskaŭ du horojn senrezulte. La teroristo diris, ke se post horo la kirasita aŭto ne estos antaŭ la vendejo, li komencos mortpafi la homojn en la vendejo. La tempo pasis, sed la teroristo estis necedema. Post horo el la vendejo eliris tridekjara virino kaj kiam ŝi ekstaris ĉe la pordo, la teroristo mortpafis ŝin dorse. La virino falis sur la straton. Post tiu ĉi terura murdo, kiu okazis antaŭ la rigardo de Nina, oni ordonis, ke la teroristo estu murdita.

Nina estis sur la tegmento de najbara al la vendejo konstruaĵo. Ŝi estis kun pafilo kun optika celilo kaj ŝi rigardis la vendejon tra la optika celilo. La teroristo tamen ĉiam estis malproksime de la fenestroj de la vendejo. Oni decidis, ke policano komencu malrapide proksimiĝi al la vendejo. La teroristo vidis la policanon. Por sekundoj la teroristo aperis antaŭ la optika celilo de Nina. Ŝi tuj premis la ĉankroĉilon de la pafilo kaj la teroristo mortis. Tiel la homoj en la vendejo estis savitaj.

Post tio Nina ofte sonĝis koŝmarojn. En la dormo ŝi vidis la junan virinon, mortpafitan sur la strato antaŭ la vendejo. Tuj poste Nina kvazaŭ aŭdis teruran tondron, kiu vekis ŝin. Nina saltis de la lito ŝvita kaj longe ŝi sidis senmova en la malluma ĉambro. Pene Nina denove ekdormis, sed ŝi

sonĝis la kuglon, kiu flugas al la granda fenestro de la vendejo. La kuglo traboras ĝin kaj la teroristo falas kiel forhakita arbo.

Dum tagoj Nina meditis. La teroristo estis samjara kiel ŝi. Kial li devis oferi sian vivon? Kial li pretis murdi senkulpajn homojn? Kial li murdis la junan virinon? Nina tute ne komprenis la fatalismon de tiu ĉi viro. Kiam Nina estis sur la tegmento de la konstruaĵo kontraŭ la vendejo, ŝi observis la teroriston, kiu aspektis ordinara junulo kun iom bruneca vizaĝo kaj nigraj okuloj. En lia rigardo tamen estis decidemo kaj preteco murdi.

Post tiu ĉi unua speciala operacio venis aliaj.

9.

Martin havis bonegan humoron. Ĉi tie, en Ora Bordo la tempo kvazaŭ haltis. Li ĝuis la trankvilecon kaj la senzorgecon. Dum la tagoj li verkis, promenadis, kontempladis la maron. “Kial la homoj ne ĝojas pri la vivo, meditis Martin. Kial oni ĉiam rapidas? Konstante oni strebas al iuj iluzioj, sed ĉio estas tre simpla. Ni devas halti por vidi la matenon, la maron, por eksenti ke ni vivas.”

Martin estis kvardekjara kaj dum la tuta vivo ĝis nun li strebis al celoj, kiuj nun ŝajnis al li sensencaj. Li deziris esti fama, sed nun ĉi tie tio aspektis ridinda. En Ora Bordo, en la komenco de la aŭtuno preskaŭ ne estis homoj. La restadejo dezertis. Ja, neniu ĉi tie konis Martinon. Li estis ombro, kiun neniu rimarkas. Ĉu lia iama amiko Stojko same deziris esti nerimarkebla? Verŝajne tial li ŝajnigis, ke li ne konas Martinon. Martin deziris denove iri al la vilaoj, renkonti Stojkon kaj provi alparoli lin. Certe Stojko estas en iu el la vilaoj, supozis Martin. “Mi trovos lin kaj mi demandos lin kial li ne deziras rekoni min. Kio okazis al li dum tiuj ĉi dudek jaroj? Kial li evitas sian malnovan amikon?”

Martin ne sciis, ke (ĉu?) Stojko estas edziĝinta. “Kie li loĝas nun? – demandis sin Martin. Ĉu li ankoraŭ loĝas en la

urbo Brez? Kial li estas ĉi tie, en la Ora Bordo?” Martin serĉis respondojn al tiuj ĉi demandoj, sed vane.

Nina promenadis ĉe la bordo de la maro kaj ŝi rimarkis Martinon, kiu venis en ŝian direkton. Kiam Martin vidis Ninan, li kare ekridetis.

-Bonan matenon – diris Martin. – Kia agrabla neatendita renkonto.

-Saluton – respondis Nina. – Ĉu vi promenis? Hodiaŭ la vetero estas bonega.

-Jes. Ĉiun tagon mi promenas – respondis Martin. – Al mi tre plaĉas la Ora Bordo. La maro inspiras min. Verŝajne ankaŭ vi promenas?

-Jes. Same al mi plaĉas la maro.

-Mi ŝatus inviti vin trinki kafon – proponis Martin.

-Dankon – akceptis Nina.

Martin ĉirkaŭrigardis. Proksime videblis kafejo “Laguna” kaj ili iris tien. La kafejo estis vasta kaj hela. Martin kaj Nina eksidis ĉe tablo kaj Martin alrigardis ŝin. Nina surhavis ĝinzon, nigran bluzon kaj nigran jakon. La ĝinzo reliefigis la belajn formojn de ŝia korpo. Martin cerbumis kiel diri al ŝi, ke ŝi ravis lin. Li tamen supozis, ke se li dirus tion al Nina, ŝi komencos voĉe ridi. Ja, li estis dek jarojn pli aĝa ol ŝi. Krom tio ili konis unu la alian nur de kelkaj tagoj.

Martin nenion sciis pri Nina. Ŝi diris al li nur sian propran nomon kaj li denove demandis sin kiu ŝi estas, de kie ŝi estas, en kiu urbo ŝi loĝas? Kion ŝi laboras kaj kion ŝi studis? Li bone konsciis, ke li nur imagas, ke inter li kaj Nina estos ia pli proksima rilato. Post kelkaj tagoj li forveturos kaj neniam plu li vidos Ninan. Tamen li ne povis klarigi al si mem kial Nina tiel forte logis lin. Ĝis nun li ne renkontis virinon, kiu tiel allogis lin. Martin estis emocia kaj la emocioj subpremis lian racian rezonadon.

Martin mendis kafojn kaj senalkoholaĵojn. Nina tiel rigardis lin, kvazaŭ ŝi provus diveni pri kio li meditas. Al ŝi

estis agrable, ke ŝi plaĉas al li. Martin estis simpatia viro. Alta, belstatura, li havis densan nigran hararon, en kiu jam videblis blankaj haroj, similaj al brilaj arĝentaj fadenoj. La rigardo de liaj malhelverdaj okuloj estis penetrema, lia nazo – rekta kaj la formo de lia mentono montris, ke li estas ambicia kaj agema viro. Tamen Nina bone konsciis, ke inter ŝi kaj Martin povas esti nur eta flirto, malgraŭ ke en la vivo de Nina ne estis flirtoj. Ŝia laboro estis ligita al multaj viroj, sed inter ŝi kaj ili estis klaraj limoj. Ĉiam Nina subpremis la sentojn. Por la taskoj, kiujn ŝi plenumas, la sentoj estis danĝeraj. Ŝi bone sciis, ke se eĉ por momento la sentoj obsedos ŝin, ŝi pereos. Tial Nina estis atentema kaj ŝi havis fortan disciplinon.

Nun ŝi akceptis la inviton de Martin, ke ili trinku kafon. Ja, li kelkfoje alparolis ŝin kaj se nun ŝi ne akceptas lian inviton, eble li fariĝos pli insista.

-Vi diris al mi, ke via nomo estas Martin Dobrinski – diris Nina. – Kiam mi aŭdis vian nomon, ŝajnis al mi, ke ĝi estas konata, sed mi ne povis tuj rememori de kie. Poste mi rememoris, ke iam mi legis rakonton vian, tamen mi forgesis ĝian titolon kaj mi forgesis kie mi legis ĝin: ĉu en revuo, en ĵurnalo aŭ en interreto.

Nina bone sciis, ke tiuj ĉi ŝiaj vortoj flatos Martinon. Ja, ĉiu verkisto plej ŝatas aŭdi, ke oni legis liajn verkojn. La vortoj de Nina tuj havis efikon. La vizaĝo de Martin ekbrilis. Li kompreneble nenion diris, sed Nina bone vidis, ke por li tio estis agrabla.

-De kiam vi verkas? – demandis ŝi.

-Jam de miaj studentaj jaroj – respondis Martin. – Kiam mi estis studento kaj post la fino de la universitato mi komencis pli serioze verki.

-Unuan fojon mi renkontas verkiston – diris Nina. – Mi devas konfesi, ke mi ne legis multajn librojn. Kiam mi estis lernantino, mi demandis min kial necesas la literaturo.

Martin mire alrigardis ŝin. Neniam li aŭdis tion. La homoj, kiujn li konis, ĉiam antaŭ li fanfaronis, ke ili legis

multajn librojn kaj ili ŝatas literaturon. Nun Nina tute sincere konfesis, ke ŝi ne legis multajn librojn kaj ŝi ne komprenas kial necesas la literaturo. Verŝajne Nina opiniis, ke literaturo estas tute superflua kaj homoj ne bezonas ĝin. Tio iom elrevigis Martinon. Li supozis aŭ li deziris kredi, ke Nina estas emocia kaj ŝi ŝatas legi librojn.

-La literaturo – komencis malrapide Martin – helpas nin pli bone ekkoni nin mem, pli bone ekkoni la mondon, en kiu ni vivas.

-Mi ne komprenas kiel – alrigardis lin Nina iom skeptike.

-Kiam ni legas librojn, ni ekvivas kun la vivo de la literaturaj herooj. Ni ekkonas iliajn pensojn kaj sentojn.

Nina ekridetis. Ŝi ne komprenis la vortojn de Martin.

-Sed ili ne estas vivaj homoj, ili estas literaturaj herooj – provis repliki lin Nina.

-Jes, sed ni konstatas, ke niaj pensoj kaj sentoj similas al la pensoj kaj sentoj de la literaturaj herooj kaj en similaj situacioj ni agas kiel ili – provis klarigi Martin.

-Eble.

-La literaturo igas nin alrigardi al niaj animoj, al niaj travivaĵoj – daŭrigis li.

-Interese. Tamen ĉio en la libroj estas elpenŝaĵo, ĉu ne?

-Ne ĉio – tuj diris Martin. – En miaj rakontoj kaj libroj preskaŭ nenio estas elpenŝaĵo. Mi rakontis tion, kion mi travivis, kion mi vidis, kion mi aŭdis kaj eksciis de alaj homoj.

Martin vidis, ke Nina ne komprenas lin, sed li deziris montri al ŝi, ke literaturo ne estas superflua.

-Nun mi komprenas kial vi alparolis min kaj kial vi scivolos pri mi – ridetis ruzete Nina.

Martin tamen ŝajnis, ke li ne aŭdis ŝin kaj li daŭrigis klarigi:

-Kiam mi verkas, mi nur emfazas iujn momentojn, iujn epizodojn kaj tiel mi influas al la legantoj, mi provokas ilin

pensi kaj mediti. Mia celo estas, ke la legantoj legu kaj rezonu pri tio, kion ili legas.

-Do, estas tre grave rezoni – denove ekridetis ironie Nina.

-Kompreneble. La legantoj demandu sin kial la literaturaj herooj agis tiel, kio igis ilin esti bonaj aŭ malbonaj. Mi deziras, ke la legantoj estu kunaŭtoroj de miaj rakontoj kaj libroj. Kiam ili finlegos mian libron, ili daŭrigu pensi pri ĝi, ili imagu kio okazos al la herooj en estonteco aŭ kiel la libro povus esti daŭrigita.

Martin ekhavis la ambicion konvinki Ninan, ke la homoj devas legi, ke oni ne povas vivi sen la libroj. La libroj riĉigas ilin.

-Do, estas danĝere koni verkiston – konkludis Nina kaj ŝi alrigardis lin. – Eble vi priskribos min en iu via rakonto aŭ en iu romano kaj povas esti, ke vi priskribos min ne pozitive.

-Vi povas esti heroino de iu mia estonta rakonto aŭ romano. Tamen mi ne priskribos vin tia, kia vi estas. Mi uzos nur iujn viajn trajtojn, kiuj plej bone esprimos mian ideon – klarigis Martin.

-Mi jam komprenas kion signifas verki rakonto aŭ romano. Tamen se vi uzos iujn miajn trajtojn, ĉu eblas, ke miaj konatoj aŭ amikoj, kiuj tralegos la libron, hazarde rekonu min? –demandis Nina.

-Ne eblas. La legantoj tute ne supozos, ke vi estas heroino de la rakonto aŭ de la romano. La priskribo de viaj vizaĝo, okuloj estos tute alia.

-Do, mi pravas. Vi, verkistoj, ĉion elpensas. En viaj verkoj estas tre malmulte da vero.

-Pli gravas, ke la verkisto kreas novan mondon kaj tio ne estas elpensajo.

Nina eksilentis, eble ŝi meditis pri la vortoj de Martin. Post nelonge ŝi alrigardis lin kaj demandis:

-Mi vidis, ke vi estas sola ĉi tie. Ĉu vi havas familion?

-Antaŭ kelkaj jaroj mi eksedziĝis. Mi havas filinon, kiu loĝas kun la patrino en la urbo Svila.

-Kaj kie vi loĝas?

-En la ĉefurbo. Kaj vi? – Martin tuj demandis ŝin.

-Mi estas fraŭlino kaj mi loĝas en la urbo Planinec – mensogis Nina.

-Ĝi troviĝas tre malproksime de ĉi tie – rimarkis Martin.

-Jes.

Nina ne estis certa ĉu Martin kredus al ŝiaj vortoj. Li opiniis, ke ŝi estas ordinara provinca junulino. Martin nur demandis sin kial ŝi ne estas edziniĝinta. Ja, Nina estis bela kaj ĉarma. Eble ŝi havis malfeliĉan amon, supozis Martin. Eble tial ŝi estas sola.

-Al mi estis tre agrable, ke ni kafumis – diris Nina.

-Mi ĝojas, ke ni havis eblecon iom babili – aldonis Martin.

-Ĝis revido.

Nina ekstaris kaj ekiris al la pordo. Martin restis kaj vokis la kelnerinon por pagi.

11.

La lastaj dudek jaroj, kiujn Stojko pasigis eksterlande, estis streĉitaj. Li precize plenumis spionajn taskojn ĝis la momento, kiam oni senvualigis lin. Tie, en la malproksima lando, Stojko sukcesis varbi inĝenieron, kiu laboris en armea industrio. Li estis pasia hazardludanto kaj Stojko malavare donis al li monon. Rekompence la inĝeniero donis al Stojko sekretajn armeajn teknologiojn.

Iun tagon tamen, kiam Stojko iris sur la strato antaŭ li ekstaris du viroj. En nur sekundoj ili kaptis kaj enigis lin en aŭton, kiu rapide ekveturis. Post duonhora veturado la aŭto haltis antaŭ pluretaĝa konstruaĵo en malproksima parto de la urbo. Per lifto ili supreniris al unu el la altaj etaĝoj. Oni enigis

Stojkon en ne tre grandan ĉambron kaj lasis lin sola tie. La ĉambro ne havis fenestrojn kaj en ĝi estis nur tablo kaj du seĝoj. Stojko sidis ĉe la tablo kaj atendis. Li komprenis kio okazis. Stojko streĉe meditis kaj demandis sin kiel oni eksciis, ke li estas spiono. Ĉu la inĝeniero same ne estis spiono, sed ilia? Aŭ eble oni sukcesis trovi aliajn spionojn, kiuj denunciis Stojkon. Nun Stojko devis iel kompreni kion oni scias pri li kaj pri lia spiona agado.

Stojko sidis sola en la ĉambro pli ol unu horon. Li certis, ke en la ĉambro estas kamerao kaj oni atente observas lin. Tamen Stojko spertis esti trankvila eĉ dum la plej malfacilaj momentoj. Li ne montris, ke li estas embarasita. Nur sur lia vizaĝo videblis miro, kvazaŭ li ne komprenis kial li estas ĉi tie.

Post horo kaj duono en la ĉambron eniris mezaĝa viro, alta, magra, vestita en eleganta grizkolora kostumo kun flava ĉemizo kaj blua kravato. Li havis blankan hararon kaj venenverdajn okulojn kun akra penetrema rigardo. La viro eksidis ĉe la tablo kaj orgojle alrigardis Stojkon.

-Bonan venon, sinjoro Peter Huber – diris la viro.

Tio ĉi estis la nomo de Stojko antaŭ lia alveno en tiun ĉi landon, sed ĉi tie laŭ la oficiala persona legitimilo kaj laŭ la dokumento por aŭtostirado Stojko nomiĝis Steven Dean.

-Vi eraras – trankvile diris Stojko. – Mi estas Steven Dean.

-Superfluas mensogi – iom nerveze diris la viro. – Ni bone scias, ke vi estas Peter Huber kaj vi ne estas komercisto de komputiloj, sed spiono.

-Mi estas Steven Dean kaj mi estas komercisto de komputiloj. Mi ne estas spiono. Mi naskiĝis ĉi tie, mi loĝas ĉi tie kaj jam de pluraj jaroj mi vendas komputilojn.

Kiam Stojko kaj Mira venis en tiun ĉi landon oni donis al ili falsajn legitimilojn. Laŭ la nova legitimilo Stojko estis Steven Dean, kiu naskiĝis en malgranda suda urbo de la lando, kie li finis kolezion kaj poste li translokiĝis en la ĉefurbon kaj

ĉi tie li iĝis komercisto de komputiloj. En la ĉefurbo Stojko havis vendejon, en kiu li vendis komputilojn. Mira ricevis la nomon Elen. Ŝi same naskiĝis en suda urbeto. Elen kaj Steven konatiĝis dum amuzvespero kaj poste ili geedziĝis.

-Estu prudenta. Ne estu obstina kaj ne provu trompi nin. Ni scias ĉion pri vi. Ni havas sufiĉe da pruvoj kaj tre facile ni povas kondamni vin. Ĝis via morto vi estos en nia malliberejo – minace diris la viro.

Tamen Stojko aŭskultis lin trankvile. Estis klare, ke la viro ne blufas. Oni vere havis detalajn informojn pri li kaj pri lia agado, sed Stojko denove provis nei ĉion. La nekonata viro ne lasis lin paroli.

-Mi deziras proponi al vi ion – diris li. –Ni atente observis vin kaj ni konstatis, ke vi estas bona kaj sperta spiono. Domaĝe estus se vi pasigus vian vivon en malliberejo. Pli bone estus se vi daŭrigus spioni.

Por momento la viro eksilentis kaj fiksrigardis Stojkon. "Kion li intencas?" – demandis sin Stojko, kvankam li jam divenis la proponon de la viro.

-Mi proponas al vi spioni por ni – diris malrapide kaj klare la viro. – Vi daŭrigos agi tiel kiel ĝis nun, tamen vi estos nia spiono. Vi sendos al viaj samlandanoj falsajn informojn kaj ili eĉ ne supozos, ke vi fariĝis nia spiono. Ni certigos al vi la necesajn kondiĉojn por via agado. Kaj kompreneble ni bone pagos al vi.

-Mi devas pripensi – diris Stojko.

-Vi devas pripensi nun ĉi tie. Se vi ne akceptos nian proponon, vi ne eliros el tiu ĉi ĉambro kaj ni akuzos vin pri spionado. Tuj komenciĝos juĝproceso. Se vi akceptos, vi trankvile foriros kaj neniu ekscios, ke vi estis arestita.

-Mi akceptas la proponon – diris Stojko.

-Nun sekvos eta formalajo. Vi subskribos deklaron kaj vi estos libera. Nia agento renkontos vin kaj li instrukcios vin kiel agi.

Iun posttagmezon en la vendejon de Stojko venis juna viro. En la unua momento Stojko opiniis, ke la junulo interesiĝas pri la komputiloj kaj ŝatus aĉeti komputilon. Tamen la junulo proksimiĝis al Stojko kaj salutis lin:

-Bonan tagon, sinjoro Huber.

Aŭdante tiujn ĉi vortojn, Stojko tuj komprenis kiu estas tiu ĉi viro kaj kial li venas en la vendejon. Stojko same diris:

-Bonan tagon.

La viro, kiu estis altstatura kun brunaj okuloj kun tranĉa rigardo kaj vizaĝo, simila al la vizaĝoj de boksistoj, atente rigardis la vendejon kaj demandis:

-Kie ni povus trankvile konversacii?

-Ĉi tie – respondis Stojko – ja, nun en la vendejo estas neniu alia.

-Tamen ĉi tie mi vidas kameraojn – rimarkis la viro. – Ni konversaciu ie, kie ne estas kameraoj.

-Bone – konsentis Stojko. – Mi fermos la vendejon kaj ni iros en la internan ĉambron.

Stojko metis sur la pordon la ŝildon “Fermita” kaj ili iris en la internan ĉambron de la vendejo. Ambaŭ eksidis ĉe la tablo. La viro denove atente trarigardis la ĉambron kaj kiam li konvinkiĝis, ke ĉi tie ne estas kameraoj, li komencis paroli. Li detale klarigis al Stojko kiel li devas agi, kiel li devas spioni kaj kiajn informojn li liveru.

Unue Stojko devis doni la nomojn de siaj samlandanoj, kiuj estas spionoj ĉi tie. Poste li priskribu kiaj estas iliaj taskoj, kiel ili agas kaj kiel ili sendas la sekretajn informojn, kiujn ili kolektas.

Kiam la viro detale priskribis la estontajn taskojn, kiujn Stojko devos plenumi, li foriris sen diri sian nomon. Li nur aldonis:

-Baldaŭ mi denove venos. Estu preta.

De tiu ĉi tago Stojko komencis plenumi la taskojn, kiujn donis al li ambaŭ landoj. Li bone konsciis, ke tio estas danĝera, tamen li ne havis alian eblecon. Unue Stojko denunciis

sian amikon Jonas. Stojko kaj Jonas estis kursanoj en la Spiona Altlernejo. Jonas loĝis en alia urbo. De tempo al tempo Stojko kaj li renkontiĝis kaj interŝanĝis informojn.

Dum tuta jaro Stojko agis kiel duobla spiono, sed li timis, ke baldaŭ liaj ĉefoj ekscios tion kaj li estos likvidita. Post longa hezito Stojko decidis sciigi la ĉefojn en sia lando, ke li estas en danĝero kaj li timas, ke oni baldaŭ kompromitos lin. El la Centralo oni tuj ordonis al Stojko forlasi la landon kaj reveni.

Estis pluva aŭgusta tago. Posttagmeze Stojko kaj Mira eliris el la domo, kie ili loĝis. Ili ne ekveturis per la aŭto, ĉar ili sciis, ke oni observas ilin, sed tra la najbara korto ili iris piede al la malantaŭa strato. La torenta pluvo helpis ilin. Stojko kaj Mira ne portis sakojn. Tre rapide ili proksimiĝis al la stacio de la subtera trajno, per kiu ili forveturis. Poste ili enbusiĝis. Poste preskaŭ unu kilometron ili piediris kaj tiel ili sukcesis iri al sialanda ambasadorejo.

Stojko kaj Mira eniris ĝin kaj diris al la oficistoj kial ili venis. La ambasadoro tuj sendis sekretan mesaĝon al la Spiona Centralo, de kie oni ordonis al la ambasadoro organizi la veturadon de Stojko kaj Mira al la hejmlando. La ambasadoro, tridekjara viro, brunhara kun nigraj okuloj, tre agema, bone konis la spionan agadon kaj diris al ili:

-Dum kelkaj tagoj vi restos en la ambasadorejo. Poste vi veturos aviadile al najbara lando kaj de tie vi revenos en la patrolandon.

La tagoj, kiujn ili pasigis en la ambasadorejo, ŝajnis al Stojko tre longaj. Oni donis al Mira kaj al Stojko falsajn pasportojn kun novaj nomoj kaj kaŝe ili veturis al alia urbo. De tie per aviadilo ili flugis al najbara lando, kie, sur la flughaveno, atendis ilin oficisto de la ambasadorejo tie. Du tagojn ili restis en tiu ĉi lando, denove ili ricevis pasportojn kaj ekflugis al la patrolando.

Kiam ili revenis neniu devis scii pri ili. Neniu devis scii kiuj ili estas, de kie ili venas kaj kion ili faris eksterlande. Tuj

post la alveno oni veturigis ilin al Ora Bordo kaj diris, ke dum iom da tempo ili devas esti en tiu ĉi vilao. Poste oni sciigos kion ili devas fari kaj kiaj estos iliaj novaj taskoj.

Stojko tamen maltrankviliĝis, ke en la Spiona Centralo oni jam eksciis, ke li estis duobla spiono, ke li denunciis Jonason kaj donis multe da sekretaj informoj al la alilanda spiona servo.

Stojko kaj Mira malofte iris el la vilao kaj nur de tempo al tempo ili estis ĉe la mara bordo. Stojko preferis promenadi en la korto de la vilao. Post la renkonto de Martin li tute ne iris sur la straton. Matene Stojko iom promenis en la korto, kie li kutimis sidi sur benko antaŭ florbedo kaj rigardi la florojn: krizantemojn, hortensiojn, daliojn.

Jam estas aŭtuno kaj baldaŭ venos la vintro, meditis Stojko. Tiuj ĉi belaj floroj velkos. Estos prujno kaj ili malaperos kiel ĉio, kio malaperas por eterne. La lastaj flavaj folioj de la arboj falos kaj la nudaj branĉoj similos al skeletoj. Neĝo kovros ĉion kaj ĉi tie ekestos blanka silento. Nur de malproksime alflugos la bruoj de la ondoj. Vintre la maro furiozos. Sur ĝi kuŝos pezaj grizkoloraj nuboj. Ĉio estos griza. Ora Bordo dormos. En la hoteloj estos neniuj. Sur la ĉefa aleo ne videblos homoj. Sur la dezerta plaĝo promenados nur la laroj, la solaj dommastroj de Ora Bordo.

Stojko maltrankvile atendis informon de la Spiona Centralo. Li opiniis, ke oni venos per aŭto kaj veturigis lin kaj Miran ien. Poste oni donos al ili novajn taskojn aŭ oni sendos ilin al iu lando. Stojko estis preta tuj iri tien, kien oni ordonos. Ja, lia vivo delonge ne estis lia. Aliaj direktis lian vivon. Post la fino de la Spiona Altlernejo Stojko sciis, ke li ne plu planos sian vivon. Nun aliaj decidis lian sorton. Stojko tamen neniam vidis ilin kaj li ne sciis kiuj ili estas. De distanco ili direktis liajn agojn. Ili zorge observis la mondan politikon, la politikajn eventojn kaj ili decidis kien kiun sendi. Stojko ĉiam pretis ekveturi, malgraŭ ke li bone sciis, ke tie, kien li iros, atendos lin surprizoj kaj malfacilaĵoj.

Mira kaj Stojko tagmanĝis kaj Mira demandis lin:

-Ŝajnas al mi, ke de kelkaj tagoj vi estas maltrankvila.

Kial?

-Jam preskaŭ monaton ni estas ĉi tie – ekparolis Stojko, - sed neniu el la Centralo telefonas, nek informas nin pri kio okazos kaj tio maltrankviligas min.

-Ili nepre telefonos aŭ ili venos per aŭto kaj veturigis nin ien – provis trankviligi lin Mira.

Hodiaŭ Mira kuiris bongustan terpomsupon. Ŝi estis bonega kuiristino. Ĉie, kie ili estis en la mondo, Mira kuiris bongustajn manĝaĵojn. Hodiaŭ por tagmanĝo ŝi kuiris supon kaj farĉbuletojn, kies apetitvekaodoro plenis la manĝejon. Estis salato el tomatoj kaj kukumoj. Por deserto – vinberoj.

Stojko alrigardis Miran. Ĉiam, kiam li rigardis ŝin, li demandis sin ĉu en la mondo estas alia virino kun tiaj belaj sukcenkoloraj okuloj. Mira havis neordinarajn okulojn. Ŝi mem estis neordinara edzino. Mira helpis Stojkon, ŝi bone komprenis lin, liajn danĝerajn okupojn kaj ŝi entute dediĉis sian vivon al Stojko. Fojfoje Stojko riproĉis sin, ke li riskas ŝian vivon. “Mi ne devis edziĝi. Ŝia vivo same estas ege streĉa.” – meditis Stojko.

Dum la jaroj Mira neniam plendis, neniam diris ke ŝi timas. Ili kune agis kaj ŝi estis lia plej bona helpantino. Stojko ne diris al Mira, ke li fariĝis duobla spiono, ke li denunciis Jonason. Li ne deziris maltrankviligi ŝin. Pli bone estas se Mira ne scias tion. Kiam ili devis forkuri kaj kaŝi sin en la ambasadorejo, Stojko diris al Mira, ke verŝajne oni denunciis lin.

-Ĉi tie, en la vilao, la enuo jam turmentas min – diris Stojko.

-Estu trankvila – alrigardis lin Mira. – Oni baldaŭ venos.

“Eble en la Spiona Centralo oni jam eksciis, ke mi estas duobla spiono – meditis maltrankvile Stojko.” Bedaŭrinde al

neniu li povis klarigi kial li konsentis esti duobla spiono. Ne pro mono li akceptis tion. Li tute ne havis alian eblecon. Li aŭ devis akcepti la proponon, aŭ eniri la fremdlandan malliberejon.

Stojko manĝis silente kaj malrapide. Kvardekjara li estis forta kun korpo de atleto. Ja, li regule sportis, naĝis. Li havis fortajn ŝultrojn kaj brakmuskolojn. Lia frunto estis alta, lia hararo – blonda kaj liaj okuloj - bluaj kiel la maro. Mira ne nur amis lin, sed ŝi fieris pri li. Al ŝi plaĉis, ke Stojko estas kuraĝa kaj li plenumas riskajn taskojn. Mira bone sciis, ke ne ĉiuj povas plenumi tiajn taskojn. Necesis talento, sperto, kuraĝo.

-La manĝaĵo estas tre bongusta – diris Stojko.

Li deziris iel danki al Mira pro ŝia sindediĉo kaj preteco helpi lin, esti ĉiam ĉe li, apogi lin.

-Dankon – diris Mira. – Ĉi tie mi ne havas alian okupon. Mi devas nur kuiri. Ĉu vi deziras, ke post la tagmanĝo ni iru al la maro promenadi? La vetero estas tre bela. Ni rigardos la maron. La rigardado de la ondoj trankviligas.

-Mi preferas resti ĉi tie – diris Stojko. – Se vi deziras, iru. Mi provos iom dormi. Post tagmanĝo estas agrable dormi.

-Bone. Mi iros promenadi – diris Mira.

Stojko ekstaris kaj iris al la dua etaĝo de la vilao.

12.

Nun en la restoracio de la hotelo “Diana” estis nur maljunuloj. Nina alrigardis Martin, kiu manĝis sola ĉe la tablo kaj ŝi diris al si: “Li vagas tien-reen, kontempladas la maron kaj verŝajne li verkas. Ĉu tia estas la vivo de verkistoj? Ili sidas en ĉambro ĉe skribotablo kaj dum horoj ili verkas. Kiel ili eltenas tion?”

Nina eĉ horon ne povis sidi senmova. Por ŝi la verkado estis tute nekomprenebla. Martin diris al ŝi, ke literaturo helpas la homojn pli bone ekkoni sin mem kaj la mondon. Ankaŭ tion

Nina ne komprenis. Kiel eblas ekkoni sin mem, legante librojn, legante pri nekonataj homoj, legante fremdajn pensojn. Ja, la mondon oni povas ekkoni veturante en diversaj landoj. Feliĉe Nina ofte veturis. Ŝia laboro estis ligita al vojaĝado.

Antaŭ ol veni ĉi tien Nina estis en Sud-Afriko, kie kaŝis sin danĝera murdinto, kies nomo estis Roko, unu el la plej famaj ŝtelistoj, kiu spertis malŝlosi ĉiuspecan pordon, eniri kaj prirabi loĝejojn.

Roko eksciis, ke familio, kiu loĝas en unu el la elegantaj ĉefurbaj kvartaloj havas valorajn juvelojn hejme. La edzo posedis juvelvendejon. La domo estis granda, luksa kaj bone sekurigita per speciala instalaĵo kaj kameraoj, sed iun nokton Roko sukcesis eniri ĝin. Li vekis la familianojn de la juvelisto, liajn edzinon kaj filinon. Roko ligis ilin per ŝnuroj kaj li komencis demandi ilin, kie estas la juveloj. La juvelisto asertis, ke en la domo ne estas juveloj, tamen Roko sciis, ke li gardas la juvelojn en la domo. Roko turmentis la filinon. La juvelisto ne eltenis rigardi la turmentojn kaj aŭdi la terurajn kriojn de la filino kaj li diris al Roko kie estas kaŝitaj la juveloj.

Roko prenis ilin, sed antaŭ foriri li mortpafis la juveliston kaj liajn edzinon kaj filinon.

Dum kelkaj tagoj neniu eksciis, ke la familio de la juvelisto estis mortpafita. Kiam oni eksciis pri la tragedio, la polico komencis serĉi la murdinton. Laŭ la spuroj la policanoj supozis, ke Roko estas la murdinto, sed Roko sukcesis malaperi antaŭ ol la polico trovis lin.

Dum longa tempo la Internacia Polico serĉis lin. Finfine oni konstatis, ke Roko kaŝas sin en Sud-Afriko. Kun tiu ĉi lando ne ekzistis diplomaciaj rilatoj. Tial speciala skipo devis iri en Sud-Afrikon, kapti Rokon kaj reveturigi lin en la landon. En la skipo estis Nina. La skipo venis en Cape Town, kie kaŝis sin Roko. Ili komencis observi lin. Ĉiuvespere Roko iris en faman noktan amuzejon. La anoj de la skipo decidis, ke Nina allogu lin.

Nina bone sciis, kiel aspektas Roko. Ŝi vidis lian foton kaj facile ŝi povis rekoni lin. Roko estis alta, tridekjara. Vizaĝe li aspektis pli juna. La rigardo de liaj bluaj okuloj estis saĝa. Neniu supozis, ke li estas sperta rabisto kaj murdinto. Ĉiuj, kiuj vidis lin opiniis, ke li estas inteligenta junulo.

Nina, vestita elegante, eniris la noktan amuzejon kaj ŝi sidis ĉe la tablo, ĉe kiu sidis Roko. Li supozis, ke Nina estas publikulino. Ŝia beleco blindigis lin.

-Ĉu al vi plaĉas tiu ĉi amuzejo? – demandis ŝin Roko angle.

-Mi unuan fojon estas ĉi tie – respondis Nina.

-Ĉu vi loĝas en Cape Town?

-Ne.

-De kie vi estas? – scivolis Roko.

-De Nederlando – respondis Nina.

-Ĉu?

-Jes. Mi ekskursas. Mi volis vidi Sud-Afrikon.

Roko jam estis iom ebria kaj li esperis, ke li pasigos agrablan nokton kun tiu ĉi belulino. Li havis sperton kun similaj virinoj.

-Mi ŝatus regali vin. Kion vi bonvolos? – demandis li.

-Mi preferas koktelon “Martini” – diris Nina.

Ŝi bonege plenumis la rolon de publikulino.

Roko vokis la kelneron.

-Ĉu plaĉas al vi Cape Town? – demandis li.

-Mi ankoraŭ ne bone trarigardis la urbon – diris Nina.

-Mi povus montri al vi iujn vidindaĵojn – proponis

Roko.

-Mi estos tre dankema al vi - ekridetis Nina. – Kaj vi?

Ĉu vi loĝas ĉi tie? – demandis ŝi.

-Mi estas polo. Mi naskiĝis en Varsovio, sed de dek jaroj mi estas ĉi tie – respondis li.

-Kion vi laboras?

-Mi estas komercisto.

Kiam fariĝis noktomezo, Roko demandis Nina:

-En kiu hotelo vi estas?
 -En la hotelo “Suda Stelo” – respondis ŝi.
 -Mi akompanos vin. Nokte Cape Town estas danĝera urbo – diris Roko.
 -Tute ne necesas – ekridetis Nina. – Mi veturos per taksio.
 -Estus al mi agrable – insistis li.
 -Dankon. Vi estas tre afabla.
 Roko vokis la kelneron, pagis kaj li kaj Nina eliris el la nokta amuzejo.
 -Ni iom promenadu – proponis Nina. – La nokto estas belega kaj la hotelo estas proksime.
 -Bonega ideo – diris Roko.
 Ambaŭ ekiris unu ĉe la alia kaj kiam ili estis ĉe la angulo de la strato, ilin ĉirkaŭis la kolegoj de Nina, kiuj kaptis Rokon kaj enigis lin en aŭton. Tiel Roko estis revenigita en la landon kaj kondamnita pro la teruraj murdoj, kiujn li faris.

13.

Martin sidis ĉe la skribotablo en la hotela ĉambro kaj verkis. Kiel li supozis, ĉi tie, en Ora Bordo, lia emo verki vekigis. Li havis fortan inspiron kaj la verkado estis glata. Tio ĝojigis lin. La herooj de la romano agis, diskutis, amis, hezitis kaj Martin kvazaŭ ne kreis ilin, sed atente, scivole li observis ilin. Ŝajnis al li, ke li estas muta atestanto al ĉio, kio okazas en la romano. La verkado sorĉis Martinon. Ĉi tie, en Ora Bordo, li venkis la obstaklojn, kiuj estis en la komenco de la romanverkado. Tiam la herooj similis al ombroj, sed nun ili estis vivaj kaj kvazaŭ ili mem agas.

Martin ĉesis verki kaj rigardis al la fenestro. Ekstere jam mallumis. Martin decidis eliri kaj nokte promenadi ĉe la

maro. Estis iom malvarme. Li surmetis jakon, estingis la lampon en la ĉambro kaj eliris.

Antaŭ la hotelo estis neniuj. Regis silento kaj alflugis nur la monotona lirlo de la ondoj. Nun la maro estis trankvila. La ondoj kviete plaŭdis. La luno kiel grandega arĝenta pleto pendis super la maro kaj pro ĝia pala lumo ĉio aspektis mistera kaj enigma.

Martin staris senmova sur la bordo. Li decidis vadi en la ondoj kaj deprenis la ŝuojn, la ŝtrumpojn, volvis la pantalonrandojn kaj li ekpaŝis al la ondoj, kiuj tiklis liajn nudajn piedojn. Li iris kvindek metrojn. Sur la plaĝo li rimarkis kuŝseĝon, sur kiu sidis gejunuloj. Ili pasie kisis unu la alian. “Geamantoj, diris al si Martin. Estas bone esti juna, sidi nokte ĉe la maro kaj revii pri la belega estonteco.”

Unu horon Martin iris. Li tre malproksimiĝis de la restadejo. Ie, malantaŭ li, estis la hoteloj kaj iliaj lumoj. La nokto volvis lin, kvazaŭ li estus sur dezerta insulo. “Ĉu mi ne restu ĉi tie, sur la strando, dum la tuta nokto, diris al si Martin. Matene mi renkontos ĉi tie la sunleviĝon. Mi vidos la momenton, kiam la suno aperas, kiam ĝi elnaĝas el la maro. Tiam la horizonto fariĝas ruĝa kvazaŭ ĝi ekflamus. La ondoj ekbrilas kaj ekestas la taga lumo. Ĉiu nova tago estas miraklo.”

Martin eksidis sur la sablo. Jam kelkajn tagojn li estis ĉi tie, en Ora Bordo. Li venis por daŭrigi la verkadon de la romano. Ĉi tie li deziris forgesi la ĉiutagajn zorgojn, li deziris liberigi sin de la malagrablaj pensoj, kiuj ofte atakis lin kiel rabaj birdoj.

Jam dek jarojn Martin vivis sola, tamen li eĉ por momento ne ĉesis pensi pri sia filino, Desislava. Ŝi loĝis malproksime de li, en la malgranda provinca urbo Svila. Kiel ŝi fartas? Kiel ŝi vivas? Martin regule sendis al ŝi monon, tamen tre malofte li vidis ŝin. Nur somere dum du semajnoj ili estis kune. Desislava estis bona lernantino. Martin deziris esti pli proksime al ŝi. Li deziris, ke Desislava konfesu al li siajn pensojn, emociojn. Martin pretis ĉiam helpi ŝin, sed Desislava

estis silentema, malmulte ŝi parolis kaj tio maltrankviligis Martinon. Kiam li demandis ion, ŝi kutime respondis nur unuvorte kaj tuj poste eksilentis. Martin provis kompreni ŝin, li provis diveni kion ŝi pensas, sed vane. Martin estis maltrankvila, ke ambaŭ pli kaj pli malproksimiĝas unu de la alia.

Martin bone sciis, ke familia vivo ekzistas dank' al la kompromisoj. Tamen nek li, nek Irina estis inklinaj al kompromisoj. Post la eksedziĝo Martin esperis, ke li konatiĝos kun virino, kiu emus kompreni lin kaj ambaŭ havus komunajn interesojn, sed li ne renkontis tian virinon. Eble tia virino ne ekzistas aŭ eble iam ie li renkontos tian virinon.

Ĉi tie, en Ora Bordo, li renkontis Ninan. Ŝi plaĉis al li. Nina estis alloga, sed kiam li konversaciis kun ŝi, li konstatis, ke Nina same ne estas la virino pri kiu li revas. Io enigma estas en ŝi. Kiu ŝi estas? Kial ŝi venas al la Ora Bordo? Iu interna voĉo flustris al Martin, ke malantaŭ la kara rideto de Nina estas io, kion li ne povas kompreni. Martin eĉ komencis dubi ĉu ŝia vera nomo estas Nina. Sed ĉu gravas kio estas ŝia vera nomo? Baldaŭ li forveturos kaj neniam plu li vidos Ninan. Li forgesos ŝin. Li forgesos la tagojn, kiujn li pasigis ĉi tie.

Estis la dua horo post noktomezo. La vento plifortiĝis. Martin surmetis la ŝtrumpojn, la ŝuojn, ekstaris kaj ekiris al la hotelo. Li proksimiĝis al la centra aleo de la restadejo. Irante Martin vidis la hotelon “Neptun”, en kiu estis nokta amuzejo kaj li eniris ĝin.

En la vasta duonlumigita ejo estis tabakfuma nebulo kaj bruo de multaj voĉoj. Estis scenejo, sur kiu ludis orkestro kaj kantis juna bela kantistino, vestita en tre mallonga arĝentbrila robo. Sub la lumo de la lumĵetiloj ŝiaj nudaj ŝultroj brilis alabastre.

Martin sidis ĉe tablo kaj mendis vodkon kaj tomatan sukon. Li rigardis la kantistinon. Li ne memoris kiam lastfoje li estis en simila danctrinkejo. Antaŭe li ofte veturis eksterlanden. Foje li estis en danctrinkejo en Parizo – aŭ eble estis en Romo,

li ne memoris. Martin malrapide trinkis la vodkon kaj li iom hezitis, ĉu li mendu ankoraŭ unu vodkon. Al li proksimiĝis junulino, eble dudekjara, vestita en verda robo same tiel mallonga kiel la robo de la kantistino. Ŝi havis longan hararon kaj okulojn, kiuj similis al fiŝokuloj.

-Sinjoro, ĉu vi estas sola? – afable demandis la junulino.

-Jes – respondis Martin.

-Ĉu vi deziras, ke mi estu kun vi ĉi-nokte?

-Ne, dankon – diris Martin.

La junulino ekridetis kaj foriris. Ŝi havis allogan irmanieron kaj ŝiaj longaj kruroj estis perfektaj. Martin rezignis trinki duan vodkon. Li pagis kaj ekstaris de la tablo por foriri.

Ekstere pluvis. Antaŭ horo sur la ĉielo estis steloj, sed nun - nuboj kaj pluvis. La vento alportis la nubojn. La pluvo ne estis forta, pluvetis. “La aŭtuno venis ĉi tien, diris Martin. Baldaŭ komenciĝos ĉiutage pluvi. Estos nebuloj. Iĝos malvarme. Kiel ĉio, ankaŭ la somero havos finon. Finiĝos la varmetaj tagoj. “

Jam estis tempo, ke Martin forlasu Oran Bordon. La vetero ne plu estos bona por promenadoj kaj Martin decidis forveturi.

Kiam li revenis en la hotelon, tagiĝis kaj li komencis prepari sian valizon por la ekveturo. Li metis en ĝin la manuskripton de la romano, li prenis la porteblan komputilon, bone li trarigardis la hotelan ĉambron kaj eliris.

14.

La aŭtobuso veturis supren sur ne tre granda monteto. Baldaŭ ĝi venos en la maran urbon. Martin sidis en ĝi kaj pense adiaŭis la maron. Ĉi-jare ne plu li vidis la maron. Post kelkaj horoj li estos en la ĉefurbo kaj liaj ĉiutagaj zorgoj denove okupos lin. Martin tre kontentis, ke li pasigis kelkajn tagojn en Ora Bordo. Tie li ne nur bone ripozis, sed en la silenta hotela

ĉambro li trankvile daŭrigis la verkadon de la romano. En Ora Bordo li havis la bonegan eblecon verki, promenadi, ĝui la agrablan septembran veteron. Martin daŭre pensis pri Nina. “Ĉu iam mi denove vidos ŝin, demandis sin li. Ja, dum la vivo okazas neatenditaj renkontoj.”

Martin deziris dum pli longa tempo memori ŝin, ŝiajn vizaĝon, okulojn, hararon, ŝian irmanieron, similan al irmaniero de kapreolo. Eble iam Nina estos la heroino de iu lia estonta romano.

La aŭtobuso venis en la maran urbon. Martin descendis kaj ekiris al la stacidomo. En la atendejo de la stacidomo li rigardis la horaron de la vagonaroj. La vagonaro al la ĉefurbo ekveturos je la unua horo posttagmeze kaj Martin decidis iom promenadi en la urbo. Li iris al la urbocentro. La ĉefstrato gvidis al la teatra konstruaĵo, bela kaj impona. Antaŭ la enirejo de la teatro estis granda afiŝo. Ĉi-vespere oni prezentos “Hamleton”. Martin tralegis la nomojn de la aktoroj. Inter ili estis kelkaj famaj homoj, kiuj ofte ludis en diversaj filmoj. Martin bedaŭris, ke li ne povas resti ĉi-vespere en la urbo por spekti tiun ĉi teatraĵon.

La modernaj luksaj vendejoj sur la ĉefa strato estis preskaŭ malplenaj. Regis trankvilo ne tre kutima por granda urbo. Somere ĉi tie tumultis homoj: turistoj, fremdlandanoj, somerumantoj... Martin preterpasis la artgalerion, duetaĝan ruĝkoloran konstruaĵon en vasta korto kun fera barilo. De la artgalerio komenciĝis eta strato al la ĉemara parko. Martin ekiris al la parko. Nun la parko aspektis trista. La arboj jam estis nudaj, sen folioj. Flavaj, brunaj folioj kovris la aleojn. Martin eksidis sur benkon kaj ekrigardis la maron. Malproksime videblis granda ŝipo. Ĝi verŝajne estis fiŝkaptista ŝipo, kiu atendis eniri la havenon. La mara parko troviĝis sur monteto kaj malsupre estis la strando, vasta kaj senhoma. Dekstre de la strando videblis la haveno. Ĝi estis la plej granda haveno en la lando kaj nun tie staris kelkaj transoceanaj ŝipoj.

De kie ili venis kaj kien ili veturos, demandis sin Martin. La maro similis al grandega blua pordo al la vasta mondo.

Martin longe sidis sur la benko, rigardante al la horizonto. Poste li ekiris al la stacidomo. Ĉe la strato, sur kiun li iris, estis arkeologiaj fosaĵoj. Ĉi tie estis la iamaj famaj romiaj banejoj de la dua jarcento post Jesuo Kristo. "Kiom da gentoj kaj popoloj estis ĉi tie dum la jarcentoj?" – meditis Martin.

Jam proksimiĝis la tempo por la ekveturo de la vagonaro. Li iris en la stacidomon, eniris la vagonaron, kaj sidis ĉe la fenestro en kupeo. Post dek minutoj la vagonaro malrapide ekveturis, forlasante la maran urbon.

Martin neniam eksciis, ke lia iama amiko kaj kunstudento Stojko estis spiono, nek ke Nina estis ano de sekreta servo.

Sofio, la 11-an de novembro 2019

NE FORGESU MIAN VOĈON

novelo, originale verkita en Esperanto

1.

Pluvetis. La malvarmaj pluvgutoj rosigis la vizaĝon kaj hararon de Veselin. Li iris hejmen. Estis la sepa horo vespere kaj la urbo dezertis. La aŭtuna vento kvazaŭ forpelis la homojn el la stratoj. Veselin trapasis la larĝan straton “Rodopo”. “Baldaŭ mi estos hejme, meditis li, en mia eta loĝejo. Mi sidos antaŭ la televidilo sola. Estas vendrede vespere. Oni kutime iras en restoraciojn aŭ la amikaj familioj gastas unu al alia.”

Veselin estis laca kaj li ne havis bonhumoron. Antaŭ ol malŝlosi la pordon de la loĝejo li decidis: “Mi ekveturos al la urbo Serda. Se mi estus ĉi tie sola sabate kaj dimanĉe, mi enuus.”. Li malfermis la pordon kaj eniris en la malluman loĝejon. En la vestiblo estis vestohokaro, murspegulo kaj vesteja tabuleto. Dekstre estis la pordo al la manĝejo kaj maldekstre – al la dormoĉambro. Veselin eniris la dormoĉambron. Li malfermis la vestoŝrankon, prenis grandan sakon kaj metis en ĝin ĉemizon, piĝamon, ŝtrumpojn. Li estis preta ekveturi.

La telefonaparato staris sur la eta komodo ĉe la lito. Veselin alrigardis ĝin kaj diris:

-Mi telefonos al Milena.

En tiu ĉi momento li kvazaŭ vidis ŝiajn kolombkolorajn okulojn, kiuj mole brilis. Veselin levis la telefonaŭskultilon.

-Halo – aŭdis li ŝian teneran voĉon.

-Saluton. Ĉi-vespere mi veturos al Serda kaj mi deziris aŭdi vian voĉon.

-Mi ĝojas – diris Milena. – Mia voĉo veturos kun vi. Kiam vi revenos?

-Dimanĉe.

-Tuj telefonu al mi. Vi stiru atente, ne rapidu, ne forgesu, ke mi atendas vin.

-Ĝis.

-Ĝis dimanĉo.

Veselin remetis la aŭskultilon. Iu malantaŭ lia dorso kvazaŭ denove mallaŭte ekflustris: “Mi atendos vin.” Veselin prenis la sakon kaj eliris el la loĝejo.

2.

Daŭre pluvis. La ŝoseo brilis kiel arĝenta rubando. La pluvo iĝis pli forta. Veselin ne stiris rapide. La asfaltita ŝoseo estis glita. Li pensis pri Milena kun kiu li konatiĝis antaŭ du semajnoj. Tiam Veselin kun sia amiko Boris, fotografo de la regiona ĵurnalo “Kuriero”, gastis ĉe Milena. Boris devis doni al Milena kelkajn fotojn.

Milena loĝis en la centro de la urbo, en kvaretaĝa domo. Boris kaj Veselin supreniris al la kvara etaĝo. Boris premis la butonon de la sonorilo kaj post kelkaj sekundoj Milena malfermis la pordon. Ŝi surhavis bluan ĝinzon kaj blankan bluzon. Ŝiaj kolombkoloraj okuloj brilis.

-Bonvolu – diris Milena.

Ili eniris la ĉambron, kie sur eta tablo jam estis glasoj, botelo da viskio, nuksoj, ĉokoladaj bombonoj.

-Tio estas Veselin – diris Boris – mia amiko, pentristo. Ja, mi diris al vi, ke ni ambaŭ venos. De du monatoj li laboras en nia urbo, en la fabriko “Afrodito”.

-Vi estas pentristo – diris Milena. – Mi ĝojas konatiĝi kun vi. “Afrodito” produktas tre belajn inajn vestojn. Baldaŭ mi devas viziti la vendejon de la fabriko kaj aĉeti iun modernan robon.

-Mi montros al vi la plej novajn kaj elegantajn robojn – diris Veselin. – Vi nur telefonu al mi, kiam vi deziras veni – kaj Veselin donis al ŝi sian vizitkarton.

-Dankon – diris Milena.

De la skribotablo ŝi prenis sian vizitkarton kaj donis ĝin al Veselin.

-Jen miaj telefonnumeroj – diris ŝi.

Ili sidis ĉe la tablo kaj Milena verŝis viskion en la glasojn.

-Okaze de nia renkontiĝo – diris ŝi kaj levis sian glason. Ili tintigis la glasojn.

-Kion vi pentras? – demandis Milena.

-En la fabriko mi pentras robojn, jupojn, mantelojn, sed mi estas pejzaĝisto, portretisto... – respondis Veselin.

-Mi ŝatus vidi viajn pentraĵojn – diris Milena. – Eble vi faros ekspozicion en nia urbo? Ĉi tie estas belega artgalerio.

3.

Malfrue nokte Veselin venis en Serdan. La stratoj de la ĉefurbo dormis. Veselin ne avertis antaŭe Nedan, sian edzinon, ke li revenos. Pasintajn sabaton kaj dimanĉon li ne revenis kaj Neda certe ne atendis lin ĉi-nokte. Veselin sciis, ke kiam ŝi vidos lin, ŝi tuj diros: “Via laboro ne havas finon. Vi promesis ĉiujn sabatojn kaj dimanĉojn reveni, sed pasintajn sabaton kaj dimanĉon vi ne venis. Tiam vi eĉ ne telefonis al mi, ke vi ne venos. Vi ĉiam diras, ke vi havas multe da laboro, ke vi devas labori, ĉar ni bezonas monon. Tamen Vlad, nia filo, jam estas lernanto en la unua klaso kaj mi sola ne povas solvi ĉiujn familiajn problemojn.”

Neda estis stranga virino. Ŝi mem insistis, ke Veselin komencu labori en la firmao de sinjoro Hristakis, greko, kiu posedas la fabrikon “Afrodito” en la urbo Belamonto. Ja, Neda vidis en interreto la anoncon, ke la firmao “Afrodito” dungos pentriston. Neda telefonis al la firmao kaj poste ŝi kaj Veselin iris al sinjoro Hristakis.

La greko afable renkontis ilin kaj li klarigis al Veselin, ke li bezonas pentriston por la fabriko “Afrodito”, kiu estas en urbo Belamonto. Sinjoro Hristakis petis, ke post kelkaj tagoj Veselin alportu kelkajn siajn pentraĵojn.

Veselin ne estis certa ĉu la pentraĵoj plaĉos al sinjoro Hristakis, sed Neda certis, ke ili nepre plaĉos al li kaj ŝi diris al Veselin:

-Vi estas talenta kaj Hristakis tuj konstatos tion.

Neda estis kuracistino. Ŝia profesio estis malproksime de la arto. Ŝi opiniis, ke esti pentristo ne estas malfacile. Post tri tagoj Veselin iris en la oficejon de Hristakis. Tie atendis lin du konsultantoj de Hristakis, gejunuloj. Veselin montris siajn pentraĵojn. Hristakis sidis ĉe granda skribotablo kaj atente rigardis ilin. Kiam li vidis ĉiujn pentraĵojn li diris:

-Vi estas bona pentristo.

Per siaj nigraj, kiel olivoj okuloj, Hristakis fiksrigardis Veselinon kaj malrapide ekparolis:

-Mi dungos vin. Mia fabriko por inaj vestoj en Belamonto bezonas pentriston kiel vin.

Hristakis diris kia estos la salajro kaj kiam Veselin aŭdis kiom da li perlaboros, li tuj konsentis, malgraŭ ke la urbo Belamonto troviĝas je tricent kilometroj de la ĉefurbo Serda.

-Tie vi havos senpagan loĝejon, vi uzos ofican aŭton kaj vi povus veni en la ĉefurbon, kiam vi deziras – aldonis Hristakis.

Nun Veselin parkis la aŭton antaŭ la domo. La fenestro en la dormoĉambro de Neda estis malluma. Neda kaj Vlad delonge dormis. Veselin eliris el la aŭto kaj li profunde enspiris la freŝan aeron. Ankoraŭ pluvis, sed jam ne tiel forte. Malrapide li iris al la dua etaĝo de la domo. Veselin intencis silente malŝlosi la pordon, eniri la loĝejon kaj kuŝi sur la kanapo en la manĝejo por ke li ne veku Nedan kaj Vlad, sed kiam li malfemis la pordon, li vidis Nedan en la vestiblo, starantan antaŭ li. Ŝi estis nudpieda kaj vestita en nokta ĉemizo. Eble Neda aŭdis la paŝojn de Veselin sur la ŝtuparo. Ŝi vekigis kaj ekstaris de la lito por renkonti lin.

-Finfine vi revenis – diris Neda. – Ĉu vi vespermanĝis?

-Jes. Mi vespermanĝis antaŭ la ekveturo – mensogis Veselin.

Neda turnis sin kaj reiris en la dormoĉambron.

4.

Sabate kaj dimanĉe Veselin havis multe da laboro hejme. Li devis ripari la biciklon de Vlad, la pordeton de la vestoŝranko, kiu ne tre bone fermiĝis. Li ŝanĝis la lampon en la kuirejo, kiu difektiĝis. Veselin donis monon al Neda, ĉar ŝi diris, ke ŝi ne havas monon por aĉeti novajn ŝuojn al Vlad.

Dum la tuta tempo Veselin pensis pri Milena kaj li ripetis al si mem ŝiajn vortojn: “Ne forgesu, mi atendas vin.” Li tamen ne estis certa ĉu ŝi diris tion pro afableco aŭ ŝi vere atendas lian revenon kaj ŝi deziras, ke ili renkontiĝu.

Dimanĉe posttagmeze Veselin preparis sin por ekveturi.

-Ĉu ne estas frue ekveturi? – demandis lin Neda. – Estas la kvara horo posttagmeze. Vi revenos en Belamonto kaj vi enuos tie.

-Morgaŭ en la fabriko venos itala delegacio. Ni montros al ili la novajn vestojn. La italoj mendos grandan kvanton da inaj vestoj – mensogis Veselin.

-Bone, se vi havas laboron, ekveturu – diris Neda, sed ŝi diris tion iom krudvoĉe.

Neda havis regeman karakteron. Ŝi estis alta, svelta kun brunkolora hararo kaj malhelaj okuloj kun rigora rigardo. Neda opiniis, ke ŝi estas kompetenta pri ĉio kaj ĉiam ĉiujn ŝi pretis konsili. Dum la unuaj tagoj, kiam Veselin kaj Neda geedziĝis, Veselin ne rimarkis tiujn ĉi ŝiajn trajtojn de ŝia karaktero, sed poste la konduto de Neda komencis ĝeni Veselinon. Unue li provis disputi kun ŝi, sed baldaŭ evidentiĝis, ke tio ne eblas. Neda ne toleris alian opinion kaj ĉiam ŝi diris, ke Veselin eraras, ke li ne rezonas logike kaj li ne komprenas pri kio temas. Veselin konvinkiĝis, ke ne eblas trankvile konversacii

kun Neda kaj li rezignis esprimi siajn opiniojn pri la problemoj, kiuj rilatas la familian vivon.

5.

Dimanĉon posttagmeze ne pluvis. Estis suno kaj ĝiaj briloj kvazaŭ ludis sur la glata ŝoseo, kiu ankoraŭ estis malseka pro la matena pluvo. Veselin veturis rapide. Li ne havis paciencon alveni en Belamonton kaj ŝajnis al li, ke tutan monaton li ne estis tie. Dum la veturado li kvazaŭ daŭre aŭdis la voĉon de Milena kaj li deziris nepre vidi ŝin ĉi-vespere.

Belamonto estis silenta kaj trankvila. Dimanĉon vespere sur la stratoj preskaŭ ne estis homoj, la vendejoj estis fermitaj, en la urba parko estis neniu kaj flavaj folioj kovris la aleojn. Veselin parkis la aŭton antaŭ la domo, en kiu li loĝis. Li iris en la loĝejon, demetis la jakon kaj tuj telefonis al Milena.

-Saluton – diris ŝi. – Verŝajne vi jam revenis.

-Jes.

-Kiam ni renkontiĝos? – demandis Milena.

-Ĉi-vespere. Ni vespermanĝos.

-Bone.

-Mi atendos vin en restoracio “Olimpo” – diris Veselin.

En tiu ĉi restoracio la manĝaĵo estis tre bongusta kaj Veselin ofte manĝis en ĝi. Li iris pli frue kaj li sidis ĉe tablo malprokisme de la orkestro. Dum li atendis Milenan, li rigardis la homojn en la restoracio. Estis kelkaj familioj kaj kelkaj gejunuloj. La juna kelnerino kiel ĉevaleta kuris de tablo al tablo. La restoracio “Olimpo” estis eleganta, vasta kaj hela. Sur la muroj videblis multaj fotoj de la monto Olimpo. Verŝajne la posedanto de la restoracio plurfoje estis tie kaj al li plaĉis tiu ĉi monto en Greklando.

Subite Milena aperis ĉe la pordo de la restoracio. Nun ŝi surhavis malhelruĝan robon. Ŝia longa hararo falis kiel ondoj sur ŝiajn ŝultrojn. Ŝiaj ŝuoj kaj ŝia retikulo same estis ruĝaj.

Veselin ekstaris por renkonti ŝin kaj li akompanis ŝin al la tablo.

-Al mi plaĉas tiu ĉi restoracio – diris Milena. – Fojfoje, kiam mi estas laca kaj mi ne havas emon kuiri hejme, mi venas manĝi ĉi tie. Kutime mi manĝas salatojn. Mi tre ŝatas grandajn freŝajn salatojn, en kiuj estas preskaŭ ĉiuj legomoj.

-Kion ni manĝu ĉi-vespere? – demandis Veselin.

-Kompreneble salatojn kaj salatojn – ekridis Milena.

Veselin vokis la kelnerinon.

-Mi malofte estas en restoracioj kun geamikoj kaj gekolegoj – diris Milena. – Iliaj klaĉoj tedas min.

-Kion vi faras dum via libera tempo? – demandis Veselin.

-Mi estas hejme kaj mi legas aŭ verkas.

-Tio estas bona. La legado riĉigas nin anime – aldonis Veselin.

-Tamen miaj junaj koleginoj priridas min. Jam de la infaneco mi estas tia, silentema kaj ne tre komunikema. La aliaj infanoj ludis, sed mi staris flanke kaj mi rigardis ilin.

-Ĉu vi naskiĝis en tiu ĉi urbo? – demandis Veselin.

-Mi naskiĝis en la vilaĝo Verda Valo, kiu troviĝas je kvindek kilometroj de Belamonto. Mi studis kaj finis ĵurnalistikon en la ĉefurbo. Poste mi venis ĉi tien kaj nun, kiel vi jam scias, mi estas ĵurnalistino por la ĵurnalo “Kuriero”. Ĉi tie, en Belamonto, mi lernis en la gimnazio kaj kiam mi estis gimnazianino mi kunlaboris al “Kuriero”.

-Verŝajne vi ĉiam deziris esti ĵurnalistino? – demandis li.

-Jes. Jam de infano. Mi ne scias kial. Miaj gepatroj estas instruistoj. Panjo instruas geografion kaj paĉjo – fizikon. Paĉjo estis direktoro de la lernejo en Verda Valo. Tamen mi ne ŝatis geografion, nek fizikon. Mi ŝatis historion kaj literaturon. Dum mi lernis en la gimnazio, en Belamonto, mi loĝis en luita loĝejo ĉi tie. Poste, kiam mi studis ĵurnalistikon en Serda, mi

same loĝis en luita loĝejo. Evidentiĝis, ke mi ne povas loĝi kun iu alia.

-Vi estas memstara kaj vi preferas la solecon, ĉu ne? – konkludis Veselin.

-Jes. Dum la unua jaro, kiam mi lernis en la gimnazio, mi loĝis kun mia amikino, kiu same estis el Verda Valo, sed poste ni disiĝis. Ni havis diversajn kutimojn. Same okazis en Serda. Mi provis loĝi en studenta loĝejo, sed ne plaĉis al mi tie. Kiam la gestudentoj amuziĝis, mi legis. Nur kiam mi estas sola, mi bone fartas. Tiam mi povas mediti kaj rezoni trankvile.

-Certe vi tre ŝatas vian laboron?

-Eble tio al vi estas stranga, sed mi laboras eĉ kiam mi ripozas. Jen, ĉe la najbara tablo estas Patrakov, verŝajne vi aŭdis pri li.

-Ne. Mi ne aŭdis pri li – diris Veselin.

-Li estas la plej riĉa persono en Belamonto. Li posedas du fabrikojn por mebloj, tamen oni ne scias kia estas lia vera okupo. Oficiale lia ĉefa agado estas la produktado de mebloj, sed tio estas nur preteksto. Mia celo estas ekscii pri kio ĝuste li okupiĝas.

-Kial tio interesas vin? – demandis Veselin.

-Mi estas ĵurnalistino. Tio estas mia laboro. Ni devas scii pli pri la homoj, kiuj estras la urbon kaj niajn impostojn, nian monon. Patrakov estas prezidanto de la urba konsilantaro kaj de li dependas kiel oni uzas la komunuman monon. Vere vi ne voĉdonis pri li, ĉar vi ne estas loĝanto de nia urbo, vi loĝas en Serda, sed vi laboras ĉi tie, en la fabriko “Afrodito”.

-Jes, mi laboras ĉi tie kaj mi provizore loĝas ĉi tie, sed la problemoj de la urbo same interesas min.

-La problemoj de la urbo vere devas interesi vin. Laŭ mi Hristakis, la posedanto de la fabriko “Afrodito” same havas suspektindajn negocojn, sed certe li bone pagas vin.

Milena parolis tre emocie kaj ŝajnis al Veselin, ke ŝi pretas solvi ĉiujn problemojn de la urbo.

-Mia salajro estas sufiĉe bona – diris Veselin post eta paŭzo.

-Mi supozis tion, sed vi scias, ke en “Afrodito” laboras kvincent kudristinoj. Ilia labortago estas naŭ- aŭ dekhora kaj ili ricevas tre malaltajn salajrojn. Multaj el ili eĉ ne havas laborkontrakton kaj tio ne estas laŭleĝa. Ili tute ne estas asekuritaj.

-Ĉu tial vi deziris renkontiĝi kun mi por pridemandi min pri “Afrodito”? – demandis iom ŝerce Veselin.

Ho, – ridetis Milena. – En “Afrodito” vi estas pentristo. Vi tute ne scias kio okazas en la fabriko. Vi eĉ ne supozas kiaj friponaĵoj estas tie, kiaj neleĝaj financaj operacioj. Tamen se mi devas esti sincera, mi delonge deziris konatiĝi kun vi. Mi ofte vidis vin kun Boris, mia kolego, la fotografo. Mi petis lin, ke li venu kun vi hejmen. Vi scias, ke kiam virino deziras ion – ŝi akiras ĝin. Kiam vi gastis al mi, mi donis al vi miajn telefonnumerojn, sed vi longe ne telefonis al mi. Mi komprenas, vi estas edziĝinta, vi havas filon, vi hezitis telefoni al mi.

-Ja, vi tre bone informiĝis pri mi! – miris Veselin.

-Kial vi surpriziĝas? Mi estas ĵurnalistino. Ĉiu ĵurnalisto devas bone informiĝi kaj ekscii ĉion.

-Ĉu vi certis, ke mi telefonos al vi? – demandis Veselin.

-Mi konfesas ke ne. Tamen mi decidis. Se vi ne telefonus al mi, mi telefonos al vi.

-Kaj kio okazis? – alrigardis ŝin Veselin.

-Mi estis prava. Mia interna voĉo diris, ke vi nepre telefonos al mi. Kaj antaŭ du tagoj, antaŭ via ekveturo al Serda, vi telefonis.

-Jes. Tiam mi ege deziris aŭdi vian voĉon. Ne vian internan voĉon, sed vian veran voĉon. Mi ne scias kial, sed via voĉo allogis min.

-Ĉu nur mia voĉo logis vin? – denove ruzete ekridetis Milena.

-Ni trinku pri vi kaj pri viaj voĉoj – interna kaj ekstera – proponis Veselin kaj levis la glason, plenan da blanka vino.

Ili trinkis kaj iom da tempo ili silentis. Post minuto Milena alrigardis lin kaj diris:

-Antaŭ kelkaj tagoj mi starigis al Patrakov kelkajn provokajn demandojn kaj nun li impertinente rigardas min.

-Vi denove laboras. Eĉ ĉi tie, en la restoracio – diris Veselin kaj iom turnis sin.

Patrakov sidis ĉe la najbara tablo. Li surhavis nigran kostumon, blankan ĉemizon kaj ĉerizkoloran kravaton. Lia hararo estis nigra kaj liaj okuloj similis al du metalaj globetoj. Verŝajne li estis kvardekjara aŭ kvardekdujara. Kontraŭ li sidis junulino, eble dudekjara. Ŝia brila verda robo estis el tre tenera ŝtofo kaj ŝiaj dorso kaj ŝultroj estis nudaj, sed en la restoracio tute ne estis varme. La junulino estis blondharara kun bluaj okuloj kaj ŝminkita vizaĝo.

-Mi nun unuan fojon vidas Patrakovon – diris Veselin.
– Li aspektas inteligenta.

-Vi bone pritaksis lin. Patrakov studis kaj finis ekonomikon. Li bone parolas angle kaj ofte li estas eksterlande.

-Ĉe la najbara tablo estas du junuloj, kiuj atente observas lin – rimarkis Veselin.

-Ili estas liaj gardistoj, kiuj ĉiam akompanas lin – diris Milena. – Mi tamen ne komprenas ĉu tio estas paradeco, snobeco aŭ ĉu Patrakov vere timas ion? Se vi bone vidas, la junuloj trinkas nur mineralan akvon. Patrakov ne permesas al ili trinki alkoholaĵon.

-Certe mi ne fartus bone, se ĉe la najbara tablo sidas viroj, kiuj senĉese atente rigardas min kiel lupoj el arbusto – diris Veselin. – Bone estas, ke neniu gardas kaj rigardas nin.

-Ĉu vi opinias, ke neniu rigardas nin? – demandis Milena. – Al mi ŝajnas, ke ĉiam iuj rigardas min. Iuj scias ĉion, kion mi faras kaj mi ne povas kaŝi min.

-Mi neniam deziris kaŝi min – diris Veselin.

-Vi estas edziĝinta, vi havas filon. Ĉu vi ne maltrankviliĝas, ke via edzino ekscios, ke ĉi-vespere vi vespermanĝis kun juna ĵurnalistino? La mondo estas malgranda. Eble ŝi ne ekscios tuj, sed post iom da tempo iu flustros al ŝi pri via aventuro.

-Mi ne maltrankviliĝas. Mi povas vespermanĝi kun ĉiu, ĉu kun ĵurnalistino, ĉu kun amiko.

Estis la naŭa horo. La teleroj kaj la glasoj jam estis malplenaj. Veselin vokis la kelnerinon kaj li pagis. Kiam ili eliris el la restoracio pluvigis.

-Eble vi jam rimarkis, ke en Belamonto ofte pluvas? – diris Milena.

-Ne estas pli bona vetero ol la pluva vetero – ekridetis Veselin.

-Vi pravas. Kiam pluvas, mi rememoras miajn bonajn kaj belajn travivaĵojn. Vendredon vespere pluvis. Mi pensis pri vi kaj vi telefonis al mi. Milena ĉirkaŭprenis Veselinon kaj kisis lin.

6.

Estis tagmezo. La tagmanĝa paŭzo en la fabriko. Veselin iris en la bufedon kaj aĉetis sandviĉon por tagmanĝi. Lia poŝtelefono eksonoris.

-Saluton – diris Milena. – Mi deziras vidi vin. Mi estas trista, se unu tagon mi ne vidas vin. De mateno ĝis vespero mi intervjuas, verkas artikolojn. En mia kapo svarmas vortoj. Eble pasintvespere en la restoracio mi tre multe parolis. Tio estas profesia kutimo. Venu ĉi-vespere al mi. Mi kuiras bongustan vespermanĝon.

-Dankon pro la invito – diris Veselin.

Je la sepa horo vespere Milena jam atendis lin. Ŝi surhavis oranĝkoloran robon. Kiam ŝi aŭdis la sonoron de la

sonorilo, ŝi tuj rapide iris al la pordo kaj malfermis ĝin. Veselin staris antaŭ ŝi kun granda florbukedo kaj botelo da ruĝa vino.

-Bonvolu – diris Milena.

-Bonan vesperon.

Veselin demetis sian jakon kaj kroĉis ĝin al la vesthokaro.

-Ekstere denove pluvas – diris li. – En Belamonto la pluvo senĉese persekutas min.

-Gravas, ke en mia domo ne pluvas – ekridetis Milena. – Mi proponas, ke ni vespermanĝu en la kuirejo. Tie estas pli oportune al mi, ĉar mi ne devas porti la telerojn en la manĝoĉambron.

-Vi estas la dommastrino kaj kion vi diras, tio okazos. Ĉie mi bone fartas kaj ĉie mi povas bone manĝi.

-Atentu. Ĉiam vi diru la veron. Mi tuj komprenus, kiam vi mensogus al mi.

-Nun mi ne mensogis. Mi ĉie fartas bone – ripetis Veselin.

-Jes. Vi ne povas mensogi – diris Milena kaj ŝi tenere kisis lin. – Vi similas al granda senkulpa knabo.

-Ĉu mi ankoraŭ ne plenkreskis? – demandis ŝerce Veselin.

-Pli bone restu knabo. Mi ekamis viajn knabajn bluajn okulojn. Via rigardo estas kiel la rigardo de infano, kiu miras kaj admiras. Mi rimarkis tion, kiam vi gastis al mi kun Boris. Tiam vi rigardis min admire kaj mi tre malfacile retenis mian ridon. Diru per kio mi impresis vin?

-Per kio? Nun mi ne memoras.

-Ne provu ruzeti! Mi diris. Mi komprenas tuj, kiam iu mensogas. Nun vi provas eskapi, sed malsukcese.

-Mi konfesas. Mi ne povas eskapi kaj mi ne deziras eskapi. Impresis min via impeto. Vi estas energia, facilmovia kvazaŭ vi havus flugilojn. Vi parolis emocie, verve. Ĝis tiam mi ne vidis junulinon kiel vin. Viaj kolombkoloraj okuloj kun

molaj briloj same impresis min. Mi eĉ konfesos, ke tiam nokte mi songis vin kaj viajn okulojn.

-Vi estas pentristo kaj la koloroj impresas vin. Ĉu io alia impresis vin? – ekridetis Milena.

-Tiam vi surhavis ĝinzon kaj blankan bluzon, sed poste ĉiam vi surhavas robon.

-Ĉar mi deziris esti serioza virino kaj ne bubino.

-Vi estas serioza virino – diris Veselin – sendepende ĉu vi surhavas ĝinzon aŭ robon.

Veselin ĉirkaŭbrakis, levis ŝin kaj portis ŝin en la dormoĉambron.

-Mi opiniis, ke ni unue vespermanĝos – flustris Milena.

-La vespermanĝo ne forkuros.

Veselin metis Milenan sur la liton. Ŝi pli forte ĉirkaŭbrakis lin. Li ekflaris ŝian parfumon, kiu odoris je hiacintoj. Li kisis ŝin. Ŝiaj lipoj varmis, ŝiaj mamoj tremis kaj ŝi profunde spiris. Ŝia mola hararo karesis lian frunton.

-Longe mi atendis vian aperon – flustris Milena.

Ŝi fermis la okulojn. Ŝia korpo fleksiĝis kiel juna poplo, kies branĉoj kvazaŭ ĝemus pro forta vento. Iliaj korpoj ardis kaj ili soife kisis unu la alian.

7.

En la ĉambro de Veselin estis agrable varme. Nun, posttagmeze, la lastaj sunradioj de la subiranta suno karesis la fenestran vitron. La sunbriloj lumigis la pentraĵon, kiu estis sur la pentrostablo.

-Estas nova pejzaĝo, ĉu ne? – diris Milena.

-Jes. Nun mi pli ofte pentras – alrigardis ŝin Veselin. – De kiam mi konas vin, mi havas pli fortan emon pentri. Post la fino de la labortago mi revenas hejmen kaj mi pentras. Hieraŭ mi estis en la malnova urba kvartalo kaj tie mi komencis pentri tiun ĉi malnovan domon. Nun mi finpentras ĝin. Vi certe perceptas ĝian atmosferon. Mi pentras kaj mi sentas elanon. Vi

estas ĵurnalistino. Vi laboras per la vortoj kaj vi povus pli bone vortesprimi tiun ĉi mian senton. Kiam mi komencas pentri, mi kvazaŭ aŭdis miraklan melodion. Mi deziras diri al vi, ke kiam mi unuan fojon telefonis al vi, mi kvazaŭ aŭdus tian melodion. Tiam min subite obsedis la deziro ekveturi. Mi ekveturis, sed kvazaŭ mi pli kaj pli proksimiĝis al vi. Ŝajnis al mi, ke tiam en la pluva vespero ni veturis ambaŭ, vi kaj mi.

-Jes. Kiam vi telefonis, mi diris al vi “mi atendos vin”. Poste mi riproĉis min pro tiuj ĉi vortoj. Mi demandis min: kion vi opinius pri mi. En la restoracio mi diris al vi, ke mi estas soleca. Mi preferas la solecon, sed mi ne povas precize diri kial vi allogis min. Ne ĉiam ni povas klarigi kial iu homo allogas nin kaj alia – ne. Mi provis respondi al tiu ĉi demando. Eble via belaspekto. Vi estas alta, forta kaj samtempe en viaj bluaj okuloj, bluaj kiel montaraj lagoj, estas io kiel en la okuloj de infanoj. Viaj okuloj estas klaraj, sinceraj. Eble kiam mi unuan fojon vidis vin, viaj okuloj allogis min, via sincera infana rigardo. Poste mi vidis viajn pentraĵojn kaj mi ekŝatis ilin. En ili mi vidis la saman sincerecon, kiun eligas viaj okuloj. Mi konstatis, ke vi rigardas la mondon per la okuloj de infano. Vi vidas la mondon bela kaj hela. Tiel ni vidis la mondon, kiam ni estis infanoj. Bedaŭrinde ni, la aliaj plenkreskuloj, jam ne vidas nur la belecon de la mondo, sed same ĝian malbelon. Ni perdis nian infanan sincerecon, sed vi – ne. Vi estas granda infano. Ni plenkreskis kaj ni iĝis pli malriĉaj spirite, sed vi havas riĉan, bonan animon. Tial mi ekamis vin. Mi deziras esti kun vi. Mi deziras, ke ni estu amikoj. Mi bezonas vian sincerecon. Mi bezonas vian varmon kaj homecon.

-Vi estas fraŭlino, junulino. Mi estas dek jarojn pli aĝa ol vi. Mi estas edziĝinta. Ĉu tio ne ĝenas vin? – demandis Veselin.

-Bedaŭrinde tre malfrue mi renkontis vin, sed mi dankas al la sorto, ke mi tamen renkontis vin. Mi scias, ke la tempo, kiam ni estos kune, estos neforgesebla. Nia amikeco estos kiel mallonga rakonto, enhavanta emocion kaj amon. La

mallongaj rakontoj estas kiel fulmoj. Ili ekbrilas por momento sur la firmamento kaj lumigas niajn animojn. Ilia lumo helpas nin pli bone vidi nin mem. La familia vivo similas al romano, longa kun multaj epizodoj kaj streĉitaj momentoj. Al mi pli plaĉas la mallongaj rakontoj. Oni tralegas ilin. Ili skuas nin. Longe ni memoras ilin kaj meditas pri ilia enhavo.

-Plaĉas al mi, ke vi komparas la amon al la mallongaj rakontoj – diris Veselin.

-Viaj pejzaĝoj same similas al mallongaj rakontoj. Mi rigardas tiun ĉi vian pentraĵon kaj mi konstatis, ke plurfoje mi estis en la malnova urba kvartalo, sed nun kvazaŭ la unuan fojon mi vidas tiun ĉi malnovan domon, kiun vi pentris. Nun mi vidas la malnovan kvartalon, la malnovajn domojn tra viaj okuloj. Jen tiu ĉi arbo, tiu ĉi domo, tiu ĉi fenestro. Ili estas tie eble de jarcento, sed ĝis nun mi ne vidis ilin tiel bone. Mi kvazaŭ ne rimarkis ilin. Kio igis vin pentri ĝuste tiun ĉi malnovan domon? Ja, preskaŭ ĉiuj domoj tie similas unu al alia.

-Mi ne scias. Nun mi rigardas la pejzaĝon kaj ŝajnas al mi, ke en tiu ĉi domo estas io mistera, io enigma. Ĉu nun loĝas iu en ĝi aŭ ne? Se iu loĝas en ĝi, certe li aŭ ŝi estas tre maljunaj. Kiam mi pentris la domon, mi pensis pri la homoj, kiuj iam loĝis en ĝi. Nekredeble multaj homoj loĝis tie. Dum la jaroj tie naskiĝis kaj mortis homoj. Ĉu eble ili lasis iom da spirito en tiu ĉi domo? Kaj jen la domo ankoraŭ estas. La malnovaj domoj gardas la spiriton de la homoj, kiuj loĝis en ili.

-Certe.

-Mi deziras, ke la spirito estu en miaj pentraĵoj. En ĉiu pentraĵo devas esti spirito. Se ne estas - la pentraĵo mortas.

-En ĉio estas spirito – diris Milena – en la domoj, en la arboj, en la fenestroj. Mi jam bone konas viajn pentraĵojn, sed tre malmulte mi scias pri vi, pri via vivo.

-Kion mi diru pri mi – ekridetis Veselin – Mia vivo estas tre ordinara. Mi naskiĝis en vilaĝo, proksime al Serda. Miaj gepatroj estas vilaĝanoj. Mia patro bredis bovinojn kaj

mia patrino zorgis pri la domo. Mi lernis en la baza lernejo en la vilaĝo. Foje nia instruistino diris al ni pentri poton. Ŝi metis argilan poton sur la tablon antaŭ ni kaj ŝi komencis pentri la poton sur la nigran tabulon. Bedaŭrinde ŝi ne povis pentri. Kiam ŝi finis sian pentraĵon, mi nevole voĉe diris: “Ĉu tiel aspektas potoj?” La instruistino estis juna, tre bela kaj ŝi ofendiĝis. Ŝi diris, ke mi iru al la nigra tabulo kaj mi pentru la poton. Mi iris kaj mi pentris ĝin sur la nigran tabulon. La instruistino rigardis mian pentraĵon kaj ŝi ne kredis, ke mi pentris ĝin. Kiam mi estis en la sesa klaso, la instruisto pri pentrado estis viro. Li vidis, ke mi bone pentras kaj li venis en nian domon. La instruisto diris al mia patro, ke mi havas talenton kaj mi devas lerni en la gimnazio pri la pentroarto. Mia patro ne tre konsentis, ĉar laŭ li la pentristoj ne salajras bone, sed la instruisto sukcesis konvinki lin kaj mi komencis lerni en la gimnazio pri la pentroarto. Kiam mi finis la gimnazion, mi ekstudis en Belarta Akademio.

-Kiel vi konatiĝis kun via edzino? – demandis Milena.

-Mi estis malsana kaj mi estis en malsanulejo. Tie, Neda, mia edzino, estis juna kuracistino. Ŝi multe zorgis pri mia resaniĝo. Kiam mi resaniĝis, mi iris en la malsanulejon por danki ŝin. Mi invitis ŝin al vespermanĝo. Ŝi akceptis mian inviton kaj poste ni komencis ofte renkontiĝi.

-Kial vi venis labori en Belamonto?

-Tion mi same ŝuldas al Neda. En Serda mi estis instruisto pri pentroarto, sed mia salajro ne estis alta. Foje Neda legis en interreto, ke la firmao “Afrodito” dungos pentriston. Mi kaj Neda iris al Hristakis. Al li plaĉis miaj pentraĵoj kaj li dungis min. Li diris, ke mia salajro en Belamonto estos alta. Mi konsentis, malgraŭ ke Belamonto estas je tricent kilometroj de Serda.

Veselin iom silentis kaj poste li ekparolis:

-Hodiaŭ mi tralegis vian artikolon en ĵurnalo “Kuriero”. Ĝia titolo estas: “Kie estas la mono?”. Vi skribas, ke en Belamonto antaŭ ses monatoj estis granda inundo. La ŝtato

donis multe da mono por kompensi la damaĝojn, sed la mono malaperis. Vi supozas, ke iu ŝtelis ĝin. Vi mencias ankaŭ aliajn krimagojn kaj vi aludas pri kelkaj konataj personoj. Tio estas seriozaj akuzoj. Ĉu vi havas pruvojn?

-Se mi ne havus, mi ne estus aperiginta la artikolon. Mi verkis pri la inundo, sed mi scias kaj mi havas pruvojn pri pli grandaj krimoj. Baldaŭ mi verkos artikolojn pri ili.

-Ĉu vi ne timas?

-Se mi timus, mi ne estus ĵurnalistino – diris firme Milena.

-Vi estas tenera, fragila. Vi entreprenas danĝeran agadon.

-Kiam ni estis en restoracio “Olimpo” mi menciis al vi pri mia interna voĉo. Ĝi neniam trompas min. Kiam mia interna voĉo diras ion al mi, mi devas plenumi tion. Se mi ne plenumas ĝin, mia interna voĉo ne lasas min trankvila. Mi verkos kaj mi aperigos ĉion, kion mi eksciis pri la krimagoj de kelkaj elstaraj personoj. Se mi ne aperigus ĝin, mi ne estus trankvila!

Milena turnis sin kaj denove rigardis la pentraĵon. Antaŭ ŝi sur la tablo estis glaso da vino. Milena trinkis du glutojn. Veselin ĉirkaŭbrakis ŝin.

-Vi estas vera batalanto – diris li. – Vi estas mia kara soldato!

-Jes – diris Milena. – Mi ŝatas batali kaj mi estos batalanto. Jam de la infaneco mi estis batalanto. Mi ne diris al vi, sed tio nun ne gravas. Mi estis edziniĝinta. Tutan jaron mi estis edzino. Mi edziniĝis kiam mi finis la universitaton. Mia edzo estis inĝeniero, sed okazis, ke ni ne povis vivi kune. Li deziris, ke mi estu dommastrino. Mi zorgu pri la domo, mi kuiru, purigu la domon. Mi eksedziniĝis. De tempo al tempo hazarde sur la stratoj mi vidas lin.

La suno delonge malaperis. Estiĝis mallumo en la ĉambro. La malvarma novembra vento frapetis sur la fenestran vitron.

-Restu ĉi tie ĉi nokton – diris Veselin.
-Mi ne alportis mian dentbroson – ekridetis Milena.
-Mi havas tute novan dentbroson. Mi donos ĝin al vi.
-Vi estas tre ruza. Denove vi sukcesis konvinki min tranokti en via loĝejo.

Post la noktomezo Veselin vekigis. Milena dormis ĉe li kiel eta knabino. Eble ŝi songis ion belan, ĉar songe ŝi ridetis. Veselin scivolis scii kion ŝi songas. Harartufo estis sur ŝia glata frunto. Veselin deziris kisi ŝin, sed li timis, ke li vekos ŝin. Nur mane li karesis la dormkovrilon, kiu kovris ŝin.

8.

Veselin trapasis la senhoman hospitalan koridoron kaj eniris en la ĉambron, numeron ok. Milena kuŝis sur la lito ĉe la fenestro. Kiam ŝi vidis lin, ŝi ekridetis. Veselin proksimiĝis al ŝi kaj ekstaris ĉe la lito.

-Saluton – diris li. – Kiel vi fartas?

-Jam pli bone – respondis Milena. – La doktoro diris, ke post kelkaj tagoj mi iros hejmen.

-Evidente via malsano estis tre serioza.

-Pneŭmonito. Bone, ke ĝustatempe oni komencis kuraci min. Mi malsaniĝis, kiam mi oficvojaĝis al la urbo Siniger. Tiam estis tre malvarme.

-Mi portas al vi fruktosukon kaj oranĝojn – diris Veselin kaj donis al Milena la saketon.

-Dankon. Mi ankoraŭ ne havas apetiton.

Milena rigardis al la fenestro. Ekstere ĉe la fenestro estis tilio. Neĝo kovris ĝiajn branĉojn.

-Kia bela vintro! – flustris Milena. – Ĉu vi ŝatas pentri la vintron?

-Mi havas kelkajn vintrajn pejzaĝojn el Serda.

-Tamen el Belamonto vi ankoraŭ ne havas.

-Ankoraŭ ne.

-Kiam mi resaniĝos – diris Milena – ni ambaŭ promenados ĉe la bordo de Danubo. Tie la vintra pejzaĝo estas tre bela. La rivero aspektas arĝenta. La arbustojn sur la riverbordo kovras neĝo kaj ili kvazaŭ estas faritaj el sukero. Tie regas silento kiel en sorĉita blanka mondo.

-Ni nepre promenu tie – diris Veselin.

-Mi ege ŝatas promeni ĉe la Danubo. Tie survoje al la vilaĝo Dulo troviĝas eta restoracio. Ĝia nomo estas “Danuba Renkontiĝo”. Fojfoje mi iras tien. Mi bone konas la posedanton de la restoracio. Li kuiras tre bongustan fiŝsupon.

-Mi ege ŝatas fiŝsupon. Baldaŭ ni nepre iru tien – diris Veselin.

-Mi havas peton al vi – alrigardis lin Milena. – Mia poŝtkesto hejme certe jam estas plena je leteroj kaj ĵurnaloj. Bonvolu preni la ŝlosilojn de la poŝtkesto kaj de mia loĝejo. Iru. Malfermu la poŝtkeston, prenu la leterojn kaj la ĵurnalojn kaj lasu ilin en mia loĝejo.

-Bone. Morgaŭ mi iros – promesis Veselin.

-Dankon. Mi dankas, ke vi venis ĉi tien.

-Ne dankinde.

-En la hospitalo nokte mi ne povas dormi. Tiam, kiam en la ĉambro estas mallumo kaj silento, mi pensas pri vi. Mi demandas min: “Kion vi faras? Ĉu vi spektas televidon aŭ vi legas, aŭ eble vi pentras?”

-Dum la lastaj tagoj mi ne pentris. En “Afrodito” estas multe da laboro. Nun oni kudras belajn robojn por eksporto.

-Ho, mi ŝatus havi tian robon.

-Vi nepre havos.

En la ĉambro eniris juna flegistino, kiu diris, ke la vizitantoj devas jam foriri. Veselin klinis sin kaj kisis Milenan. Ŝia frunto estis pala kaj la rigardo de ŝiaj kolombkoloraj okuloj estis trista.

-Telefonu al mi, kiam vi rajtas reiri hejmen. Mi venos kaj akompanos vin – diris Veselin.

-Dankon. Mi telefonos, sed same vi pli ofte telefonu al mi. Ja, vi ne devas forgesi mian voĉon.

-Ĉu vian internan aŭ vian eksteran voĉon – ridetis Veselin.

-Plaĉas al mi, kiam vi ŝercas – diris Milena.

La sekvan tagon Veselin iris en la loĝejon de Milena. Li prenis la leterojn kaj la ĵurnalojn el la poŝtkesto kaj iris al la kvara etaĝo, kie estis la loĝejo. Li malŝlosis la pordon kaj eniris. Ĉi tie la fenestroj delonge ne estis malfermitaj kaj Veselin malfermis la pordon al la balkono. Li ekstaris sur la balkono. De ĉi tie videblis la centro de la urbo: la ĉefa placo kun la granda granita skulptaĵo de patrino kun infano, la horloĝa turo, la konstruaĵo de la teatro. Veselin rememoris, ke ĉi-vepere en la teatro oni prezentos la komedion “La gastejestrino” de Carlo Goldoni. “Mi spektu ĝin hodiaŭ, diris al si mem Veselin, aŭ pli bone estus, se ni ambaŭ, Milena kaj mi spektu ĝin.”

La telefono en la ĉambro eksonoris. Veselin ne levis la aŭskultilon. La telefono daŭre sonoris. Eble estas io grava. Veselin eniris la ĉambron kaj levis la aŭskultilon.

-Milena – aŭdiĝis vira voĉo.

-Ŝi ne estas hejme – diris Veselin.

-Ĉu ŝi estas ekster la urbo. Jam kelkfoje mi telefonas.

-Ŝi estas malsana.

-Dankon. Mi telefonos, kiam ŝi resaniĝis.

Veselin demandis sin: “Kiu estis tiu ĉi viro?” Lia voĉo sonis iom strange. Estis voĉo de juna viro. Certe li ne estis la patro de Milena. Se estus ŝia patro, li dirus sian nomon. Aŭ eble estis ŝia eksedzo? Ĉu de tempo al tempo li ne telefonas al Milena? Ja, Milena menciis, ke iam-iam ŝi vidas lin en la urbo.

De kvar monatoj Veselin konis Milenan, sed li tre malmulte sciis pri ŝi. Milena nur diris al li, ke ŝi naskiĝis en la vilaĝo Verda Valo, ke ŝiaj gepatroj estas instruistoj, ke ŝi lernis en la gimnazio en Belamonto, poste ŝi studis en la universitato

en la ĉefurbo, ŝi revenis ĉi tien kaj nun ŝi estas ĵurnalistino de ĵurnalo “Kuriero”. Nur tion Veselin sciis pri Milena. Ĉu ŝi havas geamikojn? Kiel ŝi vivis antaŭe? Veselin ne vidis ŝiajn fotojn. Li ne konis ŝiajn gepatrojn. Milena tre malofte iris en la vilaĝon, kie ili loĝas. Nun tentis lin la deziro malfermi iun tirkeston kaj vidi kio estas en ĝi, sed li rezignis. Ne estas bone trarigardi aliiĝojn.

Veselin atente fermis la balkonan pordon. Poste li eliris el la loĝejo kaj li ŝlosis la loĝejan pordon.

9.

La poŝtelefono de Veselin sonoris. Telefonis al li Milena.

-Saluton. Mi jam estas sana kaj hodiaŭ mi forlasos la hospitalon. Ĉu vi povus veni kaj akompani min hejmen.?

-Jes. Mi tuj venos – diris li.

La fabriko “Afrodito” estis ekster la urbo. Veselin telefone vokis taksion. Post dek minutoj la taksio venis kaj veturigis lin al la hospitalo. Milena atendis lin en la enirejo de la hospitalo. De la hospitalo per la taksio ili veturis al la loĝejo de Milena.

Kiam ili eniris en la loĝejon, Milena tuj eksidis en fotelon kaj diris:

-Finfine denove hejme. Denove ni estas kune. Ŝajnis al mi, ke mi frenezigiĝos en la hospitalo. Tie ne eblis verki, ne eblis promeni...Koŝmaro. Mi vidas, ke vi prenis la leterojn kaj la ĵurnalojn el la poŝkesto. Mi ne havas paciencon tralegi ilin. Mi ne sciis, ke la senfarado estas tiel turmenta.

Ŝi ekstaris de la fotelo kaj iris al la tablo, kie estis la leteroj kaj la ĵurnaloj. Milena komencis trarigardi ilin. Subite ŝi levis kapon kaj fiksigardis la librobretaron, kiu estis kontraŭ ŝi. Kelkajn sekundojn Milena staris senmova.

-Eble, kiam vi estis ĉi tie, vi trarigardis miajn libron? – demandis ŝi Veselin.

Li ne komprenis ŝin.

-Kiajn librojn?

-La librojn, kiuj estas sur la bretaro – klarigis Milena.

-Ne – miris li. Mi ne rigardis ilin kaj mi eĉ ne tuŝis ilin.

Kial vi opinias, ke mi rigardis ilin?

-Tiu ĉi statueto – kaj Milena montris etan porcelanan statueton, verŝajne ĉinan knabinon kun granda blua ĉapelo, - ĉiam staras antaŭ la libro “Fratoj Karamazovi” de Dostojevskij, sed nun ĝi estas tre flanke de tiu ĉi libro. Nur mi povas rimarkiti tion. Iu certe elprenis la librojn el la bretaro kaj poste li atente denove ordigis ilin, sed li ne metis la statueton ĉe la libro “Fratoj Karamazovi”.

-Ĉu vi estas certa? – demandis Veselin.

Kompreneble! Kiam mi estas ĉi tie, mi ofte rigardas tiun ĉi statueton kaj ĝi ĉiam staras tie, ĉe la libro “Fratoj Karamazovi”.

-Ĉu vi mem hazarde ne metis ĝin iom pli flanken kaj poste vi forgesis?

-Povas esti, tamen mi havas la senton, ke iu estis ĉi tie – diris Milena maltrankvile.

-Mi estis ĉi-tie. Certe neniu alia – diris Veselin.

-Krom vi, estis iu alia. Tion mi sentas. Mi ne povas diri kiel, sed mi estas preskaŭ certa. Tamen, ni forgesu – ekridetis ŝi. – Gravas, ke mi denove estas hejme.

Veselin proksimiĝis al ŝi. Li ĉirkaŭbrakis ŝin kaj soife ili kisis unu la alian. Veselin rigardis al la balkono kaj subite li surpriziĝis. La balkona pordo estis iom malfermita, tamen li bone memoris, ke kiam li estis ĉi tie, antaŭ du tagoj, li fermis ĝin. Li restis senmova rigardante la malfermitan pordon, sed li ne diris tion al Milena. Li ne deziris maltrankviligi ŝin.

-Ni devas festi mian revenon de la hospitalo – diris Milena. – Mi aĉetos vinon kaj ion por manĝi.

-Vi restu en la loĝejo. Mi iros aĉeti – diris Veselin.

Li prenis sakon kaj rapide eliris. Irante li kvazaŭ ankoraŭ vidis la malfermitan balkonon pordon. Kio estas tio?

Kiu estis en la loĝejo de Milena kaj kial, demandis sin Veselin. Certe ne estis ŝtelisto, ĉar nenio estis ŝtelita. Tiu, kiu estis en la loĝejo de Milena, verŝajne intence lasis etajn spurojn, por ke Milena komprenu, ke iu estis en la loĝejo. Pri la statueto Veselin ne estis tre certa, sed la balkona pordo sendube estis malfermita. En la loĝejo de Milena ne estis valoraĵoj. Estis televidilo, komputilo. Ĉu oni ne serĉis ion en la komputilo de Milena? Antaŭ la malsaniĝo Milena laboris kaj kolektis pruvojn pri la korupto en kelkaj firmaoj. Ŝi verkis tre kritikajn artikolojn pri la krimagoj de konataj personoj.

La vendejo troviĝis proksime. Nun en ĝi ne estis homoj kaj la juna vendistino solvis krucenigmon. Veselin aĉetis botelon da ruĝa vino, kolbason, fromaĝon, citronojn. Li rapidis reveni. Ja, Milena ne devis esti sola dum longa tempo.

Kiam Veselin eniris en la loĝejon, Milena jam estis ŝanĝinta vestaĵojn. Ŝi surhavis ĝinzon kaj dikan brunan puloveron. Tiel vestita ŝi aspektis kiel dekokjara knabino.

-Mi preparos la tagmanĝon – diris Milena, – dum vi tralegos la hodiaŭan ĵurnalon.

-En ĝi certe ne estas via artikolo kaj tial ĝi ne interesas min – diris Veselin.

-Baldaŭ vi tralegos tre interesajn artikolojn de mi. Ili estos kiel bomboj, kiuj subite eksplodos. Mi jam havas tre gravajn dokumentojn pri la krimagoj de konataj personoj, kiuj okupas gravajn administraciajn postenojn en la urbo.

-Ĉu vi havas gravajn dokumentojn? Nekredeble!

-Jes. Baldaŭ la tuta urbo ekscios pri la friponaĵoj de iuj personoj. Tiuj ĉi miaj artikoloj estos precizaj pafoj al la celoj.

-Atentu, ke oni ne pafu vin.

-Ho, mi ne timas. Multfoje oni provis pafi min, – diris firme Milena – sed mi ankoraŭ vivas.

-Ĉu vi daŭre okupiĝas pri Patrakov? – demandis Veselin.

-Jes. Lia krimagado tamen estas ligita al la krimagadoj de kelkaj aliaj personoj. Evidentiĝis, ke estas kelkaj uloj, kiuj

lerte kaŝis sin. Tamen mi trovis ilin kaj baldaŭ mi priskribos iliajn fiagojn.

La tagmanĝo estis preta: boligita kolbaso kaj frititaj terpomoj. Veselin malfermis la botelon de vino kaj li plenigis la glasojn.

-Je via sano – diris li – kaj atentu. Gardu vin. Viaj artikoloj certe kolerigos iun.

-Mi estos kontentigita, kiam dank' al miaj artikoloj oni kondamnos la friponojn kaj malliberigos ilin. La urbanoj de Belamonto deziras justecon kaj oni devas vidi la friponojn en la malliberejo.

-Vi vere estas tre kuraĝa.

-Vi ne scias, sed multaj urbanoj skribas al mi leterojn kaj ili petas min, ke dum la venontaj balotoj por urbestro en Belamonto, mi kandidatiĝu pri la posteno de urbestro.

-Ĉu vi estas ano de iu partio? – demandis Veselin.

-Ne. Sed se mi decidus kandidatiĝi por urbestro, oni fondos civitanan asocion, kiu subtenos min por fariĝi urbestro de Belamonto.

-Tio jam estas tre serioza plano! – miris Veselin. Li ne deziris kredi, ke tiu ĉi fragila tenera junulino havas tiajn kuraĝajn ambiciojn.

-Tamen tio eble okazos post tri jaroj – ekridetis Milena. – Nun pli gravas, ke mi jam estas sana, ke mi estas hejme kaj mi denove laboros. Mi ne havas paciencon denove esti en la redaktejo de la ĵurnalo.

-Mi estas pentristo kaj mi ne konas la laboron de la ĵurnalistoj. Kiel vi trovas la faktojn, la pruvojn? Vi diris, ke vi havas gravajn dokumentojn pri la krimagado de iuj personoj. Kiel vi akiris tiujn ĉi dokumentojn? – demandis Veselin. – Ĉu estas homoj, kiuj informas vin? Ĉu tiuj homoj venas al vi aŭ vi mem trovas ilin?

La kolombkoloraj okuloj de Milena iĝis pli helaj kaj en ili Veselin vidis la konatajn ruzajn briletojn.

-Mi ne respondos al viaj demandoj, ĉar tio estas ĵurnalista sekreto – diris ŝi.

Kompreneble Milena diris tion ŝerce, tamen Veselin bone komprenis, ke ŝi ne diros tion al li. Milena levis sian glason da vino kaj trinkis.

-La doktoro diris, ke ĉiutage mi devas trinki glason da ruĝa vino – diris Milena. – Mi decidis plenumi tion. Estos agrable, kiam mi estas iom ebriiĝinta.

Evidente Milena deziris eviti la konversacion pri la tiklaj artikoloj, pri la balotoj kaj la kandidatiĝo pri urbestro. Veselin manĝis silente kaj deziris diri al ŝi, ke la manĝaĵo estas tre bongusta. Milena denove ekparolis. Ŝi vidis, ke Veselin eksilentis.

-Ĉu vi ofendiĝis? – demandis ŝi. – Pardonu min, sed al neniu mi diras kiel mi trovas la faktojn kaj la pruvojn pri miaj artikoloj. Vi mem komprenas, ke mi kontaktas plurajn homojn, kiuj informas min kaj mi devas gardi ilin. Mi petas vin, ne ofendiĝu.

-Mi ne ofendiĝas – diris Veselin. – Vi estas ĵurnalistino kaj vi scias kiel vi devas agi kaj labori.

-Dankon, ke vi komprenas min. Miaj gepatroj bedaŭrinde ne komprenas min aŭ pli ĝuste ili ne deziras kompreni min. Panjo opinias, ke mi kaŝas ĉion pri mi, ke mi nenion diras al ŝi. Ŝi deziras scii pri kio mi laboras, kun kiu mi vivas, kun kiu mi dormas. Ŝi ofte diras, ke patrino kaj filino devas esti la plej bonaj amikinoj. Ili konfesu ĉion unu al la alia. Mia patrino koleris al mi. Ŝi deziras, ke mi tuj telefonu al ŝi, kiam en la ĵurnalo aperas mia artikolo. Ŝi opinias, ke mi kaŝas de ŝi miajn artikolojn. Tial mi malofte vizitas miajn gepatrojn, ĉar ni konstante disputas.

-La gepatroj amas siajn gefilojn kaj ili fieras pri ili. Certe via patrino tre fieras, ke vi estas fama ĵurnalistino kaj ŝi deziras scii ĉion pri vi – diris Veselin.

-Eble, sed tio ĝenas min. Mi rajtas havi propran vivon. Ja, mi delonge plenkreskis.

Subite la telefono eksonoris. Milena iris en alian ĉambron. Post sekundoj ŝi revenis.

-Ĉu viaj kolegoj jam eksciis, ke vi estas hejme? – demandis Veselin.

-Strange. Neniu parolis.

-Mi forgesis diri al vi, ke pasintsemajne, kiam mi venis ĉi tien por alporti la leterojn kaj la ĵurnalojn iu viro serĉis vin telefone. Mi demandis lin kiu li estas, sed li diris, ke li ŝatus paroli kun vi. Eble estis iu el viaj informantoj.

-Miaj informantoj eble tre interesas vin, ĉu ne? – ekridetis Milena. – Tamen kun ili mi ne parolas telefone. Estu trankvila, mi ne havas alian amanton. Mi diris al vi – mia interna voĉo elektis vin. Nur vi estas mia amato kaj mia amanto.

Ili denove tintigis la glasojn. Ekstere neĝis. Estis agrable rigardi la silentan urbon sub la mola blanka neĝkovrilo. De la loĝeja fenestro videblis la alta horloĝa turo sur la ĉefplaco, la blanka neĝa kupolo de la preĝejo “Sankta Dipatrino” kaj la tegmento de la teatro.

Ni nepre devas spekti la komedion “La gastejestrino”, diris al si mem Veselin. Baldaŭ mi aĉetos biletojn por la teatraĵo.”

La telefono denove eksonoris. Milena iris en alian ĉambron kaj kiam ŝi revenis, ŝi diris:

-Denove neniu parolis. Eble iu kontrolas ĉu mi jam estas hejme.

Nun Milena aspektis iom maltrankvila.

10.

Post la teatra spektaklo Veselin kaj Milena iris al la domo de Milena. La strataj lampoj ĵetis palan citronkoloran lumon kaj la neĝo similis al lakta kremaĵo. Blovis malvarma vento. Iliaj vizaĝoj estis ruĝaj.

-La komedio tre plaĉis al mi – diris Milena. – Neniam mi ridis tiel multe.

-Mi deziris surprizi vin. Tial mi aĉetis biletojn por tiu ĉi komedio – diris Veselin.

-Vi sukcesis bone surprizi min. Pro la ĉiutaga laboro mi forgesas, ke ekzistas teatro, koncertoj. Pli ofte mi vizitas ekspoziciojn, ĉar la pentraĵojn oni povas trarigardi tage. La teatraj spektakloj kaj la koncertoj komenciĝas vespere. Kiam vi faros ekspozicion kun viaj pentraĵoj en Belamonto?

-Printempe mi pentros ankoraŭ kelkajn pejzaĝojn el la urbo kaj poste mi prezentos ilin en ekspozicio – diris Veselin.

-Estos la ekspozicio de la konata ĉefurba pentristo Veselin Kanazirev – ekridetis Milena. – Vi fariĝos fama en Belamonto.

-Ĉi tie vi estas fama – alrigardis ŝin Veselin. -Ĉi-vespere en la teatro multaj homoj salutis vin. Post la apero de viaj lastaj artikoloj oni parolas pri vi kaj pri via kuraĝo.

-Iu devas esti kuraĝa. La homoj flustras unu al alia, sed neniu kuraĝas voĉe diri kio okazas en la urbo.

Veselin kaj Milena supreniris al la kvara etaĝo kaj eniris en la loĝejon. Kiam Milena ŝlisis la pordon de interne la ŝlosilo rompiĝis kaj la duono el ĝi restis en la seruro.

-Ĝi rompiĝis – preskaŭ ekkriis Milena. – nun ni estas malliberigitaj en la loĝejo.

Veselin rigardis la seruron. Eblis fari nenion.

-Ne maltrankviliĝu – diris li. – Morgaŭ mi vidos kiel ni povus eliri.

Liaj vortoj iom trankviligis Milenan.

-Mi esperas, ke morgaŭ vi sukcesos ripari la seruron – diris ŝi. – Mi havas konjakon. Ni trinku iomete por varmigi nin.

Milena prenis el la servico-ŝranko botelon da konjako, du glasojn kaj ŝi verŝis iom da konjako en la glasojn.

-Baldaŭ estos Kristnasko – diris Milena, rigardante la sukcenkoloran konjakon en la glasoj. – Vi estos kun viaj edzino kaj filo en Serda, sed mi estos sola ĉi tie.

-Estas ankoraŭ frue pensi pri tio – diris Veselin.

-Jes, sed la festoj proksimiĝas kaj tio turmentas min.

-Ĉu vi ne festos kun viaj gepatroj?
-Eble, sed kiam mi estas kun ili, mi ne fartas bone.
-Vi scias, ke mi estas edziĝinta kaj mi havas filon.
-Mi ne riproĉas vin. Mi nur diras, ke mi ne ŝatas la festojn.

-Vi estas sincera – diris Veselin.
-Ĉu mi mensogu? – alrigardis lin iom triste Milena.
-Fojfoje estus pli bone mensogi. La vero doloras. Kial ni devas dolorigi unu la alian?
-Ne estas etaj mensogoj. Kiam vi pentras, vi estas sincera. Oni ĉiam devas esti sincera. Ne gravas ĉu oni pentras aŭ amas. Oni ĉiam devas esti sincera – ripetis Milena iom malgaje.

Veselin vidis, ke la konversacio ekfariĝis malĝoja kaj li ĉesigis ĝin.

-Morgaŭ mi vekiĝos pli frue kaj mi provos ripari la seruron kaj malfermi la pordon – diris li.

-Ne estos facile. Mi pli volonte restos ĉi tie ŝlosita kun vi – diris Milena.

-Mi ne kredas tion – ridis Veselin. – Vi ne povas pasigi eĉ unu tagon sen laboro. Via laboremo estas granda. Mi tamen volonte restus kuŝanta en la lito.

Milena rigardis lin mire.

-Ĉu? Vi ĝis nun ne diris al mi, ke vi tiel multe ŝatas dormi.

Milena proksimiĝis al li kaj kare kisis lin.

En la malluma kaj silenta ĉambro aŭdiĝis la anhela spirado de Milena. Ŝi fleksiĝis pasie. La luna lumo, kiu penetris tra la fenestro lumigis ŝian belegan nudan korpon. Veselin admiris ŝiajn malmolajn mamojn, similajn al du maturaj aromaj pomoj. Ŝia kolo estis tenera kaj glata, ŝiaj femuroj - kvazaŭ ĉizitaj el marmoro. Sur la frunto de Milena brilis ŝvitgutoj kiel etaj perlamotoj.

Ili ekdormis unu ĉe la alia. Matene, kiam la pala vintra suno aperis, Veselin vekigis. Li tuj iris en la banejon, banis sin, poste li iris en la kuirejon kaj kuiris kafon. La agrabla tikla aromo de la varma kafo sentebliis en la tuta loĝejo. Veselin verŝis kafon en du glasetojn kaj li portis ilin en la dormĉambron. Veselin metis la glasetojn sur la tableton ĉe la lito. Li sciis, ke la kafaromo vekos Milenan. Post nur kelkaj sekundoj ŝi malfermis okulojn. Nun Milena similis al eta senkulpa knabino, kiu vekigis post belega mirinda sonĝo. Ŝi dolĉe oscedis.

-Bonan matenon. La kafo atendas vin – diris Veselin.

-Bonan matenon – ridetis kare Milena.

-Ĉu vi bone dormis?

-Antaŭ la vekigo mi sonĝis interesan sonĝon – diris Milena.

Do, mi tion supozis, meditis Veselin.

-Ni ambaŭ estis en la restoracio “Danuba Renkontiĝo” ĉe la bordo de Danubo. Ja, mi jam menciis al vi pri tiu ĉi eta kaj agrabla restoracio, survoje al vilaĝo Dulo.

-Jes.

-En la restoracio estis neniu alia, nur ni. Ni tagmanĝis bongustan fiŝsupon. Estis printempo aŭ en la komenco de la somero. Poste ni eliris el la restoracio man-en-mane kaj ni eniris la etan akacian arbaron. Ni iris unu ĉe la alia, sed subite mi vidis, ke vi ne estas ĉe mi. Mi komencis serĉi vin. Mi kuris en la arbaro. Mi stumblis, falis, ekstaris kaj denove kuris. Mi rigardis al la branĉoj de la arboj kaj mi terurigis. Sur ili ne estis folioj, sed grandaj fiŝoj, ĉu siluroj aŭ ezokoj. Mi daŭre kuris. La fiŝoj frapis mian kapon. Nenie mi trovis vin. Vi malaperis kaj mi estis sola en la arbaro kun la teruraj fiŝoj.

-Vi havas tre riĉan fantazion. Certe la fantazio de la ĵurnalistoj estas kiel maro.

-Tio ne estas fantazio, sed sonĝo – diris Milena iom ofendite.

-Bonega sonĝo – ridetis Veselin. - Tamen kio estas sonĝoj? Bildoj, epizodoj, kiujn nia konscio iel strange kunmetas kaj poste ekestas io tute sensenca kaj stulta.

-Vi ne pravas. La sonĝoj estas alia mondo, same reala kiel la mondo, en kiu ni vivas, tamen ni ne povas kompreni la mondon de la sonĝoj, ni ne povas deĉifri ĝin.

-Ne pensu pri via stulta sonĝo, sed trinku la kafon. Mi devas malfermi la pordon kaj ekiri al la fabriko.

Post dek minutoj Milena estis vestita.

-Ĉu vi havas iajn ilojn: martelon, ŝraŭbilon, tenajlon – demandis Veselin.

-Ne. Mi ne havas.

-Estos tre komplika – diris Veselin. – Verŝajne ni restos ĉi tie por ĉiam.

-Ni devas danki al la sorto. Ni estos feliĉaj – ridis Milena.

-Vi telefonu al seruristo – proponis Veselin.

-Mi havas pli bonan ideon – diris Milena. – Tra la balkono mi iros en la najbaran loĝejon. Mia najbaro, oĉjo Stojan, estas ŝoforo de aŭtobuso. Li certe havas plurajn ilojn kaj li sukcesos malfermi la pordon de ekstere.

-Bone, sed estu tre atentema kaj ne forgesu, ke vi loĝas sur la kvara etaĝo.

-Ne zorgu.

Tra la balkono Milena tre lerte eniris en la najbaran loĝejon. Post nelonge de ekstere aŭdiĝis frapoj. Oĉjo Stojan sukcesis malfermi la pordon. Milena revenis kaj diris:

-Ĉio estas en ordo. La pordo estas malfermita. Nun mi telefonos al seruristo por ke li venu ripari la seruron.

-Mi devas ekiri al la fabriko – diris Veselin. – Ĝis revido. Vespere ni denove estos kune.

11.

Tutan semajnon Milena kaj Veselin ne renkontiĝis. Veselin havis multe da laboro en “Afrodito” kaj Milena ofte veturis. Pri la laboro de Milena Veselin eksciis de ŝiaj artikoloj, kiuj aperis en ĵurnalo “Kuriero”. Milena evitis verki en la ĉeesto de Veselin. Se li neatendite venis en ŝian loĝejon, ŝi tuj ĉesis labori kaj ŝi malŝaltis la komputilon.

Milena ne ŝatis, kiam Veselin telefonis al ŝi en la redaktejo. Nur foje ŝi konatigis lin kun sia koleginino. Kutime Veselin kaj Milena ne renkontiĝis en kafejoj aŭ en restoracioj. La sola escepto estis kiam Veselin invitis Milenan al la restoracio “Olimpo”.

Foje Veselin iris sur la ĉefa strato de la urbo kaj subite li vidis Milenan kaj alian virinon. Milena haltis kaj diris al la virino:

-Elen, Mi ŝatus konatigi vin kun la pentristo Veselin Kanazirev. Li loĝas en Serda, sed nun laboras en nia urbo.

Elen scivole rigardis Veselinon. Milena ne diris al Elen de kie ŝi konas Veselinon. Veselin same alrigardis Elenon. Ŝi estis simpatia virino, eble samaĝa kiel Milena. Elen havis longan kaŝtankoloran hararon, blujajn okulojn kun petolema rigardo. Veselin tamen ne eksciis ĉu Elen estas ĵurnalistino aŭ nur konatino de Milena.

Ĉi-vespere Veselin estis hejme kaj li pentris. Li devis finpentri la pejzaĝon de la malnova urba kvartalo. Ekstere neĝis, estis malvarme kaj la vintra vento siblis. La sonorilo ĉe la pordo sonoris. Veselin tuj komprenis, ke sonoras Milena. Nur ŝi kutimis tiel haste premi la sonorilon. Tamen estis jam malfrue vespere kaj Veselin miris kial Milena venas tiel malfrue. Li ekiris al la pordo. Estis Milena.

-Bonvolu – diris Veselin.

Milena eniris. Ŝi demetis siajn blankajn mantelon, ĉapelon kaj ŝalon. Veselin vidis, ke Milena estis maltrankvila kaj streĉita.

-Kio okazis? – demandis li.

-Ĉu mi povus dum kelkaj tagoj loĝi ĉi tie? – demandis Milena.

Tiu ĉi demando ege mirigis Veselinon. Milena ne tre ofte tranoktis en la loĝejo de Veselin. Ŝi ĉiam diris, ke ŝi preferas dormi en sia lito.

-Kio okazis? – denove demandis Veselin pli insiste.

-Mi diros al vi – ekflustris Milena.

Nun Veselin rimarkis, ke ŝi portas grandan sakon. Ili eniris la dormoĉambron. Milena sidis sur la liton kaj iom ŝi kuntiriĝis. Eble ŝi trankviliĝis.

-Mi ne deziris ĝeni vin, sed la misteraj telefonalkvokoj ne ĉesas.

-Kion vi diras?

-Vi memoras, ke kiam mi revenis el la hospitalo, la telefono hejme sonoris, sed neniu parolis.

-Jes.

-Jam tutan semajnon telefonas al mi diversaj viroj, kiuj ordonas, ke mi ne plu verku artikolojn pri la koruptoj. Ili minacis min.

-Ĉu?

-Mi ne levas la telefonaŭskultilon, sed la telefono ne ĉesas sonori. Mi restos ĉe vi dum kelkaj tagoj, por ke mi ne aŭdu la teruran sonoron de mia hejma telefono.

-Ĉu vi telefonis al la polico? – demandis Veselin.

-Ne. Mi deziris unue diri al vi.

-Morgaŭ ni nepre telefonu al la polico – diris Veselin.

-Jes.

-Ĉu vi supozas kiu aŭ kiuj telefonas kaj minacas vin?

-Jes. Mi supozas, sed mi ne povas pruvi tion.

Milena rigardis la pejzaĝon de Veselin kaj kvazaŭ al si mem ŝi diris:

-Mi sciis, ke tio okazos.

-Jes. Vi verkis artikolojn pri friponoj. Nun, kion vi faros?

-Mi daŭrigos verki pri ili. Mi estas ĵurnalistino. Mi devas verki!

-Ĉu vi bone pripensis?

-Jes. Mi ne povas kaŝi min tutan vivon. Mi havas nur du eblecojn: aŭ esti ĵurnalistino, aŭ ne esti. La dua ebleco ne plaĉas al mi. Mi deziras esti ĵurnalistino.

Milena denove alrigardis la pejzaĝon.

-Ja, vi estas pentristo kaj vi same ne povas esti io alia, ĉu ne? Ni mem elektis tiujn ĉi profesiojn kaj ni devas esti fidelaj al ili.

-Vi pravas. Mi estas pentristo kaj dum la tuta vivo mi estos pentristo – diris Veselin.

-Oni riparis la seruron de la pordo en mia loĝejo – diris Milena. – Estas nova ŝlosilo. Bonvolu preni ĝin. Dum mi estas ĉe vi, denove iru hejmen kaj alportu al mi la leterojn kaj la ĵurnalojn. Eniru en la loĝejon kaj vidu ĉu iu estis en ĝi.

-Bone.

-Nun mi certas, ke dum mi estis en la hospitalo, iu estis en mia loĝejo. Mi ne kredis, sed nun mi scias. Oni serĉis gravajn dokumentojn, kiuj feliĉe ne estis en mia loĝejo.

Veselin rigardis ŝin. Milena estis malalta, maldika, sed forta. Ŝi havis energion, impeton. Ŝi ne timis kaj nenio povis timigi ŝin. Nun ŝi pripensis kiel agi estonte.

-Mi deziras helpi vin – diris Veselin.

-Nenion vi povas fari – ekridetis Milena. – Mi jam estis en simila situacio kaj jen, mi ankoraŭ estas viva.

Ŝi elprenis libron el la sako, kiun ŝi portis, ŝi eksidis sur la liton kaj komencis legi.

-Vi daŭrigu la pentradon – diris Milena. – Mi iom legos.

12.

Hodiaŭ Veselin pli frue revenis el la fabriko.

-Saluton – diris li.

-Saluton.

-Kiel vi pasigis la tagon? – demandis Veselin Milenan.

-Tre bone. Mi estis ĉi tie. Mi legis, spektis televizion... Feliĉe neniuj telefonis. Neniuj serĉis vin. Mi opiniis, ke se mi estus en via loĝejo, mi eksciis ĉu estas aliaj virinoj, kiuj serĉas vin, sed vi povas esti trankvila. Neniuj nekonataj virinoj serĉis vin telefone hodiaŭ.

-Mi ne kredas, ke vi havis paciencon tutan tagon esti hejme – diris Veselin.

-Jes. Vi bone konas min. Mi ne havis paciencon kaj posttagmeze mi iris en la redakcejon. Poste mi iom promenis en la centro de la urbo. La vendejoj jam estas tre belaj. En ili estas kristnaskaj ornamaĵoj. La homoj aĉetas donacojn kaj ĉie estas bela, festa etoso.

-Jes. Kristnasko proksimiĝas – diris Veselin.

-Mi same aĉetis por vi ion – diris Milena.

-Kion?

-Tiun ĉi libron “La vivo de Pikaso”. Tamen ĝi ne estas kristnaska donaco por vi. Vi ricevos la kristnaskan donacon dum la festo.

-Koran dankon – diris Veselin kaj li kisis ŝin. – Vi same ricevos kristnaskan donacon de mi.

-Kiam vi ekveturos al Serda? – demandis Milena.

-Morgaŭ matene.

-Ĉu morgaŭ?

-Jes. Mi devas esti posttagmeze hejme por helpi pri la festaj preparoj.

-Havi familion ne estas facile – alrigardis lin Milena. – Ĉu vi jam aĉetis donacojn al viaj edzino kaj filo?

-Mi aĉetos ilin en Serda.

-Ne forgesu. Mi atendos vin. Mia voĉo veturos kun vi al Serda.

-Mi scias. Neniam mi forgesos vian voĉon – diris kare Veselin. – Mi rapidos reveni.

-Pardonu min – diris Milena. – Mi ne deziras ĝeni vin per miaj zorgoj. Ĉu hodiaŭ vi estis en mia loĝejo?

-Jes. En via poŝtkesto estis nenio, nek leteroj, nek ĵurnaloj. Mi estis en via loĝejo kaj tie ĉio estis en ordo. Certe neniu estis en ĝi.

-Tio estas bona novaĵo – ekridetis Milena. – Nun ĉiuj pensas pri la festoj kaj oni forgesis min.

-Ĉu hodiaŭ vi iris en la policejon informi pri la misteraj telefonalkvokoj? – demandis Veselin.

-Ne. Mi pripensis. Tute ne necesas informi la policon. La policianoj ne povas helpi min.

-Vi ne pravas. La problemo estas tre serioza.

-Nun mi ne deziras pensi pri tiu ĉi problemo. Proksimiĝas belaj festoj kaj mi deziras pensi pri io bona kaj gaja. Mi havas proponon – diris Milena.

-Kian proponon? – alrigardis ŝin Veselin.

-Ĉi-vespere ni iru en la restoracion “Danuba Renkontiĝo”. Mi invitas vin. Mi regalos vin tie per bongusta fiŝsupo kaj per tre bona ruĝa vino. Hodiaŭ oni donis al mi la honorarion de miaj artikoloj.

-Kial vi decidis, ke ni iru tien hodiaŭ? – demandis Veselin.

-Morgaŭ vi forveturos. Dum kelkaj tagoj ni ne estos kune. Ni iru hodiaŭ. La restoracio troviĝas ekster la urbo kaj nun, antaŭ la kristnaskaj festoj, en ĝi ne estas multaj homoj.

“Danuba Renkontiĝo” ne estis malproksime, nur je dek kilometroj de la urbo. Tie, ĉe la bordo de Danubo, estis tilia arbaro, sed ne akacia kiel foje diris Milena. Sur la neĝa ŝoseo ne videblis aŭtoj. Dum Milena kaj Veselin veturis, en la aŭto sonis agrabla muziko. Ambaŭ silentis. Veselin pensis, ke dum kelkaj tagoj li estos en Serda, malproksime de Milena kaj tio ĉagrenis lin. Veselin ne tre ŝatis la festojn. Li ne ŝatis la streĉitan antaŭfestan tumulton, la vagadon tra la vendejoj, la aĉetadon de donacoj. Neda, lia edzino, tamen tre ŝatis aĉetadi.

Ŝi povis de matene ĝis vespere esti en vendejoj kaj nenie ŝi trovis tion, kion ŝi deziris aĉeti. Neda deziris, ke Veselin ĉiam estu kun ŝi en la vendejoj, sed la bruoj kaj la homoj tie lacigis lin. Li tute ne havis paciencon atendi ĉe la vicoj da homoj. Tio nervozigis lin.

Same hejme Veselin ne fartis bone. Antaŭ la festoj Neda kutime komencis grandan purigon de la loĝejo kaj Veselin devis partopreni en tiu ĉi purigado. Post la purigo, ŝi komencis kuiru. Por la festoj Neda kuiris plurajn manĝaĵojn: salatojn, supojn, diversajn pladojn, desertojn. Sekvis la festa vespermanĝo, sed ĉiuj jam estis lacaj. La gepatroj de Neda kutime venis frue kaj Veselin devis renkonti ilin kaj esti tre afabla al ili.

La ŝoseo al la restoracio estis glata kiel vitro. La neĝo kovris la kampon kaj la montetojn ĉe la vojo. Milena sidis ĉe Veselin en la aŭto kaj silentis. Ŝi ne demetis la blankan ĉapelon, el kies rando videblis ŝia latunkolora hararo.

En la restoracio estis nur kelkaj personoj. En la salono videblis kameno kaj estis varme. Veselin kaj Milena sidis proksime al la kameno.

-Ni ĵus alvenis ĉi tien kaj jam mi flaras la bonodoron de la fiŝsupo – diris Milena. – Tamen antaŭ la fiŝsupo mi ŝatus manĝi salaton. Poste ni trinkos ruĝan vinon.

-Mi ne trinkos vinon – diris Veselin – ja mi ŝoforas.

Venis la kelnero kaj Milena mendis la salatojn kaj la fiŝsupojn.

-Mi ŝatas tiun ĉi etan restoracion – diris ŝi. – Kiam vi revenos el Serda, ni pli ofte estu ĉi tie. Ĉi tie estas trankvile kaj agrable. Eble vi pentros la restoracion. Printempe kaj somere la naturo ĉirkaŭ ĝi estas fabela.

-Estas same bele vintre – diris Veselin.

-Printempe ni promenados en la arbaro. Tie, proksime, estas monteto, kies nomo estas Lupa Monteto. De tie tre bone videblas Danubo. Ĉe la bordo de la rivero estas kajo. Tie ofte

estas fiŝkaptistoj. Mi konas unu el ili. Li estas oĉjo Vidin. Li havas boaton kaj foje ni promenados boate sur Danubo.

-Bonege! – diris Veselin.

-Somere ni naĝos en Danubo. Estos tre bele. Kiam mi estis gimnaziano mi ofte venis naĝi en Danubo.

-Eble vi naĝis kun iu via amato? – ekridetis Veselin.

-Eble – enigme respondis Milena.

Du horojn ili pasigis en la restoracio kaj kiam ili ekveturis al Belamonto ambaŭ estis en bona humoro.

Matene Veselin vekiĝis frue. Li banis sin, razis sin kaj kuiris kafon. Ambaŭ sidis ĉe la tablo por trinki ĝin. Veselin vidis, ke Milena estas malĝoja. Ja, li forveturos. Ŝi devis resti sola en lia loĝejo dum la festoj.

-Kial vi ne iros al viaj gepatroj dum la festoj? – demandis ŝin Veselin.

-Mi ankoraŭ ne decidis ĉu mi iru aŭ ne – respondis Milena.

Veselin sentis konscienciproĉon. Li ne devis komenci tiun ĉi amon. Ja, li estis dek jarojn pli aĝa ol Milena. Li estis edziĝinta, havis filon. Per tiu ĉi amrilato li riskis detrui sian familian vivon. Veselin tamen ne deziris ĉagreni Milenan. Li fintrinkis la kafon kaj ekstaris.

-Mi devas ekiri – diris li.

Li surmetis la mantelon kaj prenis la sakon. Milena staris ĉe li.

-Ne forgesu. Mia voĉo estos kun vi – diris ŝi malĝoje. – Mi atodos vin.

-Mi same estos kun vi – diris Veselin.

En la okuloj de Milena ekbrilis larmoj kiel matena roso.

-Ne stiru rapide. Nun la vojoj estas neĝaj – diris ŝi.

-Pli bone estus, se dum la festoj vi estu ĉe viaj gepatroj – denove diris Veselin. – Tie vi estos pli trankvila kaj vi ne estos sola.

-Bone.

Ili kisis unu la alian. Veselin ankoraŭfoje rigardis ŝiajn belajn okulojn.

Milena ŝlisis la pordon post li.

13.

Veselin estis laca. Kiel ĉiuj Kristnaskaj kaj Novjara festoj ankaŭ tiuj ĉi estis bruaj kaj lacigaj. Enuigaj babiladoj kaj manĝado. Veselin rapidis reveni en Belamonton. Dum la festoj la plej feliĉaj estis Neda kaj Vlad. Neda ricevis multajn donacojn de siaj gepatroj. Veselin donacis al ŝi belan robon, faritan en “Afrodito”. La robo estis ĉerizkolora kun ornamaĵoj. Veselin donis al Neda monon kaj kiam ŝi prenis la koverton kun la mono, ŝia vizaĝo ekbrilis.

-Ni jam havas sufiĉe da mono – diris ŝi – kaj ni povas aĉeti novan loĝejon. Nia revo baldaŭ realiĝos.

Veselin donacis al Vlad elektronikan ludilon. Iun posttagmezon Veselin iris el la domo sola kaj li aĉetis donacon por Milena – blankan puloveron. Ja, Milena ŝatis la blankan koloron. Ŝi havis blankan ŝalon, blankan ĉapelon. La vendistino demandis Veselin en kia grandeco estu la pulovero. Veselin tamen ne povis respondi. Li alrigardis la vendistinon kaj diris:

-Mi opinias, ke ĝi devas esti tiom granda kiel via pulovero.

La vendistino estis juna, simpatia kaj verŝajne ŝi tuj konjektis, ke la pulovero estas por amatino. Ŝi mem surhavis similan puloveron, sed ruĝan.

-Tiu ĉi certe estos bona – diris ŝi kaj donis al Veselin blankan puloveron.

Veselin kaŝis la puloveron, por ke Neda ne vidu ĝin.

Post la festoj li tuj ekveturis al Belamonto. Kiam la aŭto eliris el Serda, Veselin telefonis al Milena, sed ŝi ne respondis. Eble ŝia telefono ne funkcias, supozis Veselin. Post iom da tempo li denove telefonis, sed vane. Milena ne respondis.

Kutime ŝia telefono ĉiam funkcias. Ofte Veselin ŝerce diris, ke la poŝtelefonon oni inventis speciale por Milena. Ŝi ne povis ekzisti sen poŝtelefono. Senĉese Milena uzis ĝin kaj ĝi estis tre necesa por ŝia laboro. Dum iom da tempo Veselin stiris la aŭton, rigardante la senfinan neĝan kampon. Antaŭ li la ŝoseo brilis kiel arĝenta rivero. Ankoraŭ dufoje li provis telefoni al Milena, sed ĉiam malsukcese.

Veselin venis en Belamonton tagmeze. Li parkis la aŭton antaŭ la domo kaj tuj li ekkuris al sia loĝejo, sed Milena ne estis tie. La ĉambroj dronis en silento. Veselin atente trarigardis ilin. Eĉ spuro ne estis de Milena. Ĉio estis tiel kiel antaŭ kelkaj tagoj, kiam li ekveturis. Sur la tableto staris la malplena kafglaseto de Milena. Eble ŝi iris ien, sed eĉ noteto ne troveblis de ŝi. Dum iom da tempo Veselin restis en la loĝejo, kiu nun aspektis al li tre granda. Kion fari? Li supozis, ke subite la telefono eksonoros kaj li aŭdos la voĉon de Milena. Li decidis iom atendi kaj li sidis proksime al la hejma telefono. La minutoj pasis terure malrapide. Nun li komprenis kiel forte li amas Milenan. Ŝi estis grava parto el lia vivo.

-Eble mi fariĝis teda al ŝi – diris Veselin. – Ŝi trovis alian viron kaj ambaŭ ekveturis ien festi. Ja, ŝi estas juna, mi – aĝa. Ŝi devas pensi pri edzo, pri familio, pri infanoj... Mia vivo kaj mia profesio estas tre ordinaraj. Ŝia vivo estas emocia kaj varia. Mi nenion povas promesi al ŝi.

Veselin elprenis el la sako la blankan puloveron, kiun li aĉetis al Milena kaj metis ĝin en la vestoŝrankon. Ĝi plu ne estis bezonata. Dum li veturis, li kvazaŭ vidis kiel li donacos ĝin al Milena, li kvazaŭ vidis ŝian rideton kaj ŝian vizaĝon, lumigitan de ĝojo kaj sunbrilo. Poste li imagis ŝian varman kison. Sed tio estis nur revoj.

Tutan horon Veselin sidis senmova. La telefono ne sonoris. Subite lia poŝtelefono eksonoris kaj lia koro forte ekbatis. Per tremanta mano li prenis la telefonon. Estis granda senreviĝo. Telefonis Neda. Ŝi demandis lin ĉu li bone veturis kaj ĉu li jam estas en Belamonto. Neda diris al li, ke nun ŝi

deĵoras en la hospitalo. Veselin provis rapide fini la konversacion kun ŝi. Li daŭrigis atendi telefonalkvokon de Milena. En la silenta ĉambro kiel mitralaj pafoj tiktakis la vekhorloĝo.

Veselin ne povis plu atendi. Li ekstaris, vestis sin kaj eliris. Li decidis iri en la loĝejon de Milena. Li nepre devis renkontiĝi kun ŝi. Li ne povis imagi, ke ŝi foriris kaj neniam plu li vidos ŝin. Veselin deziris demandi ŝin kio okazis, kial ŝi subite foriris? Ĉu li estas la kialo, ĉu li ofendis ŝin? La demandoj atakis lin kiel aro da vespoj. Li jam estis nervoza, sed ia voĉo flustris al li: "Kial vi tiom pensas pri ŝi? Lasu ŝin. Se ŝi decidis foriri de vi, ŝi foriru! Ne bedaŭru!"

Veselin provis silentigi kaj sufokigi tiun ĉi malican voĉon. Li rapide iris sur la strato al la loĝejo de Milena. Li trapasis la senhoman placon kun la horloĝa turo kaj ŝajnis al li, ke li kvazaŭ paŝus en iu stranga kaj sorĉita urbo. La neĝaj arboj similis al timigaj blankaj siluetoj. Subite li rememoris la sonĝon de Milena, kiun ŝi rakontis al li pri la arbaro kun la arĝentaj fiŝoj sur la arboj. Nun tiu ĉi sonĝo ŝajnis al li terura.

Veselin venis al la domo de Milena. Li iris sur la kvaran etaĝon kaj li haltis antaŭ la pordo de la loĝejo. Li stuporiĝis. La pordo estis malfermita. Malrapide, atente Veselin eniris la loĝejon. Li ĉirkaŭrigardis. Ene ĉio estis renversita kaj disĵetita: tirkestoj, libroj, vestoj. Iu serĉis ion ĉi tie. Sur la planko kuŝis roboj kaj subvestoj de Milena. Kelkajn minutojn Veselin staris senmova kvazaŭ fulmo trafis lin. Kion fari? Nur tion li ne supozis. En la loĝejo regis ĥaoso.

Veselin malrapide eliris kaj ekiris al la polico. Li paŝis kvazaŭ ebria. Certe io malbona okazis al Milena, sed kial? "Kie vi estas, kara?" flustris li delire. "Kial vi ne telefonis al mi?" Neniam li estis tiel frakasita. La supozo, ke al Milena okazis io terura paralizis lin. Lia stomako fariĝis kiel eta pilko. Surdorse li kvazaŭ havis grandan pezan ŝtonon. Veselin daŭre flustris: "Kie vi estas? Kio okazis?" Milena ĉiam diris, ke ŝia voĉo estos kun li, sed nun ŝia voĉo mankis.

14.

En la policejo alta iom dika policano demandis Veselin:

-Kio okazis, sinjoro?

-Mi deziras informi pri virino, kiu malaperis.

La policano alrigardis lin suspektinde.

-Kiel malaperis?

-Ŝi ne estas hejme.

-Ĉu vi estas certa?

-Jes. Mi serĉis ŝin, sed oni prirabis ŝian loĝejon kaj ŝi ne estas en la loĝejo. Mi telefonis al ŝi, sed ŝia telefono ne funkcias – klarigis Veselin.

-Kiu vi estas?

-Mi estas ŝia konato.

-Ĉu nur konato kaj ne parenco? – demandis la policano.

-Jes. Nur konato.

-Konato, ĉu ne? – en la voĉo de la policano eksonis ironio.

Verŝajne li supozis, ke Veselin estas ne konato, sed amanto.

-Jes – ripetis Veselin pli firme.

-Bonvolu diri vian nomon.

-Mia nomo estas Veselin Kanazirev.

-Kio estas via profesio? – demandis la policano.

-Mi estas pentristo en la fabriko “Afrodito”.

-Kial la parencoj de la virino ne venis informi pri ŝia malapero? Verŝajne ŝi havas familion, gepatrojn?

-Ŝi estas eksedziniĝinta. Ŝi ne havas infanojn kaj ŝiaj gepatroj verŝajne ankoraŭ ne scias pri ŝia malapero. Ili loĝas en vilaĝo Verda Valo – klarigis Veselin.

-Kiel nomiĝas la virino?

-Milena Iskreva.

-Kio estas ŝia laboro?

-Ŝi estas ĵurnalistino de la ĵurnalo “Kuriero”.

-Kiel vi eksciis, ke ŝi malaperis? – demandis la policano kaj al Veselin ŝajnis, ke la demandoj jam estas tro multaj.

-Kelkfoje mi provis telefoni al ŝi. Ŝi ne respondis al miaj telefonalkvokoj. Tiam mi iris en ŝian loĝejon kaj mi vidis, ke iu prirabis la loĝejon. La pordo estis malfermita kaj en la loĝejo estis ĥaoso. Ŝi ne estis tie.

-Kiam vi vidis ŝin lastfoje?

Antaŭ la Kristnaskaj kaj Novjaraj festoj. Poste mi ekveturis al Serda. Hodiaŭ mi revenis.

-Jes. Mi komprenis – diris gravmiene la policano. – Nun mi donos al vi paperon kaj skribilon kaj vi devas priskribi ĉion, kion vi diris al mi. Vi detale skribu de kiam vi konas ŝin kaj kiel vi konatiĝis kun ŝi. Ĉu vi havas ŝian foton?

-Mi ne havas, sed en la redaktejo de la ĵurnalo “Kuriero”, kie ŝi laboras, eble estas ŝia foto.

-Bone. Sidu kaj skribu ĉion detale – ordonis la policano.

Veselin eksidis ĉe tablo en la policejo kaj komencis skribi. Li skribis du paĝojn kaj donis ilin al la policano, kiu komencis atente legi ilin.

-Bone – diris la policano. -Nur diru ankoraŭ vian adreson kaj la numeron de via poŝtelefono.

Veselin donis siajn adreson kaj telefonnumeron.

-Vi scias, ke laŭ la leĝo ni komencos serĉi ŝin dudekkvar horojn post la ricevo de la informo pri la malapero. Poste ni informos vin pri tio kio okazis. Ĝis reveno.

Veselin eliris el la policejo. Li estis kvazaŭ batita. Li ĉirkaŭrigardis. La policejo troviĝis en la centro de la urbo. Proksime estis la redaktejo de ĵurnalo “Kuriero” kaj li iris tien.

En la redaktejo estis du virinoj kaj mezaĝa viro.

-Bonan tagon – salutis ilin Veselin. – Mi ŝatus demandi vin ĉu vi scias kie estas Milena?

-Nenion ni scias – respondis la viro. – Lastfoje ni vidis ŝin antaŭ la Kristnaskaj festoj. Ŝi ne venis ĉi tien kaj ne telefonis al ni. Kiu vi estas kaj kial vi serĉas ŝin?

-Mia nomo estas Veselin Kanazirev. Mi estas ŝia konato. Same al mi ŝi ne telefonis kaj mi estas maltrankvila pri ŝi.

-Ho, vi estas ŝia mistera konato, ĉu ne? – ekridetis unu el la virinoj.

Veselin ŝajnigis, ke li ne aŭdis ŝin.

-Hodiaŭ mi estis en la loĝejo de Milena, sed ŝi ne estis tie. La loĝejo estis prirabita.

La gekolegoj de Milena fiksrigardis Veselin, kvazaŭ ili ne komprenis kion li diras.

-Ĉu? – demandis la viro.

-Jes. Eble oni ŝtelis ion el la loĝejo de Milena.

-Terure! – diris ĥore la virinoj.

-Vi certe scias, ke plurfoje oni minacis Milenan telefone. Oni avertis ŝin ne verki artikolojn pri la korupto de konataj kaj elstaraj personoj. Oni minacis murdi ŝin – diris Veselin.

-Ni scias. Oni ofte minacas nin – diris la viro. – Tia estas nia profesio.

-Mi estis en la policejo – diris Veselin – kaj mi informis la policon pri la malapero de Milena. Tie oni deziras havi ŝian foton. Ĉu ĉi tie, en la redakstejo, estas ŝia foto?

-Ni serĉos foton kaj ni donos ĝin al la polico – promesis la viro.

-Jen mia telefonnumero – diris Veselin – se vi eksciis ion pri Milena, bonvolu telefoni al mi.

Veselin donis la numeron de sia poŝtelefono al la viro.

15.

La sekvan matenon Veselin telefonis al la redakstejo. Li aŭdis la konatan voĉon de la viro kun kiu li parolis hieraŭ.

-Telefonas Veselin Kanazirev. Ĉu vi trovis foton de Milena?

-Ni ne trovis ŝian foton en la redaktejo – diris la viro. – Se la policanoj bezonas ion pri Milena, ili telefonu al ni – diris la viro iom malafable.

-Vi devas same telefoni al la polico – diris Veselin. – Ja, tutan semajnon Milena ne venas en la redaktejon kaj vi ne scias kio okazis al ŝi.

-Sinjoro Kanazirev, ni estas ĵurnalistoj kaj ne policanoj. Vi ne devas esti tiom emocia. Nun homo ne povas malaperi senspure. Milena certe venos.

-Tamen vi ne devas esti tiom trankvilaj – preskaŭ ekkriis Veselin kaj li ĉesigis la konversacion.

Veselin denove iris en la policejon, sed nun estis alia policano, pli juna, kaj al li same Veselin diris kio okazis. La policano kapjesis kaj diris:

-Ni jam okupiĝas pri tiu okazo, sinjoro.

-Tamen mi deziras scii kion vi konstatis – diris Veselin.

-Al vi ni ne devas raporti – diris la policano.

Veselin eliris el la policejo, kolera.

Vespere Veselin paŝis tie-reen en la loĝejo kaj li similis al sovaĝa besto en kaĝo. Jam du tagojn li atendis iun informon de la polico kaj tiu ĉi atendado nervozigis lin. Lia kapo bruis kiel terura akvofalo. Li estis senpova. Neniam li supozis, ke okazus tio. Ĉu vere Milena malaperis? Antaŭ semajno ili estis kune kaj nun ŝi estas nenie. Laca, elĉerpita, Veselin eksidis sur la liton. Subite la telefono eksonoris. Veselin saltis, levis la aŭskultilon kaj li aŭdis nekonatan voĉon:

-Kanazirev? – demandis viro.

-Jes – respondis Veselin. Lia gorĝo estis seka pro streĉiteco.

-Se vi ankoraŭfoje iros en la policon, via edzino en Serda ekscios pri via amrilato kun Milena – diris la viro.

-Kiu vi estas? Kiu vi estas? – ekkriis Veselin terurite, sed la viro ĉesigis la telefonadon.

Dum la tuta nokto Veselin ne povis ekdormi. Matene li tuj iris en la policejon por diri pri la viro, kiu telefonis kaj minacis lin. Veselin deziris, ke la policianoj komencu subaŭskulti la telefonparoladojn. Tio eble helpos ilin ekscii kio okazis al Milena.

Veselin eniris la policejon kaj diris al la deĵoranta policano, ke li deziras paroli kun la direktoro de la polico. La deĵoranta policano malafable diris:

-Tio nun ne eblas! Vi devas doni skriban peton kaj ni telefonos al vi kiam la direktoro akceptos vin.

-Mi estos ĉi tie ĝis vespere! – diris firme Veselin. – Mi atendos la direktoron por paroli kun li! Mi ne foriros de ĉi tie!

Finfine la deĵoranta policano telefonis al iu kaj poste li diris al Veselin:

-La direktoro atendas vin.

Veselin eniris en la kabineton de la direktoro. Ĉe granda masiva skribotablo sidis kvardekjara viro, malalta, iom kalva kun ronda vizaĝo kaj okuletoj, kiuj similis al okuletoj de porkido. Se Veselin vidus lin sur la strato, li neniam supozus, ke tiu ĉi viro estas la direktoro de la polico en Belamonto. Kelkajn minutojn la direktoro silentis, legante ion. Poste li alrigardis Veselin per siaj grizaj okuletoj kaj malrapide diris:

-Sinjoro Kanazirev, ĉu ne?

-Jes – respondis Veselin

-Mi ricevis vian informon pri la malapero de sinjorino Milena Iskрева. Tamen vi ne devis rapidi.

Veselin ne komprenis kion la direktoro deziris diri per la frazo: “Vi ne devis rapidi.”

-Mi havas kelkajn demandojn al vi, sinjoro Kanazirev – daŭrigis la direktoro. – Vi estis la persono, kiu vidis Milena Iskрева antaŭ ŝia malapero, ĉu ne? Kiam estis tio?

-La dudek duan de decembro, vendrede je la oka horo matene, antaŭ mia ekveturo al Serda – respondis precize Veselin.

-Kie vi vidis ŝin? – demandis la direktoro.

-En mia loĝejo – respondis Veselin trankvile.

-Kial en via loĝejo? – sur la ronda vizaĝo de la direktoro aperis ruzeta rideto, per kiu li kvazaŭ dezirus diri: “Ĉio estas klara. Vi vidis ŝin en via loĝejo kaj ĉu hazarde ŝi ankoraŭ ne estas tie?”

-Ni estas geamikoj – respondis Veselin.

-Ĉu ŝi dormis en via loĝejo?

-Ĉu tio gravas? – demandis Veselin kolere.

-Ĉio gravas, sinjoro Kanazirev. Kiam la polico serĉas homon, kiu malaperis, la polico devas scii ĉiujn detalojn kaj ni devas esplori ĉion – gravmiene diris la direktoro. -Do, ni daŭrigu – diris li kaj denove fiksrigardis Veselin. – Kiam vi revenis el urbo Serda kaj kiam vi vidis, ke la loĝejo de sinjorino Iskreva estas malfermita kaj eble – prirabita?

-La duan de januaro.

-Do, la duan de januaro vi estis en la loĝejo de sinjorino Iskreva.

-Jes.

-Kion vi faris tie?

-Mi iris serĉi ŝin – respondis Veselin. Jam li estis sufiĉe nervoza.

-Jes. Strange – diris la direktoro kaj denove li ruzete ekridetis.

-Ĉu vi suspektas min? – ne eltenis Veselin. – Tio estas stultaĵo!

-Mi diris al vi, ke eĉ la plej eta detalo estas grava. Ĉu vi deziras diri ankoraŭ ion, kion eble vi forgesis? – la direktoro denove fiksrigardis Veselin kaj li emfazis la vorton “eble”.

-Jes. Mi komprenas, ke vi suspektas min, sed mi diros al vi, ke kiam Milena Iskreva venis al mi, ŝi diris, ke nekonataj viroj minacas ŝin telefone. Ŝi estis tre timigita. Hieraŭ vespere iu viro telefonis al mi kaj avertis min, ke mi ne plu informu la policon pri la malapero de Milena.

-Ĉu? Kial sinjorino Iskreva ne informis la policon, ke oni minacas ŝin? – demandis la direktoro.

-Mi ne scias kial ŝi ne informis la policon.
-Ĉu nun vi elpensis tion, sinjoro Kanazirev? – denove ruzete ekridetis la direktoro.
-Kion? – ne komprenis Veselin.
-Ke iu minacis sinjorinon Iskreva.
-Kiel eblas? Ĉu vi primokas min? – Veselin alrigardis kolere la direktoron.
-Bonvolu esti pli trankvila. Mi tute ne komprenas kial iu minacas kaj sinjorinon Iskreva kaj vin? Ĉu estas kialo minaci vin ambaŭ?
-Anastataŭ serĉi Milenan Iskreva, vi pridemandas min kvazaŭ mi estus krimulo kaj mensogulo!
-Neniu estas krimulo antaŭ la pruvo – diris gravmiene la direktoro. – Nun vi estas libera. Se necesas, ni denove pridemandos vin.
Veselin eliris el la policejo ŝvita, nervoza.

16.

Vespere Veselin iris en restoracion “Olimpo”. Li ne deziris resti hejme. La loĝejo aspektis al li fremda, obskura, dezerta. Ĝi similis al kavo, en kiu Veselin ne povis eĉ minuton esti. La profunda silento en ĝi turmentis lin. Ŝajnis al li, ke iuj kvazaŭ kaŝus sin en la anguloj de la loĝejo kaj embuskus lin. Senĉese Veselin demandis sin: “Kio okazis al Milena? Kie ŝi estas?” Li kvazaŭ vidis ŝiajn kolombkolorajn okulojn, flaris ŝian harararomon.

Image li demandis Milenan: “Kion vi faris? Kial vi verkis tiujn ĉi kritikajn artikolojn? Kial vi priskribis la friponaĵojn, la ŝtelojn de la elstaraj personoj? Ĉu vi vere kredis, ke oni kondamnos ilin? Kiuj minacis vin?”

Ŝajnis al Veselin, ke la polico ne rapidas serĉi Milenan. La direktoro de la polico suspektis Veselin kaj Veselin decidis ne plu iri en la policejon. Li ankoraŭ esperis, ke lia telefono subite eksonoros kaj li aŭdos la voĉon de Milena aŭ eble ŝi

neatendite venos en lian loĝejon. Se ŝi venus, li decidis ne demandi ŝin kie ŝi estis. Se ŝi dezirus, ŝi rakontus al li ĉion.

Veselin ĉirkaŭrigardis. Ŝajnis al li, ke tre longe li sidas en la restoracio kaj li rigardas la menuliston. La kelnerino, svelta, nigraokula junulino, proksimiĝis al li.

-Kion vi bonvolus, sinjoro? – demandis ŝi.

-Mi ankoraŭ ne decidis – diris Veselin embarasite.

La kelnerino iris al la najbara tablo. Veselin rigardis post ŝi kaj li vidis, ke tie sidas Patrakov, kun du junuloj, verŝajne liaj gardistoj. Veselin nevole fermis okulojn. Tiel estis dum la vespero, kiam li kaj Milena estis ĉi tie, en la sama restoracio “Olimpo”. Tiam ĉe la najbara tablo sidis Partrakov. Ĉio ripetigas. Ŝajnis al Veselin, ke li aŭdus la voĉon de Milena kaj ŝian flustron: “Patrakov estas la plej riĉa persono en Belamonto. Li posedas du fabrikojn. Tamen oni ne scias kia estas lia vera okupo. Oficiale lia ĉefa agado estas produktado de mebloj. Liaj fabrikoj estas fabrikoj pri mebloj, sed ŝajnas al mi, ke tio estas nur preteksto.”

Veselin malfermis la okulojn. Li certis, ke li vidos Milenan ĉe si, tamen ĉe li estis neniŭ. Tiam Milena diris, ke ŝi montros la krimagojn de Patrakov. Veselin denove rigardis al la najbara tablo, sed tie estis neniŭ. “Ĉu mi sonĝis? – demandis sin Veselin. – Ĉu mi imagis, ke mi vidis Patrakovon? Vestrŝajne mi halucinas.”

Veselin ekstaris kaj eliris el la restoracio. Ekstere blovis glacia vento. La stratoj estis neĝaj. Malrapide Veselin ekiris hejmen. Sur liaj ŝultroj kvazaŭ estis pezaj ŝtonoj. Li paŝis malrapide. La vintra vento malice siblis.

Tiun nokton Veselin denove dormis malbone. Li sonĝis, ke li kuras sur senfina ŝoseo. Iu persekutis lin. Li ne sciis kial li kuras, kial li ne estas en la aŭto. Li deziris rememori kie estas la aŭto. Lia koro freneze batis. Verŝajne li neniam plu havos aŭton. Subite li aŭdis molajn paŝojn. Iu proksimiĝis al la lito. Veselin vekiĝis, saltis tremanta kaj ŝvita de la lito. Li lumigis la ĉambron, sed neniŭ estis en ĝi. Regis

nokta silento. Veselin ekpaŝis al la pordo. Li denove rememoris la sonĝon de Milena. Li rememoris la restoracion “Danuba Renkontiĝo”, la tilian arbaron kaj la arĝentajn fiŝojn sur la branĉoj de la arboj. Ja, Milena diris, ke printempe kaj somere ili ambaŭ promenados ĉe la bordo de Danubo. Certe Milena ŝatis promeni tie.

Bedaŭrinde Veselin ne havis foton de Milena. Eble post iom da tempo li forgesos ŝian vizaĝon. Li forgesos la molan rigardon de ŝiaj kolombkoloraj okuloj, ŝian rideton. Absurda estas la vivo. La homo naskiĝas, vivas kaj senspure malaperas. Kial?

Veselin rigardis la horloĝon. Estis la kvara horo matene. Li iris al la fenestro kaj rigardis la malluman silentan straton.

17.

La aŭto monotone zumis. Vlad dormis sur la malantaŭa sidloko, Neda rigardis eksteren. Veselin ne stiris rapide. Ili triope veturis al urbo Radovo, kie estos inaŭgurita ekspozicio de Veselin. Dum la lastaj kvin jaroj Veselin fariĝis fama pentristo. Oni aĉetis liajn pentraĵojn. Liaj ekspozicioj estis en kelkaj grandaj urboj kaj eksterlande. Antaŭ du semajnoj li revenis el Vieno, kie same estis lia ekspozicio.

Jam delonge Veselin ne plu laboras en “Afrodito”. De kvin jaroj li loĝas en Serda. Li kaj Neda aĉetis novan loĝejon.

La vasta kampo ĉe la ŝoseo havis orekan koloron. La aŭtuno malavare kolorigis per molaj varmaj koloroj la kampon, la arbaron, preter kiu ili veturis.

-Vidu, proksime estas restoracio – diris Neda. – Ni haltu kaj ni iom ripozu. Ja, ni veturas jam kvar horojn.

-Kia restoracio? – demandis Veselin.

-Mi ne vidis la nomon, kiu estis skribita sur la ŝildo, sed estis montrite, ke post du kilometroj estos restoracio – diris Neda.

-Bone. Ni haltos kaj ni trinkos kafon – konsentis Veselin.

Vlad daŭre dormis. Antaŭ ili ĉe la ŝoseo videblis arbaro, kiu similis al tilia arbaro. Subite Veselin vidis alian ŝildon: “Restoracio “Danuba Renkontiĝo”. Li ekstremitis. Delonge jam li estis forgesita tiun ĉi restoracion. Ja, pasis kvin jaroj. Veselin demandis sin, ĉu kvin jaroj estas granda aŭ malgranda periodo. Ja, la tempo rapide pasas.

-Vi diris, ke ni haltos ĉe la restoracio – Veselin aŭdis la voĉon de Neda.

-Jes – ekflustris li.

Li malrapidigis la aŭton kaj ĝi haltis.

-Kie ni estas? – demandis Vlad, kiu vekigis.

-Ĉe iu restoracio kaj ni trinkos kafon – diris Neda.

Ili eliris el la aŭto kaj eniris la restoracion. Veselin enpaŝis ĝin kun tremanta koro. La rememoroj vekigis en li kiel pluraj dormantaj birdoj, kiuj subite brue ekflugis.

-Vlad, kion vi trinkos? – demandis Neda la filon.

-Limonadon – respondis Vlad.

La kelnero rapide servis al ili la kafojn kaj la limonadon. Veselin malrapide komencis trinki la kafon. Oni trovis la korpon de Milena en la Danubo. Ŝi estis mortpafita kaj ĵetita en la riveron. Dum longa tempo la polico ne serĉis ŝin. Iuj fiŝkaptistoj trovis ŝian korpon. La policanoj pridemandis multajn homojn, sed ili ne trovis la murdinton. La pridemandoj estis precize kolektitaj en dikaj dosieroj kaj ŝlositaj en metalan ŝrankon en la policejo. Tiel la polico ŝlosis la vivon de Milena por eterne.

Milena ofte venis en la sonĝojn de Veselin. Ŝi kvazaŭ ĉeestis dum ĉiuj liaj ekspozicioj. Nun subite ŝajnis al Veselin, ke iu silente eksidis ĉe li, ĉe la tablo en la restoracio kaj tre mallaŭte iu tenere ekflustris al li: "Ne forgesu mian voĉon!"

Sofio, la 6-an de decembro 2019

PRI LA AŬTORO

Julian Modest naskiĝis en Sofio. Bulgario. En 1977 li finis bulgaran filologion en Sofia Universitato “Sankta Kliment Ohridski”, kie en 1973 li komencis lerni Esperanton. Jam en la universitato li aperigis Esperantajn artikolojn kaj poemojn en revuo “Bulgara Esperantisto”.

De 1977 ĝis 1985 li loĝis en Budapeŝto, kie li edziĝis al hungara esperantistino. Tie aperis liaj unuaj Esperantaj noveloj. En Budapeŝto Julian Modest aktive kontribuis al diversaj Esperanto-revuoj per noveloj, recenzoj kaj artikoloj. Tie li estis membro de la Asocio de Junaj Hungaraj Verkistoj. De 1986 ĝis 1992 Julian Modest estis lektoro pri Esperanto en Sofia Universitato “Sankta Kliment Ohridski”, kie li instruis la lingvon, originalan Esperanto-literaturon kaj historion de Esperanto-movado. De 1985 ĝis 1988 li estis ĉefredaktoro de la eldonejo de Bulgara Esperantista Asocio. En 1992-1993 li estis prezidanto de Bulgara Esperanto-Asocio.

Julian Modest estas aŭtoro de jenaj esperantaj verkoj:

1. ”Ni vivos!” – dokumenta dramo pri Lidia Zamenhof. Eld.: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1983.
2. ”La Ora Pozidono” – romano. Eld.: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1984.
3. ”Maja pluvo” – romano. Eld.: “Fonto”, Chapeco, Brazilo, 1984.
4. ”D-ro Braun vivas en ni”. Enhavas la dramon “D-ro Braun vivas en ni” kaj la komedion “La kripto”. Eld.: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1987.
5. ”Mistera lumo” – novelaro. Eld.: Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto, 1987.
6. ”Beletraj eseoj” – esearo. Eld.: Bulgara Esperantista Asocio, Sofio, 1987.

7. "Ni vivos! – dokumenta dramo pri Lidia Zamenhof - grandformata gramofondisko. Eld.: "Balkanton", Sofio, 1987
8. "Songe vagi" – novelaro. Eld.: Bulgara Esperanto-Asocio, Sofio, 1992.
9. "Invento de l' jarcento" – enhavas la komediojn "Invento de l' jarcento" kaj "Eŭropa firmao" kaj la dramojn "Pluvvespero", "Enŝteliĝi en la koron" kaj "Stela melodio". Eld.: Bulgara Esperanto-Asocio, Sofio, 1993.
10. "Literaturaj konfesoj" – esearo pri originala kaj tradukita Esperanto-literaturo. Eld.: Esperanto-societo "Radio", Pazarĝik, 2000.
11. "La fermata konkoo" – novelaro. Eld.: Al-fab-et-o, Skovde, Svedio, 2001.
12. "Bela songo" – novelaro, dulingva Esperanta kaj korea. Eld.: "Deoksu" Seulo, Suda Koreujo, 2007.
13. "Mara Stelo" – novelaro. Eld.: "Impeto" – Moskvo, 2013
14. "La viro el la pasinteco" – novelaro, esperantlingva. Eldonejo DEC, Kroatio, 2016, dua eldono 2018.
15. "Dancanta kun ŝarkoj" - originala novelaro, eld.: Dokumenta Esperanto-Centro, Kroatio, redaktoro: Josip Pleadin, 2018
16. "La Enigma trezoro" - originala romano por adoleskuloj, eld.: Dokumenta Esperanto-Centro, Kroatio, redaktoro: Josip Pleadin, 2018
17. "Averto pri murdo" - originala krimromano, eld.: Eldonejo "Espero", Peter Balaz, Slovakio, 2018
18. "Murdo en la parko" - originala krimromano, eld.: Eldonejo "Libera", Lode Van de Velde, Belgio, 2018
19. "Serenaj matenoj" - originala krimromano, eld.: Eldonejo "Libera", Lode Van de Velde, Belgio, 2018
20. "Amo kaj malamo" - originala krimromano, eld.: Eldonejo "Libera", Lode Van de Velde, Belgio, 2019
21. "Ĉasisto de songoj" - originala novelaro, eld.: Eldonejo "Libera", Lode Van de Velde, Belgio, 2019

Julian Modest ofte prelegas pri la originala Esperanto-literaturo. Li estas aŭtoro de pluraj recenzoj kaj studoj pri Esperanto-libroj kaj Esperanto-verkistoj.

Pluraj noveloj de Julian Modest el Esperanto kaj el bulgara lingvo oni tradukis en diversajn lingvojn, albanan, anglan, hungaran, japanan, korean, kroatian, makedonan, rusan, ukrainan k. a.

Nuntempe li estas unu el la plej famaj bulgarlingvaj verkistoj. Liaj noveloj aperas en diversaj bulgarlingvaj revuoj kaj ĵurnaloj. Pluraj liaj noveloj bulgaraj kaj esperantaj estas en interreto.

Liaj rakontoj, eseoj kaj artikoloj aperis en diversaj revuoj “Hungara Vivo”, “Budapeŝta Informilo”, “Literatura Foiro”, “Fonto”, “Monato”, “Beletra Almanako”, “La Ondo de Esperanto”, “Zagreba Esperantisto” kaj aliaj

Nun Julian Modest estas ĉefredaktoro de revuo “Bulgara Esperantisto”. Oni ofte intervjuas lin en bulgaraj ĵurnaloj kaj en diversaj radiaj kaj televiziaj stacioj, en kiuj li parolas pri originala kaj tradukita Esperanta literaturo. Li redaktis plurajn Esperantajn kaj bulgarlingvajn librojn. Julian Modest estas membro de Bulgara Verkista Asocio kaj Esperanta PEN-klubo.

Enhavo

1. Aŭtuna ferio	3
2. Ne forgesu mian voĉon	49
Pri la aŭtoro	101